

2000–4999 paŝoj – 16 baladoj

& Garantio:	410
& Hetmano:	414
& Nepunebla krimo:	419
& Car' Nikita kaj kvardek liaj filinoj:.....	423
& La postena dometo:.....	428
& Sigmunda balado pli nova:	432
& Drako Longa:.....	437
& Jalgrima balado:.....	444
& Nevola mortiginto:.....	451
& Vilmunda balado:	457
& Sigmunda balado malnova:	464
& Havamal:.....	471
& Popo kaj lia dungito Balda:	480
& Davida balado:.....	486
& Balado de l' prizono Reading:	497
& Balado de Virgar:	504

& Garantio:

< Rekante 52 el 101 batoj por strofo, entute 2020 paŝoj dum 23 minutoj. Verkis? Schiller. El germana? tradukis? Vasilij Devjatnin (Verkaro de V. N. Devjatnin, Hachette, Parizo 1906). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵoj.>

(#Melodio:

<1,5:101> (

/So o La LaTi do dodo Ti TiSo LaLa; dodo TiTi La a;Ti do dore mi mimi re reTi LaLa; dodo TiTi La a;Ti do dore mi mimi re reTi SoSo; dodo TiTi La a;So La LaTi do dodo Ti TiSo LaLa; dodo TiTi La a;Ti do dore mi mimi re reTi LaLa; dodo TiTi La a;Ti do dore mi mimi re reTi SoSo; dodo TiTi La a;Ti do domi %T so somi re reTi SoSo; dodo TiTi La a;Ti do domi so somi re reTi SoSo; dodo TiTi La a;So La LaTi do dodo Ti TiSo LaLa; dodo TiTi La a

)×20)+

(&Strofoj:

< El Ŝiler.>

'1 /Damon' unu fojon mallaŭte trairis (×: **&P;** **Pasas tempo jam** ;) Kun akra tranĉilo sub bask' al tirano - (×: **&P**) Al Dionisio, - sed unu gardano (×: **&P**) Lin kaptis subite. Tiran' al li diris: (×: **&P**) "Pro kio al mi vi, bastardo, aliris?" (×: **&P**) - Mi sanktan promeson ekvolis plenumi... – (×: **&P**) "Krimulo! mi %T tuj vin ordonos krucumi!" (×: **&P** **Je vorto vi kredu, pro morto ne cedu. &P** Elportos amiko se sorto vin pikos. **&P**)

'2 - Jam longe al morto mi estas pretita, Kaj, kredu, ne diros mi eĉ unu vorton Pro mia pardono, ĉar havas mi forton, Por morti sur kruco; sed se inklinita Vi estas al bono, - ho, estu donita Al mi kelka tempo, por fraton edzigi, - Ĉe vi - do mi povas amikon restigi. -

'3 Kruele ekbrilis tirana rigardo,Kaj jen li eldiris post kelka silento: "Tre bone, kun tio mi estas konsenta;Sed bone vi tamen memoru, bastardo,Ke vian amikon mi tenos sub gardoNe pli, ol tri tagojn, - kaj poste li mortos, Al vi li per tio pardonon alportos."

'4 Al sia amiko Damono alvenisKaj diris: "tiran' min aljuĝis krucumi,Ĉar volis mi sanktan promeson plenumi.Kaj mi nur tri tagojn ricevi elpenisPor fraton edzigi." Kaj li ĉirkaŭprenisAmikon kaj petas: "Ho, restu, karulo,Vi por garantio ĉe malbonegulo!"

'5 Amiko volonte konsentis, kaj restis En malliberejo li por garantio, Kaj tuj liberigis Damonon per tio. Damono edziĝon de frato forfestis,En tria mateno tre frue sin vestis Kaj vojon rapidas, malfrui timanteKaj ĉiam pri sia amiko pensante.

'6 Subite tre forta ventego fariĝis, Kaj tondro, kaj fulmo, kaj granda pluvego;Pli forte, pli brue koleras ventego, - Kaj jen riveretoj de mont' ekruliĝis,Riveron plenigis, kaj ĝi ekondiĝis.Damono al ponto rapidas de monto, - Kaj vidas, ke estas rompita jam ponto.

'7 Li vagas sub pluvo sur bord' de rivero, Kaj tre malproksime li vidas dometon;Li krias, li vokas, li petas ŝipeton,sed vane, - neniun ĉar kun malesperoEkvolas batali kun brua rivero.Kaj baldaŭ rivero jam aliformiĝis: Je maro ĝi larĝa simila fariĝis

'8 Kaj jen lian koron plenigis doloro -Li ploras, antaŭen li manojn etendas, Kaj preĝon varmegan al Zeŭso li sendas: "Kompatu! - li petas kun granda fervoro - kaj min ekrigardu kun dia favoro! Se al Sirakuzoj vi min ne alportos, Ho! mia amiko senkulpe ja mortos!"

'9 Sed vane kompaton de
Zeŭso li petas: ventego,
kaj ondoj, kaj pluv' ne ĉesiĝas,
..... Sed ĉiam pli fortaj, teruraj
fariĝas, -Kaj tempo
forpasas. Damono formetas
.....De si sian veston, kuraĝe
sin ĵetas En bruon riveron
kaj naĝas, tranĉante Per
brusto nur ondon, kun mort'
batalante.

'10 Kaj jen li jam estas sur
bordo, - elŝiris Sin mem li
el brakoj teruraj de morto,
Kaj multe dankem' al favoro
de sorto Rapidas li plu.
Sed subite eliris El granda
arbaro rabistoj. Aliris Al
ili Damono, - kaj ili malpace
..... Ĉirkaŭis lin tute, rigardas
minace.

'11 "Ho, kion vi volas,
krimuloj? - li diris -
Ankoraŭ ne scias, friponoj, vi
tion, Ke, krom ŝarĝa vivo,
mi havas nenion, - Sed
vivo ne estas jam mia!" Li iris
..... Al ili, de unu bastonon
elŝiris, Per ĝi li elsvingis,
kaj tri formortigis, Aliajn -
do ĉiujn facile forigis.

'12 Sed suno post pluvo
varmege bruligis
Migranton, kaj tute li perdis
jam forton, Kun granda
teruro atendis li morton, -
Kaj preĝis le Zeŭson: "vi min
liberigis El ondoj bruegaj,
de mi vi forigis rabistojn, -
ĉu tie-ĉi devas suferi Mi
vane kaj morti, amikon
oferi?!"

'13 Kaj - kio-do? - swxajnas al
li, murmuretas Ne tre
malproksime malgranda
rivero: Rapide sin turnas al
ĝi kun espero Damono -
kaj vidas, ke fonto fluetas.
Al ĝi superforte li tuje
vagetas, Soifon brulegan
kun ĝoj' kvietigas kaj
korpon malsanan en ĝi
refreŝigas.

'14 Jam suno varmege majeste
subiras Kaj ombroj
longegaj kuŝiĝas sur tero:
Tre baldaŭ jam venos
trankvila vespero. Sur vojo
al urb' du migrantoj jen iras,
..... Damono - do ilin sur voj'
pretreriras. Migrantoj
parolas, Damono aŭskultas
.....Kaj aŭdas: "nun lin oni jam
ekzekutas!"

'15 Tumulto piedojn al li
flugiligas, - En lia animo -
senfinaj teruroj.Kaj jen
Sirakuzoj! Nur suprojn de
turojMalalta jam suno
facile origas: Jam estas
vespero! Kaj li rapidigas
Ankoraŭ pli paŝojn, - kaj vidas
- en strato Renkontas lin
lia servant' Filostrato.

'16 - Revenu, ĉar ĉio jam estas
finita!Li diris malgaje: - en
urbon ne iru, Mi petas vin,
el Sirakuzoj foriru!Li estas
jam al ekzekuto metita.Li
kredis ĝis fin', ke li estos
trompitaNeniam de sia
amik', kaj nenio Lin povis
devigi ne kredi je tio. -

'17 "Ho, se jam malfrui al mi
estas sorto, Kaj se mi ne
povas de mort' liberigi
Amikon, mi devas min ankaŭ
mortigi: Tirano ne diru, ke
kuris de morto Mi nur
dank' al mia anima malforto!
..... Al vi mian vivon volonte
mi cedas, Sed sciu, ke
homoj kaj amas, kaj kredas!"
.....

'18 Vespere Damon'
Sirakuzojn enirasKaj
vidas, ke kruco sur placo jam
staras,Kaj oni jam tute
amikon preparas,Por lin
ekzekuti. Kun forto traŝiras
.....Amason popolan Damono
kaj diras: "Mi morton
deziris de Dionisio, - Mi
estas krimulo, li - nur
garantio!"

'19 En granda mirego popol'
silentiĝas. En ĝojo amikoj
tuj sin ĉirkaŭprenas,Kaj
ploras, - pri kio - neniu
komprenas,Sed larmoj el
ĉiuj okuloj ruliĝas.Minaca
tirano pri ĉio sciiĝas;Li je
amikeco tiela tre miras Kaj
verajn amikojn li vidi deziras.
.....

'20 Kaj jen ili venas. Kun vido
afabla Tirano renkontas
amikojn kaj diras: "Vi tute
min venkis, senfine mi miras!
..... Mi estas ankoraŭ por amo
kapabla, Permesu al mi, ke
en ligo mi via, Amikoj
varmegaj, por vi estu tria!"
.....)

& Hetmano:

< Rekante 21 el 43 batoj por strofo, entute 2101 paŝoj dum 24 minutoj. Verkis Vasilij Devjatnin (Verkaro de V. N. Devjatnin, Hachette, Parizo 1906). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:43> (/mimi miimimi mimi fafa faafafa fafa; mimi miimimi re dore mimi; mimi miimimi mimi fafa faafafa fafa; mimi miimimi re dore mimi;

(#Rekantaĵe: mi mimi mimi fa fafa fafa ; mimi reedore mi mi; mi mimi mimi fa fafa fa;fa mimi doTi La La a;

)×49)

+

(&Strofoj:

< suĵeto estas pruntita.
Poemo.>

'1 En senviva arbaro vivas
brava anaro ; Da rabistoj kun
sia hetmano. ; Li, ankoraŭ
junulo, estas glora bravulo ;
Kaj jam tenas potencon en
mano.

(×: **Kreskas arbar'**,
**groteskaj misfaroj ; kovras
sin de la suno. ; Brutaj
bandanoj, trupa hetman' ;
manovras for de puno.**)

'2 Ĉiuj multe lin timas, lian
saĝon estimas, ; lian vivon
zorgeme pririgardas, Li - do
estas severa, malkontenta,
kolera, ; Kaj rabistojn fiere
rigardas.

'3 En pasinta somero li kun
muta kolero ; Patran domon
forlasis por ĉiam, ; Kredi
veron li ĉesis, sanktan Dion
forĝesis, ; kaj rabisto fariĝis
de tiam.

'4 Li el mondo forkuris kaj
solene li ĵuris ; Senkompate
forvenĝi homaron, ; Kaj kun
tiu-ĉi ĵuro kruelega, terura, ;
Li forisis senvivan arbaron.
.....

'5 En arbaro sur fundo de
kavego profunda ; Lin okaze
raqbistoj renkontis: ;
Forkurinto mizera kun konfido
sincera ; Sian sorton al ili
rakontis.

'6 Lin rabistoj komprenis kaj tuj mem lin alprenis, ; kiel membron de bando ilia, ; Sed tre baldaŭ bandano mem fariĝis hetmano, ; Komandanto de aro malpia.

.....

'7 Li, kruela, kuraĝa, kvazaŭ besto sovaĝa, ; Al pasantoj kuradis renkonte, ; Kaj, kaptante oferon, ĝin ĵetadis sur teron ; Senkompate, senkore, senhonte.

'8 Eĉ rabistoj malvarmaj iafoje kun larmoj ; Kruelecon hetmanan rigardis ; Sed, ĉe vido de brilo sur lakita tranĉilo, ; Ion diri al estro sin gardis.

'9 Foje unu bandano pri senkulpa infano ; Senkompatan hetmanon ekpetis, ; Sed per propra lin mano tuj mortigis hetmano ; Kaj al hundoj por manĝo forĵetis.

'10 Lin jam serĉis polico, kaj kun lerta malico. ; Grandan monon promesis al tiu, ; Kiu vivan lin trovos, aŭ mortigi nur povos, ; Sed lin trovis, mortigis neniun.

'11 Longe vagis sen baroj en senvivaj arbaroj ; Nekaptebla hetmano kuraĝa, ; Kaj mokeme nur ridis, kiam aŭdis aŭ vidis, ; Ke lin serĉas polico sensaĝa.

'12 Unu fojon lin trovis kaj mortigi eĉ provis ; Du tro lertaj, kuraĝaj soldatoj, ; Sed hetman' ilin ligis kaj kun si veturigis ; En tendaron de siaj kunfratoj.

'13 Malfeliĉaj kaptitoj estis forte vergitaj ; De hetmano en densa arbaro, ; Kaj post tiam bandanoj kun katenoj sur manoj ; Ilin sendis kun rid' al estraro.

'14 Kaj estraro kolera en indigno sincera ; Nepre kapti krimulon intencis ; Kun decido tiela kontraŭ bando ribela ; Ĝi regulan militon komencis.

'15 Kaj subite arbaro, ĉirkaŭita per baro ; El soldatoj tre bone armitaj, ; Estis tute simila je grandega kaptilo ; Kun bestegoj en ĝi enŝlositaj.

'16 Al rabistoj kaptitaj venis spertaj senditoj ; Kun propono de plena pardono, ; Se nur ili sen vorto humiliĝos al sorto ; Kaj hetmanon fordonos pro mono.

'17 - Nu, amikoj-kunfratoj, nin
ĉirkaŭis soldatoj, ; Diris brava
hetmano fiero: ; - Humiliĝu al
sorto, ĉar minacas vin morto, -
; Mi ĝin diras el koro sincera!

.....

'18 - Mi konsilas vin cedi, ĉar
ne povas mi kredi, ; Ke vi
estas kapablaj al grando. ;
Ekrigardu, kunfratoj: en
arbaro soldatoj ; Nin ĉirkaŭis
de rando ĝis rando.

'19 - Vin soldatoj mortigos, aŭ
po unu kunligos ; Kaj eltenos
el via arbaro, ; Sed se vi nur
deziros, vi liberaj eliros ; Kaj
kun mono el tiu-ĉi baro.

'20 - Nu, malpiaj bandanoj,
jen al vi miaj manoj ;
Senarmitaj kaj jam
sendanĝeraj: ; Ligu ilin sen
timo, kaj kun gaja animo ; Iru
for el arbaro liberaj!

'21 Lin respondis neniu, - sed
en brusto de ĉiou ; Frapis koro
per sento kolera. ; - Vi obstine
silentas? Ĉi kun mi vi
konsentas? - ; Diris ree
hetmano fiero

'22 Kaj tuj mem sonis krio:
"nin devigos nenio ; De
hetmano foriri perfide! ; Ni
hetmanon estimas, ni
danĝeron ne timas! ; Ni
batalon deziras avide!"

'23 Kaj senditoj kaptitaj estis
tuj disŝiritaj ; De rabistoj kun
krio sovaĝa. ; Tiam juna
hetmano kun tranĉilo en mano
; Proksimiĝis al bando kuraĝa.

.....

'24 Jen li ĉapon formetis, ĝin
sur teron li ĵetis ; Kaj per
brusto ondanta enspiris: ;
Kajmemfide, kun vido de
kuraĝa decido, ; Al rabistoj
solene li diris:

'25 - Venis tempo fatala de
kruela batalo: ; Ni atendas aŭ
venkon, aŭ morton, ; Nin
danĝero minacas, kaj al vi mi
donacas ; Mian kapon, kaj
koron, kaj forton!

'26 - Sed mi kredas, kolegoj,
ke eĉ grandaj nubegoj ; Da
soldatoj kun trafikaj pafiloj ;
Nun disflugos por ĉiam kaj
batalos neniam ; Kontraŭ niaj
brilantaj tranĉiloj!

'27 Kun konfido anima kaj
kun ĝojo senlima ; Lin salutis
rabistoj - kunfratoj: ; "Vivu
estr' estiminda! Vivu frato
aminda! ; Forpereu malnoblaj
soldatoj!"

'28 Kaj en nokto senstela tuta
bando ribela ; Sian neston
malluman forlasas. ; Rampas
ventre klunfratoj, kaj simile je
katoj ; Ili mute, senbrue
trapasas.

'29 Jen ekpafo trasonis, bando
tuj ĝin ekkonis: ; Por komenco
ĝi estis signalo. ; Kaj rabistoj
atakas: pafas, tranĉas kaj
hakas. ; Komenciĝis kruela
batalo!

'30 Kiel iaj demonoj saltas
lertaj friponoj, ; Eksvingante
per akraj tranĉiloj. ; Kaj
batalon bruantan, homan
sangon fluantan ; Kaŝas nokto
sub nigraj flugiloj.

'31 En mateno - do frua estis
ĉio senbrua, ; hele suno suriris
brilanta. ; Sed ĝi sangon
ekvidis, kaj foriri rapidis ; Sin
kovrinte per nuboj fluganta.
.....

'32 Kaj en tuta ĉielo tuj fariĝis
ribelo: ; Fulmotondro eksonis
kolere, ; Nigraj nuboj ekbruis
kaj pluvego ekfluis, ; Pri
mortintoj plorante sincere.

'33 Kaj per larmoj naturaj
homaj agoj teruraj ; Estas iom
post iom lavataj. ; Nur sur
loko fatala, kie estis batalo, ;
Restos longe skeletoj soldataj.
.....

'34 Multaj jaroj forpasis. Jam
hetmano forlasis ; Sian
bandon kaj sian metion. ; Li
senfine sopiris, en dezerton
foriris, ; Kaj en ĝi rememoris
li Dion.

'35 Lia vivo sencela,
malprudenta, ribela ;
Elpentiĝis en lia memoro: ;
Ĉiam vivis li krima kun
malpura animo, ; Sen espero,
sen kredo en koro.

'36 Nun malpia krimulo jam
ne estas junulo, - Baldaŭ
venos jam morto severa, ;
Poste - juĝo de Dio. Lin
pravigis nenio, ; Ĉar ne kredis
li, vermo fiero!

'37 En senlima sopiro lin
vizitis deziro ; Formortigi sin
mem, kiel hundon. ; Kun
decido tiela en animo ribela ;
Li eniris kavegon profundan.
.....

'38 Lia mano tremanta kun
tranĉilo brilanta, ; Jam sin
levis al gorgo sulkita. ; Unu
movo de mano - kaj por brava
hetmano ; Estus ĉio por ĉiam
finita!

'39 Sed subite formetis li
tranĉilon kaj ĵetis ; Ĝin rapide
kun forto sur teron: ; Li
eksentis kun ĝojo je unua nur
fojo ; En mizera animo
esperon.

'40 Li de ĝojo ekploris, ĉar li
tuj rememoris, ; Ke li povas
formorti kun gloro: ; Lia vivo
rompita estas alte taksita ; De
estraro per multo da oro.

'41 Li ekĝemis facile, al ĉielo humile ; Siajn manojn li pie etendis, ; Kaj kun kredo kreskanta al Potenca Juĝanto ; Sian preĝon unuan li sendis.

.....

'42 Tiu preĝo sincera por hetmano fiero ; Estis ĝusta saniga balsamo: ; Nun, anstataŭ sopiro, lin vizitis deziro ; De reveno al bono, al amo.

'43 Kaj terura rabisto al malriĉa botisto ; Venas nokte kun stranga propono: ; "Vi fortike min ligu kaj en urbon venigu, ; Kaj ricevos vi multe da mono."

'44 Malriĉulo ekmiris: "ĉu ne estas, li diris, ; Vi freneza, amiko amata?!" ; - Ne, mi estas en sano, - sed mi estas hetmano ; De rabistoj, krimulo sciata.

'45 Jen en mezo de placo, kiel morta minaco ; Por senkoraj scivolaj vidantoj, ; Staras alta Pendingo, ĉirkaŭita per ringo ; De senmovaj policaj gardantoj.

'46 Kaj subite murmuro de nevola teruro ; Sonis brue en popolamaso: ; Sur pendinga subnmeto kun feliĉa rideto ; Maljunulo aperis malgrasa.

.....

'47 Jen per mano tremanta kun kateno sonanta ; Sanktan signon de kruco li faris, ; Kaj kun vido trankvila en vizaĝo humila ; Sin al morto kruela preparis.

'48 Oni donis signalon. Kaj en maŝon fatalan ; Estas kapo grizghara metita. ; Kelkaj movoj malfortaj, konvulsioj postmortaj, ; Kaj spektaklo jam estas finita!

'49 El bluaĝo ĉiela lumas suno tre hela ; Per radioj varmegaj brilantaj. ; Ĉio estas silenta, ĉio estas kontenta, ; Kaj senbrue disiras vidantoj.)

& Nepunebla krimo:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 2255 paŝoj dum 25 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:41> (

/dodo TiTi doTi La So; dore mido fare so so; dodo TiTi doTi La So; fafa mimi fami re do;

(#Rekantaĵe: so soso la ala mi faso fa a; mimi fami re do o; so soso la ala mi faso fa a)

)×55)+

(&Strofoj:

'1 /La belega Riviero ; Ĉe la golfo de Ĝenovo ; Estas paradiza tero ; Sub zefira ventoblovo.

(×: **Kiel do ni seniĝu je li? ; Estas li krimulo ; Kiel do ni seniĝu je li?**)

'2 Kaj en tiu ĉi edeno, ; Bela pli ol la imago, ; Bela pli ol florigardeno, ; Estas la landet' Monako.

'3 Jen landeto pli malgranda ; Ol distrikt' en la provinco, ; Tamen estas ĝin reganta ; Efektiva vera princo.

'4 Kaj ĝi havas registaron, ; Ĉefministron, konsilantojn, ; Kaj ĝi havas soldataron, ; Generalon, leŭtenantojn.

'5 Kaj ĝi havas eĉ policon, ; Ludobankon, direktoron; Kaj ĝi havas punjusticon: ; Juĝistaron, prokuroron.

'6 Bonaj estas ĉiuj homoj; Ne necesas puna ago, ; Ne necesas punodomoj ; En la princlandet' Monako.

'7 Tiel estis dum jardekoj, ; Oni tion jam kutimis; Ne okazis grandaj pekoj, ; Oni krimon ne plu timis.

'8 Jen okazis sed subite, ; Ke mortigis do fripono ; La najbaron plenavide, ; Ĉar delogis lin la mono.

'9 Oni kaptis la friponon ; Kaj lin donis al senato, ; Kiu havis la ordonon, ; Juĝi tuj lin sen kompatato.

'10 Do meditis ekscitite ; Oni pri eblec' konvena, ; Por lin puni laŭmerite ; Pro la krimo abomena.

'11 Oni do similan ion ; Serĉis en librar' kronika. ; Oni trovis sed nenion: ; Murdo estis krim' unika!

'12 Fine sed laŭ franca moro ; Do kondamnis la senato ; La krimulon kun fervoro Al la morto sen kompatato.

'13 Sed - jen mankis gilotino! ; Pro la senkrimec' senĉwesa ; estis senkapig-maŝino ; Ja ĝis nun ne jam necesa.

'14 Kaj pro unu nur fripono ; Oni novan ne aĉetis; Kostus multe ĝi da mono, ; kiun oni ne posedis.

'15 Kaj do oni trovi provis ; Nun alian mortigilon, ; Kaj post longa peno trovis ; Oni taŭgan do konsilon:

'16 Oni skribis tuj leteron ; Al la franca registaro ; Kaj rakontis la aferon ; Al potenca la najbaro.

'17 Oni petis pruntedonon ; De malnova gilotino; Senkapigu la friponon ; Franca majstro kun rutino.

'18 Kaj post kelkaj tagoj venis ; El Pariz' respondletero: ; Oni tie ja komprenis ; La gravecon de l' afero,

'19 Oni skribis: "Tre volonte ; Ni ja pruntus gilotinson, ; Kaj ekzekutist' Belmonte ; Akompanus la maŝinon.

'20 Kaj la kapon de l' fripono ; Tre volonte li dehakus, ; Se vi por la pruntedono ; Dudek kvinmil frankojn pagus."

'21 Tondro! Kian altan prezon ; Do sciigas la postulo! ; Tian altan monelspezon ; Ne meritas la krimulo!

'22 Kaj post longa diskutado ; Pri afero la fatala, ; Nun sin turnis la senato ; Al la registar' itala.

'23 Tie reĝo ja regadas; Eble lia politiko ; Princnajbaron do pli ŝatas, ; Ol la franca respubliko.

'24 Venis post semajnduono ; Jam respondleter' el Romo: ; "Pruntedonas laŭ bezono ; Ni maŝinon por ĉi-homo.

'25 Kaj ekzekutist' Herero ;
Tuj plenumus viajn dirojn, ;
Kaj jen kostus la afero ;
Dudek mil italajn lirojn."

'26 Pli modera jen postulo! ;
Tamen sed tro alta prezo! ;
Inda estas la krimulo ; ne al tia
monelspezo.

'27 Ĉu ne povus policano ; Do
plenumi la ordonon ; Kaj per
glavo en la mano ; Senkapigi
la friponon?

'28 Do demandis la senato ; La
polican direkcion ; Kaj
soldaton post soldato, ; Ĉu ne
iu farus tion.

'29 Ĉiujn tio sed konsternis, ;
Ĉiu sen hezit' deklaris: ; Tion
mi neniam lernis, ; Tion mi
neniam faris."

'30 Sed ĉu oni do pardonu ;
Tute simple la friponon? ;
Kian punon oni donu, ; Ne
havante ja la monon?

'31 Do kondamnis la senato ;
La krimulon kun saĝeco ; Kaj
laŭŝajne pro kompato ; Al
dumviva kaptiteco.

'32 Sed ĉar mankis punodomo
; Pro ĝisnuna nebezono, ;
Devis gardi forta homo, ; Ke
ne fuĝu la fripono.

'33 Sed jam post kvarona jaro
; Ne plu plaĉis tiu stato; Laŭ
ordon' de l' registaro ;
Rekunvenis la senato.

'34 Certe vivos la fripono ; Ja
ankoraŭ kvardek jarojn; Kiom
kostos li da mono! ; Ni evitu
la malŝparojn!

'35 Jen la konsiliĝa temo! ;
Kion oni devas fari ; En fatala
la dilemo, ; Ĉar ja oni volas
ŝpari?

'36 Tre cerbumis la senato ;
Pri gravega la demando, ; Kaj
post longa diskutado ; Do
proponis konsilanto:

'37 "Se l' gardiston ni
forprenos, ; Se ni lasos la
friponon, ; Li rapide
forpromenos, ; Kaj ni ŝparos
do la monon!"

'38 Multe plaĉis la propono. ;
Laŭ ordono de l' senato ; Do
foriris de l' fripono ; Nun
gardanta la soldato.

'39 La krimul' sed ne atentis, ;
Ke l' gardisto jam foriris; Sed
malsaton li jam sentis ; Kaj
tagmanĝon li deziris.

'40 Ĉar neniu plu alvenis ; Por
manĝigi la kaptiton, ; Li la
ujon mem ekprenis, ; Faris
kuirej-viziton.

'41 Kiam li manĝinta estis, ;
Li reiris sen hezito; En la
ĉambro plu li restis, ; Ĉar li
estis ja kaptito.

'42 Li ne pensis pri forkuro, ;
Ne deziris li liberon; La senat'
kun malplezuro ; Sed rigardis
la aferon.

'43 Oni tion ne komprenis;
Registara konsilanto ; Post tri
tagoj al li venis ; Kun malkaŝa
la demando:

'44 "Kial vi ne forpromenas? ;
Kial vi ĉi tie restas? ; Vin
neniu plu retenas ; Kaj vi
plenlibera estas."

'45 ased resonis la respondo: ;
"Per kondamna via juĝo ; Vi
ŝarĝegis min per honto, ; Kaj
ne restas plu rifuĝo.

'46 Kien iru mi, sinjoro? ;
Kion faru mi estonte? ; Ĉiu ja
kun malfavoro ; Persekutos
min senhonte.

'47 Vi ja kaŭzis la turmentojn ;
Per kondamna juĝo via, ; Do
vi donu alimentojn ; Por
estonta vivo mia!"

'48 Jen do la malnova stato! ;
Jen do sama la dilemo! ; Kaj
diskutis la senato ; Ree pri ĉi
tiu temo.

'49 Por almenaŭ ŝpari ion, ;
Por ke restu pli da mono, ; Oni
donis eĉ pension ; Al senhonta
la fripono.

'50 Por ke restu li punito, ; Oni
sed en sama tago ; Lin forpelis
sen hezito ; El la princoland'
Monako.

'51 Tio sed lin ne ĉagrenis, ;
Ne li sentis ian timon: ; En
Francujon li promenis, ; Sed
nur iom trans la limon.

'52 Tie domon li aĉetis; Ĉiam
en la dua tago ; de l' monato li
iretis ; En ĉefurbon de
Monako.

'53 Kaj li prenis la pension, ;
Kaj li moke "dankon" diris;
Dezirante ne plu ion, ; Trans
la limon li reiris.

'54 Kaj li dum duonjarcento ;
Vivis per monaka mono, ; Per
krimula daŭra rento, ; Pli
bonstate ol barono.

'55 Ho krimuloj, ĉu vi iras ;
En ĉifonoj, ĉu en frako, ; Se
pension vi deziras, ; Vi
formigru al Monako!)

& Car' Nikita kaj kvardek liaj filinoj:

< Rekante 23 el 37 batoj por strofo, entute 2294 paŝoj dum 23 minutoj, aŭ rekante 15 el 31 batoj por strofo, entute 1922 paŝoj dum 19 minutoj. "Fabelon por plenkreskuloj" verkis Aleksandr Puŝkin. El rusa tradukis Valentin Melnikov (La Ondo de Esperanto, 1999:6, p. 14–15). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio kiel por &Konfeso kaj modifita rekantaĵo. Alternative eblas uzi tiujn de &"Al la semanto". Klarigo (*): '22 Bojaro estas malnova rusa nobela rango.>

(#Melodio:

((# Konfeso: <1,7:37> /dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi milre; dore doTi LaLa LalSo (#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do mire do dodo Ti La a))

?

(# Al la semanto: <1,7:31> /(domi somi remi fami; remi fare fami dodo;)× (#Rekantaĵe: LaLado miso somi remi; fami reremi fami domi; TiTire dore doTi LaSo LaLa La a))

)×62)+

(&Strofoj:

'1 /Vivis iam car' Nikita – ;
gaja, riĉa, dorlotita, ; sen
klopodoj pri rega2d', ; do
prosperis lia ŝta2t'.

(×: (& Konfeso: **Zorgojn li foje forgesas ; Li pri kreo ne sukcesas ; kaj malĝojon venkos li ; Jen kio nin interesas.**)

?

(& Al la semanto: **Do paŝu fiere en la ĉeno ; Manoj kune en firma teno ; Aŭdi rakonton de la klara voĉo jen.**))

'2 Agis car' poiomete, ;
manĝis, trinkis, kaj kviete ;
kun diversaj li patrinoj ; kreis
opon da filinoj:

'3 kvardek junulinoj belaj, ;
bonkondute puranĝelaj, ; ravaj
korpe kaj anime. ; Kiaj
gamboj – ho, sublime!

'4 Nigraj haroj – sen riproĉ', ;
la okuloj, ĉarma voĉ', ; brila
saĝo, belstaturetoj... ; Do, de l'
kapo ĝis la kruroj

'5 ĉio logis kaj majestis; sola
aĵo nur forestis. ; Kio estis do
mankanta? ; Vere, bagatelo
vanta.

'6 Tre malgranda detaler', ;
tamen – mankis sen espero'. ;
Kiel tion do klarigi, ; por ne
tute kolerigi

'7 stultulinon nian pian, ; la
cenzuron prude fian? ; Kiel...
Helpu Dio nure! ; Caridinoj
interkrure... ..

'8 Ne, tro klare tiel estus ; kaj
danĝere malmolestus, ; do
aliel, laŭ prefer': ; Belas
mamoj de Vener',

'9 lipoj, gamboj – por adoro, ;
sed fajrujo de amoro, ;
dezirata mia cel'... ; Kio
estas?... Bagatel'!... ..

'10 Tre malgranda detalero, ;
sed ja – mankis sen espero ; al
la caridinoj etaj, ; petolemaj,
vigli pretaj.

'11 Tre konsternis onin tio. ;
Tristis cara familio. ;
Vartistina klaĉ-parol' ; baldaŭ
trafis al popol'.

'12 Eksciinte tion, certe, ; ĉiu
gapis buŝ-aperte, ; veis, miris
aŭ ne fidis, ; kaj alia, eĉ se
ridis,

'13 do mallaŭte voĉis tion, ;
por eviti Siberion. ; Foje laŭ
alvok' de l' caro ; kolektiĝis
servistaro.

'14 Jene sonis la ordon': ; «Se
okaze pri malbon' ; la filinojn
vi sciigos, ; aŭ pripensi nur
instigos,

'15 aŭ aludos opinion, ; ke
malhavas ili ion; diros ion
dubasence, ; aŭ figestos
senintence, –

'16 do – sen ŝerc' – neglekte
rangon ; al virinoj tranĉi
langon, ; sed al viroj – eĉ pli
grave, ; kio povas iĝi mave».
.....

'17 (Car' severis, sed
prudentis. ; La ordono
elokventis;)×

'18 Ĉiu klinis sin kun trem', ;
pro la tim' kaj obeem', ; kaj
atente, sindetene ; la havaĵon
gardis pene.

'19 La edzinoj sentis timon, ;
ke ne faru l' edzoj krimon;
Pensis edzoj en sekret': ;
«Kulpu, kara edzinet'!»

'20 (eble, krudis laŭnature). ;
Caridinoj jam mature ;
kreskis. Caro pro l' kompat' ;
konsilion de la ŝtat'

'21 vokis; diris li sekrete ; la
problemon, kaj diskrete, ; kaŝe
de servista greg' ; ekmeditis la
korteg':

'22 kion fari por riparo ; de la
ĝena korpdefekt'. ; Kaj subite
jen bojaro*, ; sin klininte pro
respekt',

'23 (kalvan frunton pugni ekis,
; al la caro tiel blekis:)×

'24 «Moŝta car'! Pro l'
interven' ; volu lasi min
senpuna, ; se pri l' karna
abomen' ; diros mi. En aĝo
juna

'25 Pri l' parigistin' mi aŭdis ;
(Kion nun ŝi faras? Ĉu – ; –
plej probable – same plu). ;
Tiam multaj ŝin tre laŭdis:

'26 onidire – sorĉistin'. ; Ĉiajn
morbojn ŝi kuracis, ; korpajn
fortojn redonacis. ; Eble indas
trovi ŝin.

'27 (Sorĉistino helpi pretos, ;
la mankaĵojn tuj enmetos.)×
.....

'28 – «Urĝe ŝin retrovi penu! –
; tiel diras car' Nikita ; kun
mieno sulkigita: ; – Ke ŝi
helpu. Kaj se ne – nu,

'29 se ŝi trompos nin fripone, ;
ne akiros laŭbezone, ; se
intence, en arog' ; nin ofendos
per mensog' –

'30 – estu mi ne car', sed
hundo, ; se mi dum la Pura
Lundo ; ne kondamnos ŝin je
brul' ; por la glor' de l'
Eternul'.»

'31 Jen tra tuta lando slava ;
por plenum' de l' tasko grava ;
ĉien rajdas en sekret' ; kurieroj
laŭ dekret'.

'32 La ĉevalojn ili pelas, ;
sorĉistinon trovi celas. ; Pasas
jaro, pasas du – ; la novaĵoj
mankas plu.

'33 En arbaro, en malhel' ;
(diablo gvidis lin al cel') ;
vidas li: domet' arbara, ; loĝas
sorĉistin' grizhara.

'34 (Estis cara li sendit', ; do
envenis sen hezit'.)×

'35 klinsalute ŝin aliris, ; la
aferon caran diris: ; pri la
caridinoj lindaj ; kaj la mankoj
bedaŭrindaj.

'36 Sorĉistin' komprenis bone,
; pelis lin desurperone, ; diris
tiel: «Iru for, ; sen rigardi
mian neston,

'37 aŭ vi tuj ricevos peston... ;
Post tri tagoj – venu por ; havi
jam la pretan keston, ; tamen
nepre – ĉe l' aŭror'.»

'38 Ŝi enfermis sin por sorĉo, ;
provizinte sin per torĉo, ; dum
tri tagoj sorĉis, ritis, ; do
demono ŝin vizitis.

'39 Por plenumi caran volon, ;
mem alportis li skatolon, ;
plenan de la peka var', ; Kiun
ŝatas la virar':

'40 Tre diversaj laŭ grandeco,
; laŭ koloroj – ĉia speco, ;
(luksaj, buklas la harar'...)×
.....

'41 Ilin sorĉistin' inspektis, ; la
kvardekon elselektis, ; tuken
volvis la provizon ; kaj
enŝlosis en valizon;

'42 kun ĝi sendis kurieron, ;
por la vojo eĉ moneron ;
donis. Rajdas li sen ĝen'... ;
Ekripozas je maten',

'43 manĝas panon kun viando,
; plezurigas sin per brando: ;
Al la car' li bone servis, ; ĉion
por la voj' rezervis.

'44 La ĉeval' sin paŝtas. Revas
; la bravul' – ke l' car' lin
levas, ; nomas grafo plej
solene... ; Kio do troviĝas
ene?

'45 Kion sorĉistino sendas? – ;
pensas nia kurier'. ;
Rigardindas la mister', ; sed
valizo ja senfendas.

'46 Kaptas lin la scivolemo, ;
tiel ke obsedas tremo. ; La
orelo ĉe l' serur' ; ne perceptas
ion. Nur

'47 tra l' kovrilo la odoron ;
sentas nazo kuriera... ;
Damne! Jen miraklo vera! ;
Ŝatus fari li esploron.

'48 (Kurieron venkis tent'... ;
Li malfermis – post
moment')×

'49 la birdetoj – flug! – elane, ;
kaj eksidis sur la branĉ'. ;
Logas ilin li per manĝ', ;
disŝutante – tute vane:

'50 Panon ili ne bezonas ; (ja
alias la konsum'): ; sur la
branĉoj kanti bonas – ; kial
sidi en mallum'?

'51 Jen sur pad' sin trenas peze
; kun bastono oldulin' – ;
kurba nazo, ĝiba spin'. ;
Genuiĝis li kompleze:

'52 («Avineto, savu min! ;)×
Helpu per konsil' aŭ ag'! ;
Vidu, trafis kia plag':

'53 Kapti ilin mankas povo, ;
Kion fari por retrovo?» ;
Oldulin' rigardis sor, ; kraĉis,
siblis en rankor':

'54 «Aĉas via scivolem', ; sed
ne ploru senutile... ; Vi nur
montru – kaj facile ; tuj
alflugos ili mem.»

'55 «Dankon!» – diris li
tutkore, ; montris – kaj
birdetoj tuj ; lin alflugis
plenefavore ; kaj lokiĝis ĉe la
uj'.

'56 Ke ne estu plu minac', ;
senprokraste kaj singarde ; li
enŝlosis ĉiujn kvardek ; kaj
rapidis al palac'.

'57 La princinoj ilin prenis ;
kaj en kaĝoj zorge tenis. ; Pro
triumfo de l' reven' ; tuj okazis
la festen':

'58 oni dum semajn' festenis, ;
dum monat' – ripozo plenis;
konsilion sian car' ;
rekompencis sen avar',

'59 ankaŭ sorĉistinon same: ;
al ŝi sendis el muze' ; grandan
stumpon enbalzame ; (tiun,
konsternigan tre),

'60 (plus du bufoj kaj skeleto ;
el la sama kabineto...)×

'61 Ĉiuj kun la caro festis, ;
ĉiuj kun donacoj restis. ; Same
ankaŭ kurier' – ; Jen la fino de
l' afer'.

'62 Multaj damnas min kolere
; kaj demandus nun severe: ;
Kial stultas ŝerca dir'? ; Tute
simple! Laŭ dezir'...

& La postena dometo:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 2296 paŝoj dum 25 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:41> (

/dodo TiTi doTi La So; dore mido fare so so; dodo TiTi doTi La So; fafa mimi fami re do;

(#Rekantaĵe: so soso la ala mi faso fa a; mimi fami re do o; so soso la ala mi faso fa a)

)×56)+

(&Strofoj:

'1 /Kamparano Sagopiro ; En la vilaĝeto Ĉernis ; Estis tre naiva viro ; Kaj saĝecon li ne lernis.

(×: **Kiel do ni seniĝu je li? ; Estas li stultulo ; Kiel do ni seniĝu je li?**)

'2 Iam estis li husaro. ; Li parolis kun fervoro ; Poste ofte al najbaro ; Pri la spertoj dum deĵoro.

'3 Kaj rakontis al najbaroj ; Foje do la viro bona: ; "Estis antaŭ dudek jaroj ; En la urbo garnizona.

'4 Depost pli ol tri monatoj ; Mi jam lernis servoscion, ; Ne plu mokis min soldatoj, ; Mi jam sciis preskaŭ ĉion.

'5 Baldaŭ estis sur posteno ; Mi gardonta dum deĵoro, ; Sed pro la deĵora peno ; Multe timis mia koro.

'6 Ĉiuj oficiroj estis ; Dum deĵor' ja tre kruelaj, ; Ili ĉiuntuj arestis ; Eĉ pro pekoj bagatelaj.

'7 Foje jen minalparolis, ; Min prenante ĉe la mano, ; La soldato Karlo Bolis, ; Kiu estis Ĉernis-ano.

'8 "Mi nun estas jam libera, ; Kaj mi tute jam finlernis; Je la sepa hor' vespera ; Iros hejmen mi al Ĉernis.

'9 Pasis miaj servojaroj, ; Oni
ne plu min deziras. ; Al
amikoj kaj najbaroj ; Al la
hejmo nun mi iras.

'10 Oni baldaŭ al vi donos ;
Gardejoron ja konvenan, ;
Kajpor tio do bezonos ; Vi
dometon ja postenan.

'11 Novan domon vi ricevas ;
Nur, pagante tridek kronojn, ;
Sed por mia domo devas ;
Pagi vi nur dekdu kronojn.

'12 Dudek kronojn ĝi valoras.
; "Sed, amik', mi ne
komprenas, ; Ĉu ne la
postendometo ; Al la ŝtato
apartenas?"

'13 Mi rediris kun rideto: ;
"Sed, amiko, min komprenu: ;
Ĉar mi tiom vin favoras, ; Por
la bagatel' ĝion prenu!"

'14 Sed la saĝa Karlo Bolis ;
Vere tondre nun ekridis, ; Kaj
ridante li parolis, ; Dum sur
seĝon li eksidis:

'15 "Ho, do devus ja la ŝtato ;
Mon-amasojn eĉ posedi, ; Se
por ĉiu ajn soldato ; Volus
domon ĝi aĉeti.

'16 Sed atentu, vi infano, ; Kiu
timas la aĉeton: ; Kion diros
kapitano, ; Se ne havos vi
dometon?

'17 Li neniun ja kompatas, ;
Mi multfoje tion spertis;
Lipostendometojn ŝatas, ; Kaj
jam ofte li asertis:

'18 "Sen dometo la postena ;
Ja similas gardsoldato ; Al
heliko mukoplana ; En
senkonka nuda stato."

'19 Kaj mi fakte ja estonte ; La
dometon ne bezonos, ; Kaj pro
tio mi volonte ; Ĝin per vend'
al vi transdonos.

'20 Prenu vi do la dometon! ;
Ĉe la ĉefgardej' ĝi staras. ; Ne
vi pentos la aĉeton ; Kaj vi
dekojk kronojn ŝparas."

'21 La afer' al mi tre plaĉis. ;
Ĉar dometon mi bezonis, ; Mi
aĉeti ĝin kuraĝis ; Kaj mi tuj
la monon donis.

'22 Karlo Bolis tuj foriris. ;
Bonhumore kaj kun rido ; Li
antaŭe al mi diris: ; "Fartu
bone! Ĝis revido!"

'23 Kaj mi me post
kvaronhoro ; Al la ĉefgardej'
rapidis, ; Kaj kun ĝojoplana
koro ; La dometon mi ekvidis.
.....

'24 Vere bela, plenvalora ;
Estis la postendometo, ;
Preskaŭ nova, verdkolora: ;
Vere bona do aĉeto.

'25 Tuj mi iris ĝojoplene ; Al la kaporal' trankvile. ; Mi salutis lin konvene ; Kaj mi petis lin ĝentile;

'26 "Via moŝto kaporalala! ; Ho permesu kun kompatato ; Ke min en dilem' fatala ; Nun asistu gardsoldato.

'27 Helpu min la vir' koncerna, ; Mian jen postendometon ; Porti al la kort' kazerna. ; Ne rifuzu mian peton!"

'28 Sed la kaporal admone ; Diris tuj per voĉo kria: ; "Iru hejmen, dormu bone, ; Vi drinkulo plenebria!"

'29 Mi antaŭen faris paŝon: ; "Ho, sinjoro, mi protestas! ; Se postulas mi proprajon, ; Ĉu do mi ebria estas?

'30 La dometo estas mia, ; Ĉar mi simple ĝin aĉetis! ; Kaj ne estas mi ebria, ; Kaj ĝentile mi vin petis.

'31 Kaj mi nepre ne ĝin cedos! ; Ne obstinu, kaporalo, ; Aŭ laŭleĝe mi procedos ; Per akuz' ĉe tribunalo."

'32 "Trankviliĝu! Bone, bone! ; Vi ricevos la dometon!" ; Kaj li diris telefone ; Nun al iu mian peton.

'33 Kaj mi pensis kun rideto: ; "Li nur tial tiom krias, ; Ĉar pro bona la aĉeto ; Li treege min envias."

'34 Kaj post kvaronhor' eniris ; Oficiro eminenta, ; Kaj la kaporalo diris ; Kun respekto evidenta:

'35 "Regimenta kuracisto! ; Ho sinjoro oficiro! ; Mi vin petas kun insisto: ; Temas pri ĉi tiu viro."

'36 Mi komprenis la aferon ; Kaj la kaŭzojn mi divenis: ; Por subpremi sandanĝeron ; Jen la kuracisto venis.

'37 Kaj li devas laŭordone ; La dometon nun esplori, ; Ĉu do oni povas bone ; En ĝi loĝi kaj deĵori.

'38 Sed li simple min aliris; Faris puklsan li esploron, ; Kompateme jen li diris: ; "Ĉu vi havas kapdoloron?"

'39 Mirigite mi ridetis, ; Nean signon tuj mi faris, ; Kaj ĝentile mi lin petis: ; "Ho sinjoro, vi eraris!

'40 Ne malsano min katenis. ; Do bonvolu ne minĝeni: ; Mi ĉi tien ja nur venis ; Por dometon mian preni."

'41 "Bone, bone, kara viro! ;
Vi atendi iom devos, Kaj tuj
poste laŭ deziro ; La dometon
vi ricevos."

'42 Do denove kun persisto ;
Mi atendis en angulo. ;
Montris min la kuracisto: ;
"Jen deliro de drinkulo!"

'43 Mi rapide sed deklaris: ;
"Ho sinjoro oficiro! ; Pri la
nomo vi eraris: ; Mi nomiĝas
Sagopiro."

'44 Li ridetis plenkompatate, ;
Ion kaŝe li murmuris, ;
Sammomente sed surstrate ;
Savodroŝko alveturis.

'45 Kaj kvar viroj tuj envenis,
; Volis preni min senvorte, ;
Kaj min treni ili penis ; Al la
droŝko eĉ perforte.

'46 Sed mi vigle min defendis,
; Furioze mi kondukis;
Koleregon mi eksentis ; Kaj
senĉese mi balbutis:

'47 "Lasu, lasu min, friponoj! ;
Mi proprajon nur deziris. ;
Fakte ja por dekdu kronoj ; La
dometon mi akiris!"

'48 Sed dum tiel mi parolis ;
Kaj ne cedis al perforto, ; Jen
subite karlon Bolis ;
Alkondukis gardeskorto.

'49 Vinon daŭre li aĉetis, ;
Plenebria li jam estis; La
gardistojn li moketis, ; Ili sed
lin tuj arestis.

'50 "Ho sinjoro oficiro", ; Mi
la kuraciston petis, ; "De ĉi tiu
granda viro ; La dometon mi
aĉetis."

'51 Kaj la kuracist' rapidis ;
Por demandi Karlon Bolis;
Sed ĉi tiu laŭte ridis ; Kaj
sarkasme li parolis;

'52 "Jes, li fakte ĝin aĉetis. ;
Mistifikis mi la viron, ; Sed
mi fakte ne pensetis, ; Ke li
kredas mian diron."

'53 Do min trompis la fripono!
; Li mensoge diris ĉion, ; Kaj
li tuj por mia mono ; Do aĉetis
la ebrion.

'54 Ĉiuj laŭte nun ekridis, ;
Kaj mi hontis pro l' afero. ; En
kazernin mi rapidis, ; Furioza
pro kolero.

'55 sed se mi denove venus ;
Nun al regimento mia, ; Kaj se
iu homo ĝenus ; Min per
vendpropono tia,

'56 Punus, sen timeti ion, ; Tuj
mi lin per bat' kuraĝa; Ĉar por
kredi ree tion, ; Estas multe mi
tro saĝa!"

& Sigmunda balado pli nova:

< Rekante 18 el 31 kaj 27 el 41 batoj por strofo, entute 2366 paŝoj dum 25 minutoj. Norda Kantaro #4411. Du partoj kun ĉiu siaj melodio kaj rekantaĵo. Verkis Jens Christian Djurhuus. El feroa tradukis Martin Strid (2014 kaj 2016). Duoble tradukiĝis strofo '31 kaj '64. Klarigo (*): '1 Trankvilo: ankaŭ senvento. '48 Grundoagreso: Loko kie sub mara surfaco roko malprofunda rompigas ondojn.>

(#Melodio:

<1,6:>

(# Unua parto: <:31> /mi mi dolre mi so soosomi re lso; soososo so3so fami re lfa; (# Rekantaĵo unua: mire do do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do))×34

<[La:do]>

(# Dua parto: (# Rekantaĵo dua: mifa so sola soso fami re do; dore mifa soso sofa miimifa so so; la lati 'DO ti lala so; mifa so sola soso fami re do) (<:41> soso; /so milfa so so lala so so; la lati 'DO'DO titi la so; #"Rekantaĵo dua")×32)

)+

(&Strofoj:

,& Unua parto:

'1 /En Ferooj loĝis du estraj homoj ; Trond kaj Sigmund iliaj nomoj.

(×:; **Norvegoj, dancu nun trankvile*** ; ĉiuj ni **trankvilas ; rajdantoj, norvegoj ; dancu nun trankvile.**)

'2 Sigmundo2 loĝis en Skuvo torfa ; Loĝis Trond ĉe Geŭta golfo.

'3 Kolera2s Trond, li pensas minacon ; Sigmund forverŝis nian donacon.

'4 Trond sida2s en sia domicilio ; "Venigu Ŝeŭron Tolakfilon.

'5 Venigu² Gutaon kaj Toron
 çapan ; &&
 frap klap knap lap nap eskap
 Tor esplor por sonor

'6 Envenis knaboj kaj tiel
 diras: ; "Kion vi, Trond, de ni
 deziras?"

'7 "Mi lasis al vi mesaĝon
 porti ; por ke vi helpu ke
 Sigmund mortu.

'8 Lancojn akriĝu, trançilojn
 akriĝu ; pri vivo de Sigmund
 ni intrigas.

'9 Çi mia konsilo bone bakos:
 ; Lin çi nokte ni atakos."

'10 Ili kolektis fraŭlojn kaj
 virojn ; kaj çiuuj kune al bordo
 iras.

'11 Kaj veli^{2s} Trond
 Skuvojafjordon ; ŝipo kurbiĝis
 kiel selkordo.

'12a Nokto malhelis kaj ŝipo
 iris ; ja mildan ŝarĝon Trond
 akiris.

12b Nokto malhelis kaj ŝipo
 kuris ; rekte Skuvon ili
 veturis.

'13 Nokto malhelis, kaj ŝipo
 naĝis, ; ili rekte al Skuvo
 vojaĝis.

'14 Alvenon gardis neniuj
 patrolo ; çio okazis laŭ Tronda
 volo.

'15 Ili bru²igis armilojn forte ;
 Baldaŭ dispeciĝis pordo.

'16 Sigmund vekigis el dormo
 haste: ; "Kiu enrompas nokte
 çe min draste?"

'17 "Lin kiu rompas vian
 pardon, ; vi malamis pro
 malakordo."

'18 Sigmundo² glavon tenis
 por pre^{2d} ; kvin falis kapoj al
 Tronda pie^{2d}.

'19 Sigmundo² hakas per forta
 malmi^{2ld} ; tri falis kapoj sur
 Tronda ŝi^{2ld}.

'20 Trond kole²riĝis ti^{2ome} ;
 "Faru nun fajron al Sigmunda
 domo."

'21 Sigmund pa²rolas
 klananojn siajn ; "Nun mi
 forkuros domon mian."

'22 Sudinsu^{2l}-Ajnar, fratulo
 To^{2r} ; neniuj aliaj kun li iris
 fo^{2r}.

'23 Sigmunde²dzino staras çe
 mu^{2r} ; "Min aŭdu, Geŭta
 Trondo nu^{2r}!

'24 Se kontraŭ edzino kaj idoj
 batalas ; pli ol urso vi
 skandalas ? brutalas."

'25 "Fajron estingu, trançilojn
 eningu! ; Nur Sigmundviva
 mi volas atingi."

'26 Trond sin turnis de la burgo ; rekte sin al Sigmund li turnis.

'27 Trondo tian vorton deklaras: ; "Mi Sigmundan spuron flaras."

'28 Trond petas ilin havi kredon: ; "Mi sentas fumon de Sigmund-piedo."

'29 Ili arbareton verdan iris ; kaj momenton tie tiris.

'30 Sigmundo trovis eskapon ; kuŝis kampe Stejngrim-kapo.

'31a Sigmundo poste for kuris ; for el la mano la glavo veturis?susuris.

'31b Sigmund kuris poste de l' merdo ; glavon el la mano perdis.

'32 Sigmundo fuĝis insulan nordon ; Trondo havis tiam virvorton.

'33 Sigmund ĵetas sin en la maron, ; Ejnar kaj Toro same faras.

,& Dua parto:

(×: **Ĉar neniu kuraĝas tion venĝi ; Ĝojaj rajdas miaj viroj tion agendi ; Ĉiuj laŭdiĝi emas ja ; Ĉar neniu kuraĝas tion venĝi.**)

'34 /Kiam Trondo tion vidis ; re al boato li rapidis.

'35 Re al boato li tre hastas ; tamen de Sigmund for li lastas.

'36 Naĝas tri tre for de bord' ; fluofortas en la fjord'.

'37 Toro post si rigardas ; "Ejnar lacas jam kaj tardas."

'38 Sigmund faris klopodon multan ; li metis Ejnaron sur sian ŝultron.

'39 Tor al Sigmund manon tiris: ; "Nun jam Ejnaro ĉesis spiri."

'40 Sigmund Ejnaron lasis ; Sudinsulfjordon tomben li pasis.

'41 Sigmund kun fratulo naĝas ; daŭre fjordanoj sekvis laŭ plaĝo.

'42 Tor ekkuŝis en ondo cede ; "Lacas mi mane nun kaj piede.

'43 Vi naĝu al tero, ne zorgu min! ; Mi perdiĝis, sed savu vin."

'44 Sigmund respondis, li sidis en maro ; "Ni ne disiĝos, fratulo kara.

'45 En multa2j iroj kunis ni ; fratulo, ne disos ni tie ĉi."

'46 Sigmund vortis sen rimorso ; li metis Toron sur sian dorson.

'47 Sigmund naĝas per ĉiu forto ; "Atingos baldaŭ ni al bordo'."

'48 Rando2j rompis grundoagrese* ; Toron tiras al fundo jes.

'49 Sigmund estis brava viro ; sed gamboj ne portis lin por iro.

'50 Kiam li tiom longan vojon naĝis ; ekkuŝis kviete li sur plaĝo.

'51 Torgrim posedis ĉe Sandvujk-bord' ; li elrigardis matene tra pord'.

'52 Torgrim rigardis bordon muĝan: ; "Ĉu mi ne vidas ĉifonon ruĝan."

'53 Torgrim parolas al fraŭloj du: ; "Eksciu, estas io pli, ĉu."

'54 Envenas fraŭloj, tiel diras: ; "En fuko kuŝas granda viro.

'55 En fuko kuŝas granda viro, ; ĉu ne al Sigmund similas, miru."

'56 Torgrim hakilon en mano prenis ; kaj li al mara strando venis.

'57 Torgrim ri2gardas al bordo brov. ; kuŝis tie Sigmund sen pov'.

'58 Torgrim parolas al fraŭloj siaj ; "Orringo de Sigmund estos mia."

'59 "Knaboj, lin tenu je haroj porte ; dum lin mi donos vundon morten.

'60 Knaboj, lin tenu je haroj ĝis ; kapon de korpo mi hakos dis."

'61 Knaboj lin tenis je haroj porte ; dum lin donis vundon morten.

'62 Knaboj lin tenis je haroj ĝis ; kapon de korpo li hakos dis.

'63 Hejmen ili portis ringon el or' ; sed korpon en gruzon fosis for.

'64a Jen kian finon Sigmund akiris ; lia egalo Feroe ne iris.

•
'64b Jen kian finon Sigmund
ricevis ; lian egalon Ferooj ne
levis.)

& Drako Longa:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 2523 paŝoj dum 27 minutoj. Norda Kantaro #4414. Klarigojn vidu post la strofoj.>

(#Melodioj:

<1,6:29> (

(#Strejmoja: omi /miimimi mire redo dodo; dododo dore mimi; mimi mimi mire mimi; soso fami mimi; (#Rekantaĵe: redo re rere mire; do rere re; rere mire doTi La;So So LalTi do))?

(#Varianto B: odo /doododo dore doTi LaSo; dododo dore mimi; mifa mire remi mifa; mire remi fa; (#Rekantaĵe: mido re rere mire; do rere re; rere mire doTi La;So So LalTi do))?

(#Suduroja: odo /dooSoSo LaTi dodo dooTi;Ti TiLa LaSo SoMi; SoSo LaTi dodo doTi; TiLa LaSo LaSo; (#Rekantaĵo: MiSo So FaMi redo; do dodo re; rere mire doTi La;So So LalTi do))

)×87)+

(&Strofoj:

'1 Ĉu /volas vi odon aŭdi mian ; ĉu volas vortestimojn? ; Pri Olavo Trigvafilo* ; jen sin turnos rimoj.

(×.; **Bruas danco en halo; dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj rajdas norvegoj ; al luktku2nven'**.)

'2 Konstrui ŝipon igas reĝo ; jen sur sabla strando ; Drako Longa plej granda estis ; farita en norveglando.

'3 Fariĝis ŝipo en norveglando ; bonis en ĝi konstruo ; dek ok ulnojn kaj kvardek estis ; kilo inter pruoj*

'4 Orumaj estis ambaŭ pruoj ; bluaj tabuloj estis ; orajn ŝildojn mastoj havis ; ja rakontoj atestis.

'5 Reĝo sidas en alta seĝo ; al siaj viroj parolas ; "Ni ekvelos sur sala maro ; mi tion delonge volas.

'6 Nun alportu militvestojn ;
kirason kaj glavon gliman ;
poste lanĉu ni de l' tero ; kaj
velu de norvegreĝimo."

'7 Ĝojaj kaj gajaj la fraŭloj
diris ; "Estro, kun vi ni velos ;
ĉu vi vojaĝos pace, milite ; ne
timas ni ondojn ŝvelajn."

'8 Venis viro malsupren de l'
montoj ; fortan arkon tenis ;
"Pro via jarlo Ringoregna* ;
mi ĉi tien venis."

'9 Reĝo tiel ekparolas ; ĝoja
jam tiome ; "Diru al mi, vi
juna viro ; vi kiu estas nome?"
.....

'10 "Ejnar vi nomu min ; mi
povas arkon streĉi ; Tambo
nomiĝas mia arko ; sagojn
kurigas breĉe."

'11 "Vi aŭskultu juna viro ; ĉu
kun mi volas veli ; estos vi
sagulo mia ; Drakon defendon
celi."

'12 Iris ili strandon malsupren
; riĉaj kaj altkreskaj ;
rultrunkojn rompis, tero tremis
; tiris la ŝipon el nesto.

'13 Malvolvis siajn silkajn
velojn ; en la maron iri ; estas
dirite, la reĝo mem ; li Drakon
Longan stiris.

'14 Vaste vojaĝis famo landon
; norvegoj elvelrapidas ; reĝo
danuja kaj reĝo sveduja ; kune
konsiliĝas.

'15 Reĝo danuja kaj reĝo
sveduja ; kunvenis por
ofensiv' ; kiel norvegujan
reĝon ; igi for de l' viv'.

'16 Al Ejrik jarlo mesaĝon ; ili
prepare sendis ; li vojaĝon
sekvos por sian ; patran
morton venĝi.

'17 Ejrik ĉe la reĝoj eniras ;
kun ruĝa ŝildo, kiraso ; "Olav
reĝo de norvegoj ; mian patron
mortigi lasis."

'18 Staras jarlo stokejplanke ;
lanco en manoj glimas ; "Olav
reĝo vidis ke ; mi akron per
akro rimas."

'19 Iris ili al bordo malsupren ;
bela kompanio ; reĝo danuja
kaj reĝo sveduja ; kaj Ejrik
jarlo la tria.

'20 Jen triopo da ŝiparoj ; el
Sundo* iris ; Fertirŝip'* unua
estis ; povis jarlo stiri.

'21 Reĝo danuja ekparolas ;
serĉas vortojn pledajn ; "Kiu
Drakon Longan prenos ; tiu
ĝin posedos."

'22 Ejrik pensas mem al si ;
"Ekscios vi malvola ; vi ne
prenos Drakon Longan ; per
dana potenco sola."

'23 Tiam parolas reĝo sveduja ; tenis tranĉilon boran ; "Mi ĝin prenos Drakon Longan ; aŭ vivon lasos for."

'24 Ejrik staras en larĝa amaso ; ruĝan skarlaton portas ; "Vi ne prenos Drakon Longan ; antaŭe mi diros vin morta."

.....

'25 Ejrik parolas al siaj viroj ; "Luktulojn ni renkontos ; staru bone kaj virece ; ĉar grundo sangiĝontas.

'26 Viroj norvegaj sur reĝa ŝipo ; kapablas tranĉe trivi ; iru antaŭen en dura lukto ; aŭ lasu ni la vivon."

'27 Ejrik parolas al Finno Malgranda ; "Apud mi vi staru ; vi defendos min mem se ; min venas danĝera faro."

'28 Lanĉis ili ŝipojn Sunden ; longe tie gvatis ; sopiris norvegajn ŝipojn ; reĝon norvegan bati.

'29 Lanĉis ili ŝipojn insule ; celis al konkero ; gardon tenis nokte, tage ; por norvega apero.

'30 Nun la baladon finos mi ; ne kantas mi jam favore ; tuj mi ekos alian kanton ; knaboj, metu memoren!

'31 Olavo celas hejmen veni ; de orienta maro* ; kiam li en Sundon venas ; vidas li ŝiparon.

'32 Estroj tri sur strando staras ; vaston vidmeditas ; kaj ekvidas grandan ŝipon ; sur la maro glitas.

'33 Reĝo danuja ekparolas ; "Ĉio min perfektas ; okulojn du min benas Ĥrist' ; nun Drakon mi Longan spektas."

'34 Ejrik staris en proksim' ; al siaj viroj diras ; "La danuja reĝo ; ankoraŭ ne Drakon vidas."

'35 Venis jen pli granda ŝipo ; viroj miras pri ; reĝo sveduja jarlon parolas ; "Nun Drakon vidas mi."

'36 Ŝipon lanĉas nun de bordo ; mane remilojn prenas ; "Ne lasu foriri jam Olavon ; malmultaj egalon tenas!"

'37 Ejrik rigardas al la maro : al siaj viroj diras ; "Ĵuras mi je vera dio ; vi ankoraŭ ne Drakon vidas."

'38a Reĝo danuja kaj reĝo sveduja ; tenas anson ruĝan ; "Ejrik jarlo sian patran ; morton venĝi fuĝas.

'38b Reĝo danuja kaj reĝo
 sveduja ; dubon ili esprimas ;
 "Ejrik jarlo sian patran ;
 morton venĝi timas.

'39 Malbonvole la jarlo tiam ;
 diris kolere ; "Pli ol vortaĉojn
 vi bezonas ; por norvegojn
 konkeri.

'40 Ejrik staras sur verda
 kampo ; kaj li nun ekiras ;
 "Estu rapidaj al la ŝipoj ; mi
 Drakon Longan vidas."

'41 Ĉiuj vidis Drakon veni ;
 miris atribuojn ; oraj estis la
 buspritoj ; kaj silkaj veloj en
 pruo.

'42 Metis ili sin batalen ; lance
 kaj perglave ; bolis norvegoj
 sur Drako ; ilin relukto ravis.

'43 Olav parolas al siaj viroj ;
 "Aĉetos min ili dure ; neniam
 timas mi batalon ; hodiaŭ mi
 ne forkuros.

'44 Vi metu ŝipon al batalo ;
 malhisu la velojn ; lasu ilin
 vidi ke norvegoj ; per glavoj
 povas celi!"

'45 Ulvo Ruĝa en pruo staras ;
 bonis li kaj brava ; "Ne metu
 Drakon pli antaŭen ; ĉar pruan
 longan havas."

'46 Reĝo staras en pobo posta
 ; vestita en skarlat' ; "Mia
 pruulo kaj ruĝas kaj timas ;
 nun mia vida konstat'."

'47 "Reĝo, neniam vi vidis
 min timi ; mi bone kuraĝas
 blendi ; Savu vi pobon bone
 hodiaŭ ; la pruan mi
 defendos!"

'48 Tiam koleriĝis reĝo ; kaj
 Ulvo vortojn ekas ;
 "Trankviliĝu, sinjoro mia ; ĉar
 penton kolero vekos."

'49 Olav staras en ŝipofundo ;
 kaj Ulvo vortojn donas ; "Kiu
 posedas ĉi taŭgan ŝipon ; ĝin
 mi ankoraŭ ne konas?"

'50 Reĝa frato Torkil
 respondas ; langis li raporton ;
 "Reĝo danuja kaj reĝo sveduja
 ; volas vian morton."

'51 "Timaj estas danaj viroj ;
 iri kontraŭ norvegoj ; prefere
 ili sidus hejme ; kapti birdajn
 gregojn.

'52 Pli bone povas svedaj viroj
 ; oferbovlojn* sumi ; ol eĉ
 proksimiĝi nin ; ke sango
 glave fumu."

'53 Olav iris en la pobon ; rege
 li avantaĝas ; "Kiu posedas ĉi
 grandan ŝipon ; Drakon
 baborde naĝas?"

'54 Respondis Herning,
bofrato reĝa ; lasis la vortojn
fali ; "Posedas Ejrik Hakunfilo
; ĉiuj lin lojalas."

'55 Al ĝi respondis Olav reĝo ;
vastas la rakonto ; "Akra estos
lukta ludo ; norveg' norvegojn
frontos."

'56 Reĝo sveduja Olavon
haltis ; en matena fru' ; estis
kiel fajron aŭdi ; ŝipojn tondra
sku'.

'57 Hakis kaj pikis norvegaj
viroj ; per lancoj kaj glavaj
klingoj ; dense falis la svedaj
viroj ; kiel herbon blovo
svingas.

'58 Reĝo sveduja krias laŭte ;
vokas ilin ĉesi ; "Perdis mi
plej multajn anojn ; malĝojas
mi konfesi."

'59 Reĝo danuja paŝis antaŭen
; gajni lin instigis ; prenis
norvegoj al li direkton ;
danojn maldensigi.

'60 Fumo staris ombre supren
; Sundo videble ruĝis ; estas
dirite ke danaj viroj ; ili devis
fuĝi.

'61 Ejrik antaŭen al Drako
haltis ; en manoj glima glavo ;
"Olav ne laŭdos sin ke mi ; de
li min baldaŭ savos."

'62 Metas ŝipon ĉe ŝipa rando ;
neniu fuĝe kuras ; kapoj kaj
korpoj en maron rulas ; vido
jen terura.

'63 Ejnar staras en batalejo ;
kun Tambo, arka nomo ; ĉiun
sagon, se pelis arko ; falis iu
homo.

'64 Ejnar staras en batalejo ; li
ne danĝeron timas ; vidas
altkreskan jarlon Ejrikon ;
stari rudron proksima.

'65 Ejnar streĉis Tamban
arkon ; sagon kordo levis ;
sag' superflugis jarlan kapon ;
rudra nabo krevis.

'66 Ejnar streĉis alimense ;
celis jarlon pafi ; sago flugis
mise-dise ; ne povis jarlon
trafi.

'67 Ejrik diras al Finno
Malgranda ; "Al vi mi parolas
; Kiu estas, per pafoj pikaj ;
trafi min li volas?"

'68 Tion respondas Finna
Malgranda ; manojn sango
gargaras ; "Estas tiu granda
homo ; en ŝipa mezo staras."
.....

'69 Diras jarlo iritmense ; "Mi
donas al vi motivon ; pafu tiun
grandan viron ; danĝeras por
mia vivo."

'70 "Mi ne povas la homon
fari ; ĉar ne havas li
mortmarkon* ; bonŝancas li
sed povas mi ; senkordigi lian
arkon."

'71 Ejnar streĉis je tria menso ;
jarlon por ataki ; kordo
rompiĝis de ŝtalo forta ; la
arko subite krakis.

'72 Ĉiuj aŭdis kordan rompon
; reĝo miras pure ; "Kio ĉi sur
mia ŝipo ; tondras tiom
terure?"

'73 Respondis Ejnar
Tambaskua ; ĵetas arkon sian ;
"El viaj manoj Norvegujo ;
rompiĝis, reĝo mia!"

'74 "Ne Tambe sed en Sinjora
mano ; mia regno restas ;
prenu unun el miaj arkoj ;
taŭgaj ili estas."

'75 "Tro malfortas reĝaj arkoj"
; Ejnar aŭdace deklaras ;
"Prenos ŝildon mi kaj glavon ;
kaj hakojn mi ne ŝparos."

'76 Plu staris homoj en ambaŭ
pruoj ; se mi pravas mense ;
estis malĝoje ŝipomeze ;
homoj fariĝis maldense.

'77 Ejrik kuris al Drako supren
; glavon mane tenis ; Herning
saltis en pobo malsupren ;
kontraŭ li poste venis.

'78 Hastis ili ŝipomezen ;
povas mi al vi diri ; poste al
Fertiro devis ; jarlo retroiri.
.....

'79 Elektis jarlo altajn knabojn
; tiaj maloftegas ; ili tuj
surkuris Drakon ; kaj devis
Herning cedi.

'80 Ulvo Ruĝa el pruo kuras ;
nun la pruo ruĝas ; tiom sango
sur Drako fluis ; ke ŝipo
aspektis ruĝa.

'81 Duris batalo ŝipomeze ;
ŝildojn glavoj klakas ; Ulvo
kaj Ejnar, grandluktuloj ;
ejrikanojn hakas.

'82 Ejrik estis aliamense ;
kiam amaso cedis ; tiam vidis
ke la pruan ; Drakan li jam
posedis.

'83 Jarlo trian ekon ekipas ;
"Lukton plu insistu!" ; Falis
tiam Ulv kaj Herning ; kaj tuta
la rezisto.

'84 Reĝo vokas el la pobo ;
"Al ni venas perdo ; saltu en
maron, miaj viroj ; fino
fariĝos merdo!"

'85 Reĝo elsaltis en la maron ;
sekvis la anaro ; reĝa frato
lasta estis ; laŭ reĝa volo faris.
.....

'86 Drakon Longan plej
kapabla ; Ejrik nun akiris
prenis li rudron mem en mano
; kaj ĝin el Sundo stiris.)

<& Klarigoj al Drako Longa:

Feroe verkis Jens Christian
Djurhuus (iam 1819-1823).
Temas pri la batalo ĉe Svolder
en jaro 1000, kiam reĝoj dana
Sven Tveskæg ("Dubarba")
kaj sveda Olof Skötkonung
("Sinoreĝo") kune venkis
norvegan reĝon Olaf
Tryggvason revenantan de
kristane misia militvojaĝo.
Melodioj #Strejmoja el centra
Feroo, #Suduroja el feroa
Sudinsulo. Tradukis Martin
Strid (2014). Duoble
tradukiĝis strofo '38.

Klarigoj (*):

'1 Olavo Trigvafilo, reĝo de
Norvegujo.

'3 Pruoj estas kaj la pruo
antaŭe kaj la samforma poŭpo
malantaŭe.

'8 Ringoregno, nuntempe
provinco en sudorienta parto
de Norvegujo.

'20 Sundo, markolo inter
Selando kaj Skanujo. ;
Fertirŝipo, aŭ Ferportanto,
estis la ŝipo de jarlo Ejrik.

'31 La orienta maro estas
Balta Maro.

'52 Oferbovloj temas pri la
granda asa templo en Upsalo.

'70 Mortmarko, signo pri
destino baldaŭ morti. >

& Jalgrima balado:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 2552 paŝoj dum 27 minutoj. Norda Kantaro #4407. El feroa tradukas Martin Strid (2014).). Du versioj estas notitaj el filmetoj interretaj, el Suđuroy (#Sudinsula) kaj Tórshavn (#Toreshavena). Duoble tradukiĝis strofoj '31, '34, '42, '60 kaj '65. Klarigojn vidu post la strofoj.>

(#Melodioj:

<1,6:29> (

(#Sudinsula: /LaLa Tido TiLa La3;Mi La Tido TiLa; dore mi3mi fami mi;mi redo mimi miLa; (#Rekantaĵe: dore mi redo La Fa;So La dore mimi fami mimimii; redodoo do Ti La a))

?

(#Toreshavena: /soso sodo rere so;so milso laso soso; miso laso soso so;so mire mifa soso; (#Rekantaĵe: sola so somi re do; re rere so somi so; soso somi re do o))

)×88)+

(&Strofoj:

'1 /Unu scias rimon mi ; el vortoj trafegaj ; Jalgrimo kaj Havgrimo ; en praantaŭo regis.

(×: (&Sudinsula:; **Tondru danco tre ĉarme ; nun tretu fiere ĉiuj en la ĉen' ; staras jen mastrino.)**

?

(&Toreshavena:; **Tondru danco tre ĉarme ; tretu fiere en ĉen' ; staras jen mastrino.))**

'2 Jalgrimo kaj Havgrimo ; regis per glava rando ; unu estis en Uplando ; alia en Bjarmalando*.

'3 Sin konsilis ili kiel ; prauloj faris en fojo ; ke neniu reĝo regu ; norde de Herojo*.

'4 Venis malsupren al Bjarmaland' ; kvindek altaj rajdistoj ; kaj respondis Havgrimo: ; "Kiuj estas ĉi gastoj?"

'5 Unu el la fraŭloj ridetis ;
sub lino* respondis: ; "Harald
reĝo de Norvegujo ; li al vi
min sendis.

'6 Reĝo nin ĉi tien sendis ; ne
pro milda frukto ; aŭ impostu
teron vi ; aŭ kontraŭ ni luktu."
.....

'7 Havgrimo parolon prenas ;
diras lango kore: ; "Jen
imposto neniŭ iris ; laŭ famo
kaj memoro.

'8 Mi naskiĝis Bjarmalande ;
teron mi ne impostos ; kaj do
Harald reĝo li ; ne faru al ni
kostojn."

'9 Elportis lian tablornamon ;
faritan el pura arĝento ;
"Prenu tiun ĉefon nun ;
elportu en la venton."

'10 Metis manojn sur
Havgrimo juna ; celis lin
elporti ; prenis li sian akran
glavon ; povis kirasojn forti.
.....

'11 Eltiris sian akran glavon ;
mi ne troigas, nu ; mi ĵuras je
mia kredo ke ; li faligis
rajdistojn dek du.

'12 Fraŭloj rajdis al reĝo
hejmen ; kun vortoj trafegaj ;
"Plu regas Grimo*
Bjarmalandon ; kiel antaŭe
regis."

'13 Reĝo tiel ekparolas ; tenas
tranĉilon trivan: ; "Sola mi
Norvegujon regos ; se mi estos
en vivo."

'14 Reĝo tiel ekparolas ; je siaj
flavaj haroj: ; "Gastos ni en
Bjarmalando ; en printempa
flaro."

'15 Ĉi tio famis ĝis la jarlo* ;
supre en monto sidas ; "Harald
jam Norvegujon duone ; nun
ĉion regi avidas."

'16 Jalgrim vestiĝis frumatene
; mi memoru pove ; "Nun mi
emas al Bjarmalando ;
malnovajn amikojn trovi."

'17 Elstaliĝis irĉevalo ; ĉe
halmuron staras ; ornamita en
skarlato ; ĝis la hufaj haroj.
.....

'18 Ornamita en skarlato ; ĝis
la flanko mezo ; orumita estis
selo ; rajdis Jalgrim speze.

'19 Jalgrim rajdas en ĝardenon
; malfiksas selrimenon ; "Kia
novo Bjarmalande? ; Min
lastjare venis."

'20 Jalgrim rajdas en ĝardeno,
; serĉas vortojn ekajn: ; "Kion
pri vi en Bjarmalando? ; jen
demando veka."

'21 "Harald reĝo de Norvegujo
; al ni militon sendas ; kvindek
luktulojn li kirasis ; bone mi
min defendu.

'22 Venis jen alia gasto ;
malsupren de montoj altaj ;
naskiĝis inter Bjarmaj ogroj ;
plej similas gigantojn.

'23 Naskita inter
Bjarmgigantoj ; ogrojn plej
similas ; volas li mian bonan
filinon ; al monta ekzilo.

'24 Neniu en Bjarmalando ;
kuraĝas lin renkonti ; se
provokas iu lin ; grundo
sangiĝontas."

'25 Havgrim elvenas
frumatene ; ne malhelpu
mortonton ; nun li vidas
montogiganton ; malsupreniri
de monto.

'26 Hundoj ekis boji laŭte ;
bienon venis giganto ; tretas
kruro per plena forto ;
danĝeron aroganta.

'27 Hundoj ekis boji laŭte ;
bienon giganto venis ; tretis
forte per tuta kruro ; teron
suroj trenis.

'28 Hundoj ekis boji laŭte ;
bienon giganto iras ; tretis
forte per tuta kruro ; teron
suroj tiras.

'29 Ĉiuj muroj balancadis ; kie
li korten venis ; ĉiuj pordoj
fendiĝis ĝis ; loko por li
plenis.

'30 Kie li sidigis sin ; rompiĝis
ĉiuj benkoj ; Jalgrim tian
vorton diras: ; "Jen de ogroj
bleko."

'31a Kie li sidigis sin ; ĉiuj
benkoj krevas. ; Jalgrim tian
vorton diras: ; "Tiel ogro
devas."

'31b Kie li eksidis ĉiuj ;
benkoj krevis plore. ; Jalgrim
tian vorton diras: ; "Jen la ogra
moro."

'32 Tiam respondis
montogiganto ; vango lia
fieras: ; "Tion mi ne opinias
reĝa ; kiu ne luktulon toleras."
.....

'33 La giganto ekparolas ;
serĉas en la domo: ; "Kvejas*
mastrino Inĝibjorg ; nun emas
mi ŝin koni?"

'34a Havgrim tiam ekparolas: ;
"Mi havas regan menson ; vi
ne vidos Inĝibjorgon ; kun ĉi
tiu penso."

'34b Havgrim tian vorton
diras: ; "Mi konsilon
memoros ; vi ne vidos
Inĝibjorgon ; kun ĉi tia koro."
.....

'35 Giganto fariĝis kreve
kruela ; pravas mi sen manko,
; batis li tridek luktulojn altajn
; falen sur halan plankon.

'36 "Mem traserĉos domon mi,
; mastrinon parolen trovi," ;
iris li en altan ĉambron, ; ĝin
disen misen ŝovis.

'37 Venis giganto en la halon,
; respondas tiel de si: ; "Aŭdu
mastrino Inĝibjorg, ; ĉu paros
vi kun mi?"

'38 "Faŭko via estas terura ;
kaj longas tro la nazo, ; same
viaj makzelostoj, ;
kvaronmejraj kvazaŭ.

'39 "Faŭko via estas terura, ;
frunto nura ero, ; nazo kiel
boata nesto, ; jen mi diras
veron.

'40 Barbo estas fulge nigra, ;
ĝis la brusto pendas, ; ungoj
kiel kapraj kornoj, ; ulnon de
fingroj etendas.

'41 Barbo estas fulge nigra, ;
ĝis la zono kapras, ; du okuloj
kiel flakoj?lagoj, ; dentoj
sovaĝapraj."

'42a Ekparolas la giganto, ;
vorti ne pli kapablos, ; prenas
mastrinon Inĝibjorgon, ; ŝiras
trans la tablon.

'42b Ekparolis la giganto, ; ne
plu povis vortojn diri, ; prenis
mastrinon Inĝibjorgon, ; ŝin
trans la tablon tiris.

'43 Prenis li ŝin Inĝibjorgon, ;
sub mantelon bluan, ; Jalgrim
saltas de alta seĝo, ; sian
glavon skuas.

'44 Prenis giganto la buntan
virinon ; eksteren al kampo
verda, ; Jalgrim donis akran
hakon ; sur lian verton.

'45 Perdis mastrinon li de l'
sino ; malsupren sur la
grundon, ; Jalgrim ŝin ĉevalen
prenis ; rajdis arbarprofundon.
.....

'46 Jalgrim ŝin arbaren portis,
; rajde per ĉevalo, ; aŭdu vi
fama mastrinpatro: ;
"Giganton vi batalos."

'47 Jalgrim ŝin sur ĉevalon
prenis, ; al selnabo ŝnuras, ;
tiel kutimas ĉiuj rajdistoj, ;
iranto tere kuras.

'48 Plenajn tagojn du batalis ;
sed neniu venkis ; ĝis la tria
kiam ; suno ripozen sinkis.

'49 Plenajn tagojn du batalis ;
sed neniu gajnis ; ĝis la tria
kiam ; suno senluma ŝajnis.
.....

'50 Ĝis la tria tago kiam ; suno
arbojn iras, ; tiam falis heroo
Havgrim, ; tiu vigla viro.

'51 Rajdis giganto for de
bieno, ; monten piedojn metis:
; "Poste ne jarlo el Uplando ;
glore vivos kviete."

'52 Venis homo en la halon ;
inter trabo kaj muro* : ;
"Hastu, alta Harald reĝo, ;
landon por vi sekuri.

'53 Vi rapidu Harald nun, ;
gaja en ora rondo, ; morta
estas nun la ĉefo ; nin
malhelpis longe."

'54 Metis li sub sin tutan
regnon ; ĝis la mara strando, ;
poste iris de tie for ; kaj rajdis
al Uplando.

'55 Jalgrim elvenas frumatene,
; reĝajn knabojn rimarkas, ;
nun parolas al siaj viroj : ;
"Trovu kordojn arkajn."

'56 Jalgrim elrajdas frumatene
; luktulo impete ; kvindek
estis la reĝaj viroj ; falis
unuajete.

'57 Jalgrim siajn virojn vokas :
; "Niajn arkojn streĉu, ; tiel
Harald Harbela* ne ;
uplandanojn breĉu."

'58 Jalgrim rajdas kampon
verdan ; kiel altaj viroj, ; li
faligis haraldulojn ; cent en
unu tiro.

'59 Dek ok estis tiuj fraŭloj, ;
hejmen mesaĝe rolas : ;
"Jalgrim regas en Uplando, ;
lerta ĉefo sola."

'60a Nun kirasos alian trupon ;
en batalan ordon, ; poste
rajdos al Uplando, ; streĉas
selokordon."

'60b Nun kirasos alian trupon ;
por batalo celan, ; poste rajdos
al Uplando, ; streĉas kordon
selan."

'61 Frue estis en mateno, ;
ruĝas antaŭ suno, ; rajdas ili
for arbaren ; antaŭ belan
dunon.

'62 Jalgrim elvenas frumatene,
; reĝajn knabojn rimarkas, ;
nun parolas al siaj viroj : ;
"Streĉu kordojn arkajn."

'63 Jalgrim elrajdas frumatene
; kiel altaj viroj, ; li faligis
haraldulojn ; cent en unu tiro.
.....

'64 Jalgrim rajdas verdan
kampon, ; bona teno pretos
(?), ; kaj faligas haraldajn
virojn ; cent en ĉiu ĵeto.

'65a Jalgrim rajdas verdan
kampon, ; kun sia brila glavo,
; sago flugas lian bruston ;
koron preskaŭ trafas.

'65b Jalgrim rajdas verdan
kampon, ; kun sia glavo glima,
; sago flugas lian bruston ;
koro preskaŭ viktimo.

'66 El si ŝiris li sangan sagon, ;
kiam li rimarkis, ; sendis ĝin
poste en Harald-trupon, ;
multajn vivojn sarkis.

'67 Jalgrim tiam ekparolas: ;
"Mi faligis aŭdace, ; faru nun
kiel en pratempo ; kaj ne donu
gracon."

'68 Hake trivas, poke vivas, ;
ili flekse pendas, ; havas
forton juna Jalgrim, ; li batale
blendas.

'69 Jalgrim rajdas verdan
kampon, ; trupo nun
maldensas: ; "Ĝoja mi rajdas
vespermanĝi, ; fraton trovi
pensas."

'70 Tago prenas vesperon, ;
oni giganton vidas, ; vestis
valon kaj monton ombro, ;
konon jam timidus.

'71 "Staris mi batale hodiaŭ, ;
luktis multan viron, ; nun mi
vidas montogiganton, ; de mi
li alion deziras.

'72 Staris mi batale hodiaŭ, ;
venkon gajnis enorman, ; estas
laca kaj vundegita, ; nun mi
volas dormi."

'73 "Vi neniel dormos dolĉe ;
dum plu mordos glavoj, ; ĝis
mi Inĝibjorgon havos, ; koni
ŝin estas ravo."

'74 Venis li al Jalgrim juna, ;
diras ĉi balado, ; dure per
piedoj frapas, ; ??

'75 Rajdis kunen sur verda
kampo, ; famo flugis vaste, ;
ŝvito fluis je lia zono ; kiel
rivero hasta.

'76 Jalgrim donis lertan hakon
; kio fumigis kranion ; "Kaj ne
strange estas ja ; se falos mi
hodiaŭ.

'77 Se mi ne en mia brusto ;
sentus vundon gravan ; ja ne
povus montogiganto ; hejmen
porti havaĵojn."

'78 Jalgrim ĉirkaŭsvingas
glavon ; luktis armile, ŝilde, ;
kaj ekbatis montogiganton, ;
en oston eĝ' malmilde.

'79 Ĵetis giganto feran stangon
; grande tra aero, ; Jalgrim
ricevis mavan fraĵon, ; cerbo
ŝprucis teron.

'80 Ĝilstajn ek el trupo urĝis, ;
povis kirasojn tranĉi: ; "Al
mastrino Inĝibjorgo ; giganto
ne fianĉos."

'81 Ĝilstajn de la trupo rajdis,
; glavon sian skuis, ; fendis la
teruran giganton ; disen en
pecojn du.

'82 Estis alta Harald reĝo, ;
bonajn donacojn donis, ; al li
Bjarmalandon regi ; kaj
Inĝibjorgon bonan.

'83 Ĝilstajn edzis al Inĝibjorg
; oni al mi atestis ; poste li
portis al Harald reĝo ;
ortrezorojn en kestoj.)

<& Klarigoj (*) al Jalgrima balado:

Klarigoj (*):

'2 Uplando: "Supra lando",
sudnorvega nuntempe
provinco Oppland, malsama ol
sveda Uppland. ;
Bjarmalando: Teritorio je suda
flanko de Blanka Maro, ĉirkaŭ
nuntempa Arĥangelsko.

'3 Heroj: Norvega insulo je
ĉirkaŭ 66-grada latitudo
norda.

'5 Vestajo el lino indikas
terkultivon kaj ioman riĉon?

'12 Grimo, ĉi tie mallongigo
de Havgrimo.

'15 Jarlo: titolo altrangula, plej
elstara homo post reĝo.

'33 Kvejas = kie estas.

'52 Inter trabo kaj muro: ene
en la domo.

'57 Harald Harbela: Unuiginto
de Norvegujo en unu regionon,
vivis inter jaroj –... .. . >

& Nevola mortiginto:

< Rekante 19 el 37 batoj por strofo, entute 2627 paŝoj dum 30 minutoj. Verkis Vasilij Devjatnin (Verkaro de V. N. Devjatnin, Hachette, Parizo 1906). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:37> (/La MiMi LaLa dore miimi;mi rere dodo rere mimi; La MiMi LaLa dore miimi;mi rere dodo redo mimi;

(#Rekantaĵo: la mimi lala mimi rere dore mi; la mimi lala mimi rere doTi La; mimi rere doTi La a)

)×71)+

(&Strofoj:

< Rakonto.>

'& Parto unua:

'1 Varmega tago jam finiĝis, ;
Tre bela sun' adiaŭ diris ; Al
tero, kaj alproksimiĝis ;
trankvila nokto. Mi reiris

(×: **Kreskas arbaro, verde
vestas teron branĉ'** ;
**Malbona faro vere estas
akra tranĉ'** ; **Verde vestas
teron branĉ'**.)

'2 Al domo mia kaj koleris, ;
Ĉar tutan tagon mi ĉasadis, ;
Kaj mia ĉaso ne prosperis: ;
Mi eĉ ĉasaĵon ne vidadis,

'3 Sur mia voj' en unu loko ;
Al lago venis mi, kaj vidas ;
Sur ĝia bordo kun fiŝhoko ;
Konata maljunulo sidas.

'4 Mi lin salutis: "helpu Dio!"

; - Mi dankas, - maljunulo
diras. ; "Nu, eble, vi, pro
kompanio, ; Kun mi jam
hejmen kune iras?"

'5 - Ho, ne, sinjoro! mi
intencas ; Tre longe sidi, -
dankas kore; Vi finis ĉason,
mi komencas, - ; Nenion
kaptis mi ankoraŭ.

'6 Sed eble vi malmulte
provos ; Fiŝetojn kapti? Mi
fiŝhokon ; Provizan havas, tial
povos ; Al vi mi servi, - prenu
lokon. -

'7 Mi tuj konsentis, ĉar laciĝis
; Mi kaj apenaŭ mi iradis, -
Fiŝhokon prenis kaj sidiĝis ;
Sur laga bord'. Ni paroladis
.....

'8 Pri mia ĉaso malprospera. ;
Al maljunulo mi rakontis ;
Kun fajro forta kaj sincera ;
Pri tio, kion mi renkontis

'9 En ĉaso, li do tre atente ;
Rakonton mian aŭskultadis ;
Kaj nur korkaĵon diligente ;
Sur akvosupraĵo observadis. -

'& Parto dua:

'10 Mi eksilentis. Maljunulo ;
Fiŝhokon sian plibonigis ; Kaj
diris: "kiam mi junulo ;
Ankoraŭ estis, mi pasigis

'11 En ĉaso tutan tempon
mian. ; Sed nun mi ĉasi tute
ĉesis, ; Forĵetis eĉ pafilon
mian. ; Kajkiel teni ĝin -
forĝesis."

'12 Je tio miris mi kaj petis, ;
Ke li sciigu min, pro kio ;
pafilon, ĉason li forĵetis? ;
"Tre longa estas historio!"

'13 Al mi malgaje li rediris, ;
Per griza kapo balancante, ;
Kaj li subite eksopiris, ;
Rakonti, ŝajne, ne volante.

'14 Sed jen silenton li ĉesigas ;
Kaj, cigareton ekfumante, ;
Komencis: "eble vi devigas ;
Min rakontadi, atendante

'15 Ekaŭdi ĝojan historion? ;
Se tiel estas, mi certigi ; Vin
devas, ke al vi nenion ; tre
gajan povas mi sciigi!"

'16 - Vi vane opinias, - ;
Rediris mi al maljunulo. ; "Ne
vane, ĉar mi bone scias, ; Pri
kio pensas eĉ junulo!"

'17 Kaj ree li eksilentinte, ;
Fiŝhokon sian plibonigis; Sed
post momento, ekĝeminte, ; Li
jam sen halto ekdaŭrigis.

'& Parto tria:

'18 "Aŭskultu. Antaŭ dudek
jaroj ; Mi ofte kun pafil'
ĉasadis, ; Kaj jen en tiuj ĉi
arbaroj ; Mi multajn tagojn
pasigadis.

'19 Ankoraŭ tiam troviĝadis ;
Multego da sovaĝaj kaproj, ;
Kaj en arbar' sin renkontadis ;
Eĉ ursoj kaj teruraj aproj.

'20 Jen iam vintre en mateno ;
Sur kampo, apud mem arbaro
; Ĉasistoj estis en kunveno. ;
Mi ankaŭ estis. Jam hundaro
.....

'21 De ĉeno forte sin ŝiradis ;
Kaj, ne havante paciencon, ;
Aeron frostan nur flaradis, ;
Sentante baldaŭ jam
komencon.

'22 Ni ankaŭ, ĉason atendante,
; malpaciencaj jam fariĝis, ;
Kaj, tre mallaŭte parolante, ;
En ĉeno ĉiuj ni stariĝis.

'& Parto kvara:

'23 Subite en densejo sonis ;
Trumpeto forta, - mi ekstremis:
; Per tio ĝi signalon donis, ;
Ke estas ursoj. Mi ekprem
.....

'24 Pafilon mian kaj instinkte ;
Nevole ĉirkaŭ-ekrigardis: ; De
mi porksime, sin arminte ; Tre
bone, oficiro staris.

'25 En manoj tenis li pafilon, ;
Ĉe zono larĝa kaj lakita ;
Pistolon hyavis kaj tranĉilon. ;
Mi estis tute konvinkita,

'26 Ke tiel brava militisto ;
Sendube estas kuraĝulo, ; Ke
vera estas li ĉasisto ; Kaj tial
estos ne timulo;

'27 Sed bedaŭrinde mi eraris! ;
Mi tamen devas plu rakonti. ;
Mi ĉe arbara rando staris ; Kaj
urson tie ĉi renkonti

'28 Mi tre esperis, ĉar mi scias
; Kutimojn ursajn. Jen mi
aŭdas, - ; Al mi "vin gardu" iu
krias. ; Antaŭen bone mi
rigardas

'29 Kaj, - kia granda
mirindaĵo! - ; Subite mi
proksime vidas ; Ursegon: ĝi
en arbitaĵo ; Senmove kaj
silente sidas

'30 Kaj kvazaŭ pensas, kien
devas ; Ĝi kuri? ĉie estas baro.

; Jen multepeze ĝi sin levas ;
Kaj tuj eliras el arbaro.

'& Parto kvina:

'31 Mi kelkajn paŝojn posten
faris, ; Min al pafilo jam
almetis, ; Kaj urson pafi min
preparis, ; Sed... ho, teruro! mi
faletis

'32 Je ŝtipo kaj subite teron ;
Mi tute falis kaj... ekpafis. ;
Por mi ekvidis mi danĝeron ;
Grandegan: urson mi ne trafis!
.....

'33 Ĝi tre rapide kun kriego ;
Sur min sin ĵetis kaj kun forto
; Min premis, ŝiris per ungego.
; Jam tre proksime estis
morto!

'34 Mi oficiron ekrigardis - ;
Kaj kun teruro mi ekvidis, ;
Ke li sin mem nur bone gardis,
; Ĉar li jam kuri for rapidis.
.....

'35 Tranĉilon preni mi
intencis, - ; Ne povis, ĉar min
urso premis. ; Mi fortojn perdi
jam komencis ; Kaj de doloro
mi nur ĝemis.

'& Parto sesa:

'36 Subite pafu! Urso saltis ;
De mi tuj, tute min lasinte, ;

Kaj ĝi de mi proksime haltis. -
; Jen liberecon eksentinte,

'37 Min levis mi kun
malfacilo, ; Al urso mem mi
alŝteliĝis ; Kaj ĝin ekbatis per
tranĉilo: ; En gorgon rekte ĝi
eniĝis.

'38 Mi bone trafis, - urso
mortis. ; Ĉasistoj ĉiuj tuj
kunvenis, - ; Sed mi malforton
ne elportis ; Kaj falis. Ili min
subtenis

'39 Kaj portis al glitveturilo ;
Subite vidas mi - aliris ; Kun
sia bela batalilo ; Jen oficiro;
li ekmiris:

'40 "Ho, kio tie ĉi fariĝis? ; Mi
estas tute ekfrapita! ; Sinjoro,
vi ekmalsaniĝis?" ; Per tio ĉi
indignita,

'41 Ekkriis mi: "arogantulo! ;
Vi ĉion tute bone vidis, ; Sed
vi, malnobla timemulo, ; De
mi forkuri ekrapidis!"

'42 Kaj en incito mi minuta ;
Min levis el glitveturilo ; Kaj
lin kun mia forto tuta ; mi tuj
ekbatis per tranĉilo.

'43 Mi videis sangon, aŭdis
krion, ; Sed mi nenion jam
komprenis, ; Ĉar tute perdis
mi konscion. ; Mi falis, - iu
min subtenis.

'& Parto sepa:

'44 Mi sen konscio longe
restis, ; Kaj kiam mi
ekkonsciiĝis, - ; en malsanejo
mi jam estis. ; Vespero jam
alproksimiĝis.

'45 Nenion tute mi komprenis.
; Tre longe kuŝis mi silente ;
Kaj ion rememori penis. ; Jen
venis iu. Tre atente

'46 Li ekrigardis min kaj diris:
; "Nu, ĉu pli bone vi vin
sentas?" ; Li tute ĝis mi mem
aliris, ; Murmuris: "bone, mi
kontentas..."

'47 Proksime li de mi sidiĝis ;
Kaj ekparolis: "nu, ĉasisto, ;
Vi eble jam ekprudentiĝis? ;
Respondos jam al esploristo?"
.....

'48 Je tio ĉi mi tre ekmiris ;
Kaj ne respondis; li daŭrigis: ;
"Al mi pli frue vi ja diris, ; Ke
lin sendube vi mortigis."

'49 Subite ĉion mi komprenis.
; Ekkriis laŭte mi, ekpenis ;
Min levi, - kaj denove svenis:
; Malsana korpo ne eltenis!
.....

'& Parto oka:

'50 Terure tempon mi pasigis!
; Kaj mia korpom kaj animo ;
Suferis... ho, de viv' senigis ;

Mi homon! Kun senfina timo,
.....

'51 Malpacience mi atendis ;
Severan juĝon, - mi ploradis, ;
Al Dio mi petegojn sendis, ;
Mi ĝemis, mi freneziĝadis!

'52 Sed baldaŭ tute mi saniĝis,
; Suferojn parte mi eltenis ;
Kaj nun pli forta mi fariĝis.
Kaj jen terura tago venis:

'53 Nun mi, anstataŭ
malsanejo, ; Kun malmodera
tremo vidis, ; Ke en majesta
mi juĝejo ; Sur benko de
juĝatoj sidis.

'54 Min puno tute ne timigus, ;
Mi ĝin eĉ volis en animo, ;
Ĉar sole ĝi min liberigus ; De
min preminta ŝarĝa krimo.

'55 sed mi timegis, ke ĵurintoj
; Min sen bedaŭro ekkulpigos
; Kaj de aliaj mortigintoj ; Min
tute ne diferencigos.

'56 Ho, Dio! mi, honesta
homo, ; Eterne estos
kondamnita ; Kaj mia
senmakula nomo ; De ĉiuj
estos mallaŭdita!

'& Parto naŭa:

'57 Jenekparolis prokuroro;
Mi tre atente aŭskultadis, - ;
Sed frapis forte mia koro, ;
Kaj mi nenion komprenadis.
.....

'58 Li finis; advokat' komencis
; Pravigi min, - li multe penis;
Kaj lin kompreni mi intencis, ;
sed vane: ree ne komprenis!

.....

'59 Nur tion bone mi sciiĝis, ;
Ke nun mi estas en juĝejo, ;
Ke malbonulo mi fariĝis ; Kaj
estos en malliberejo.

'& Parto deka:

'60 Ĵurintoj iris konsiliĝi, ;
Post ili ankaŭ nun juĝantoj ;
Eliris, - eble por nutriĝi. ; Mi
restis sola kun gardantoj.

'61 Duono pasis nur da horo, ;
Ĵurintoj dum konsiliĝadis, ;
Sed mia malfeliĉa koro ;
Centjaron kvazaŭ suferadis!
.....

'62 Priskribi, kiom min
turmentis ; En tiu temp' - ne
estas eble, ; Kaj kion tiam mi
trasentis, ; Por mi eĉ mem ne
kompreneble!

'63 Se povas vi vin mem
prezenti ; Starantan antaŭ
pafilego, ; Ekpafi preta, - kion
senti ; Vi devus, - mia jam
timego,

'64 Kredeble, estos
komprenita; Alie - tute kun
nenio ; Ĝi povas esti
komparita! ; Esperis sole mi je
Dio.

'65 Subite pordo malfermiĝis:
; Ĵurintoj kaj juĝantoj venis. ;
Al mi kapturino komenciĝis, ;
Mi ŝanceliĝis kaj eksvenis.

'& Parto dekonua:

'66 Konsciiĝinte, mi min
trovis ; Sur lito, hejme; min
domanoj ; Ĉirkaŭis, - mi do
movi povis ; Nek per piedoj,
nek per manoj,

'67 Ĉar tute mi ekmalfortiĝis. ;
De ŝarĝa krimo pravigita, ;
Honeste ree mi fariĝis, ; Sed
longe estis mi premita

'68 Sed longe estis mi premita
; Per tio, ke animo mia ; De

krimo estas pravigita ; Per
juĝo homa, sed ni Dia!

'69 De tiu tempo mi forlasis ;
Jam tute ĉason kun pafilo, ;
Kaj, krom fiŝhoko nur, mi
ĉasis ; Jam kun nenio
batalilo."

'70 Li eksilentis. Jam finiĝis. ;
Malluma nokto, kun rideto ;
Mateno roza proksimiĝis, ;
Nebulo flugis sur lageto.

'71 Kaj jen, levinte nin, de
lago ; Ni kun akiro nun foriris.
; Nur kiam venis hela tago, ;
Al domo mia mi aliris.)

& Vilmunda balado:

< Rekante 20 el 34 batoj por strofo, entute 2754 paŝoj dum 29 minutoj. Norda Kantaro #4405. El feroa tradukis Martin Strid (2014). Duoble tradukiĝis strofo '45. Klarigojn vidu post la strofoj.>

(#Melodio:

<1,6:34> (

/fami sofa fami mire; rere dore mimi; miimimi fami fami faso;
sofa fafamii redo;

(#Rekantaĵe: mimi fa mi re; rere dore mi; mimi mimi mi fa;so
sofa fami fami reldo; mimi fa mi re e)

)×81)+

(&Strofoj:

„& Unua parto:

'1 Aŭ/skultu la baladon kiun ;
bele aŭdigas lango ; dum mi
baladas pri bataloj ; glavoj
kantas en sango.

(×: **Dancu mastrino ; belan
elektas mi. ; Dancu min al
mano ; ja bele kiel povas vi2.
; Dancu mastrino.**)

'2 Nomata nome estis Jarmund
; reĝo de Gardaregno* ;
Jormund lia brava filo ;
malmultaj same degnas.

'3 Jormund estis reĝa filo ;
taŭga en ĉiuj portoj ; nomatas
lia stala frato* ; estis Vilmund
forta.

'4 Estis moro en Gardaregno ;
for en arbaron iri ; iris ĉiu en
sia klano ; boacojn kaptakiri.
.....

'5 Estis Jormund reĝa filo ; iris
for arbaren ; lin Vilmundo
poste sekvis ; ambaŭ por
ĉason fari.

'6 Densa kaj malhela nebulo ;
venis sur la landon ;
Vilmundo kaj reĝa filo ;
perdiĝis arbaron grandan.

'7 Iris en pli densa nebulo ;
estis peza paso ; vaste migris
sovaĝarbaron ; ĉio forigis de l'
ĉaso.

'8 Jormund longe perde migris
; antaŭ ke vojon trovis ; trafis
poste al la pado ; kaj kuri
domojn povis.

'9 Aŭdis bruon kaj
homparolon ; aŭskultis por
plia klaro ; reĝaj viroj sur
burgo staras ; vidis jen
ŝiparon.

'10 Vidis ŝipojn nigravelajn ;
laŭ la maro* glitas ;
komprenis laŭ malnova moro ;
malpacon ĝi invitas.

'11 Vidis grandan ŝipan aron ;
nigris korake* veloj ; nun
fariĝos ja batalo ; havenen ili
celas.

'12 Velis en la maro ŝiparo ;
albordis apud ŝtono ; kuris sur
la teron nigruloj ; ne postrestis
unu.

'13 Faris siajn armebudojn ;
apud maran randon ; ĉiuj estis
kruelaj nigruloj* ; survenintaj
landon.

'14 Sin preparis al batalo ; sen
malĝoje plendi ; dek duujn el
la nigruloj ; al burga hejmo
sendis.

'15 Rajdis haste kaj rapide ;
mesaĝon por kapabli ; tiel
venis en la halon ; reĝo sidis
ĉetable.

'16 Respondis unu el nigruloj ;
"Vi haltu manĝaĵon tranĉi ;
atendu dum mi la mesaĝon ;
de mia sinjoro lanĉu.

'17 Ŝildo vi min devas nomi ;
povas mi glavon gvidi ; mi
sendiĝis de Buro reĝo ; li
regas Nigrujon bride.

'18 Aŭdis li en iu momento ;
vi havas belan filinon ; neniuj
trovus en iu lando ; taŭgan pli
fraŭlinon."

'19 "Ne kuraĝas Buro reĝo ;
ŝin por peti stari ; mi preferas
estro esti ; kaj kiel ni diras
fari."

'20 "Se vi ne filinon vian ; al
lia mano portos ; ni ŝin prenos
de la burgo ; malsupren al la
bordo.

'21 Vi aŭskultu Jarmund reĝo ;
lin ne piku mave ; li fajrigos
vian burgon ; kaj vin hakos
glave.

'22 Ĉar ne havas vi robuston ;
kontraŭ li fieri ; via viv' je lia
graco ; kaj la oro kaj tero.

'23 Tio estus mortontfaro ;
kontraŭ li provoki ; lian
haŭton tranĉilo ne mordas ; pli
ol tranĉilo rokon.

'24 Vi ne havas homan viron ;
en lando sub ĉielo ; kiu
kontraŭ li kuraĝas ; stari en
duelo."

'25 Pelas sango al hejma reĝo ;
li ekternas plaŭde ; "Fanfaroni
ja malcertas ; kiu venkon
laŭdos.

'26 Jormund mia brava filo ;
gardas fratinojn karan ; ne
respondos mi hodiaŭ ; li
forestas arbore.

'27 Filo mia arbore forestas ;
al si ludon levas ; kiam li
venos hejmen al hal' ;
respondon li ricevos."

'28 "Ne estos bone al Buro
reĝo ; peti tempabundon ;
metos li fajron al via burgo ;
estingos vin kiel hundon.

'29 Li ne vojaĝos al via domo
; rivera ligna pompo ; li vin
prenos en siajn manojn ; kaj
vin en pecojn rompos."

'30 Tiuj fraŭloj rajdis for ; el
nigrulregno estis ; poste venis
reĝofil' ; novaĵojn lin oni
atestis.

'31 "Aŭdu Jormund, filo mia, ;
kion bonan konsili? ; Ĉu oferu
ni batalon ; kaj frapu kontraŭ
ili?"

'32 "Jes, oferu ni batalon ; sen
aliojn klopodi." ; Unua parto
kantita estas ; sed poste restas
por odi.

'33 Unua parto finita estas ;
longa fariĝas odo ; ekas ni
alian parton ; kaj aŭdos
epizodon.

„& Dua parto:

'34 Jormund igis kolekti
trupon ; kunen en noktvualo* ;
antaŭ ol eklumis tago ; pretis
li por batalo.

'35 Buro vekigis en sia loĝo ;
antaŭ ol lumis klare ; vokas
sian rabistaron ; ke ili baldaŭ
ekstaru.

'36 Rompis* el la loĝo ili ;
mordis ŝildojn dentoj ;
berserkoj* kaj karbmorduloj ;
burgon violentos.

'37 Jormund rajdis antaŭ trupo
; nigruloj volis egale ;
renkontigis sur kampa tero ;
kunrompis en batalon.

'38 Faris plej malmolan
batalon ; rompis ŝildojn,
glavojn ; kiu falis per du
ŝultroj ; morton sur tero havas.
.....

'39 Estis Jormund reĝofilo ;
plej duris en tumult' ; li faligis
el nigruloj ; bravajn virojn
multajn.

'40 Neniu liajn hakojn toleris ;
sed ĉiuj falis platon ; rajdis
profunde en armeon ; kaj
falĉis vastan straton*.

'41 Estis Jormund reĝofilo ;
impetis en armeo ; por si falĉis

vastan straton ; ĝis la
truptrofeo*.

'42 Ŝildo estis berserko kiu ;
nigrulan flagon havis ; kuris
kontraŭ Jormund li ; per lanco
celis mavi.

'43 Li pikis lin per taŭga lanco
; malbonis ĝin proksimi ;
Jormund saltis alte supren ;
kiel fari li kutimis.

'44 Lanco staris en tero fiksa ;
tiam li hezitis ; Jormund hakis
per ambaŭ manoj ; kiam li tion
vidis.

'45a Hako venis al du ŝultroj ;
vertebroj ek apartas ; tiam
falas berserk Ŝild' ; li kampe
kuŝis morta.

'45b Hako venis al du ŝultroj ;
disigis vertebrojn ; tiam falis
berserk Ŝild' ; li kampe kuŝis
funebro.

'46 Fendis Ŝildon berserkon li
; disen en partojn du ; tion
vidis Buro reĝo ; proksimis lia
situo.

'47 Kuris li kontraŭ Jormund
cele ; lian kapon fendi ; hakis
sur la oran kaskon ; grandajn
sparkojn sendis.

'48 Sparkoj flugis forĝejfajre ;
multis susuro brua ; flamo
fiksiĝis en arbaro ; ekbrilis
fajro detrua.

'49 Tiam aŭdeblis longan
vojon ; bruo de batal' ;
Jormund reĝofilo trovas ; ke
lin ne mordas ŝtal'.

'50 Jormund reĝfil' glavon
svingis ; uzas forton ĉion ;
hako venis Buron reĝon ; sur
la nudan kranion.

'51 Hako venis nudkranion ;
kiel glita tuŝo ; plukis nazon,
makzeloston ; dentoj elstaris
el buŝo.

'52 Reĝofilo laca malvarmis ;
ĉar vundojn ricevis li ; svenis
sur la verdan kampon ; en
longa senkonscio.

'53 Falis nun armeo burga ;
kriis nigrular' ; puŝis antaŭen
akraglave ; kaj fajron al burgo
faris.

'54 Vilmund arbare perda estis
; nun al haloj venis ; ek
nigrulojn kaj la farojn ; iliajn
li komprenis.

'55 Vilmund nun eksciis pri ;
ĉe burgo batalo ruĝa ; pri
reĝofilo faligita ; kaj homoj
malĝoje fuĝas.

'56 Tiuj novaĵoj al li venis ;
lian sangon ekscitis ; rapidas li
en granda kolero ; kaj vestas
sin por militi.

'57 Vilmund prenas dikan
kaskon ; sur sian kapon metas
; kaj kvaroblan kirason ringan
; tiel heroo preta.

'58 Estis Vilmund, alta heroo ;
lia sango varmis ; li rapidis al
batalo ; kiu lukton armis.

'59 Li terure premis antaŭen ;
perlance kaj perglave ;
kuraĝigis tiujn ki fuĝis ;
returni kontraŭen brave.

'60 Vilmund kuris armeon
antaŭen ; dishakis li kirasojn ;
kuris kontraŭ la nigruloj ; ili
lin fuĝis amase.

'61 Ne toleri povis kaskoj ;
kion Vilmund faris ; fendis
bruston, fendis ventron ; pinto
en teron staris.

'62 Vilmund impetis en
armeon ; Buro vidis perdon ;
falas nigruloj de piedoj ; kiel
falĉe herbo.

'63 Kuris li tiam kontraŭ
Vilmund ; kontraŭ lia avanco ;
unu l' alian dure frapis ; per
kaj glav' kaj lanco.

'64 Hakis dense vivovigle ;
jam batalbordune ; fajro fumis
el glavoj kiam ; eĝoj klakis
kune.

'65 Buro reĝo glavon svingis ;
baton alvilmundan ; hako
venis en vizaĝon ; verŝis
sangon multan.

'66 Kiam Vilmund ekvundiĝis ;
svingis li sen brid' ; palpas
trovi Buron reĝon ; granda la
rapido.

'67 Palpis trovi Buron reĝon ;
granda lia hasto ; glavo flugis
el la manoj ; en arbaron
vastan.

'68 Glavo flugis longan vojon
; mane ĝi ekmankis ; palpas li
post la hakilo ; kiun fiksas
flanke.

'69 Vilmund svingas la
hakilon ; bonis ĝi sen rusto ; li
ekbatas Buron reĝon ; ŝtalo
staris el brusto.

'70 Ne ĝis la toraka osto ;
kiam trafis haŭton ; reĝo donis
grandan krion ; ekstere kaj ene
laŭtan.

'71 Buro reĝo ekvundiĝis ;
grandan krion liveris ;
Vilmund uzis ambaŭ manojn ;
ŝtalo ne toleris.

'72 Pezis hako hakmartela ;
maleraris lerte ; kasko
rompiĝis de Buro reĝo ; staris
martelo en verto.

'73 Kiam Vilmund faligis ;
Buron reĝon teren ; li sin
kontraŭ nigruloj turnis ; kaj
ĉiujn for konkeris.

'74 Prenis aĵojn, armevestojn ;
vaste kampe kuŝis ; prenis
oron kaj trezorojn ; ne
nombreblis buŝe.

'75 Prenis oron, armevestojn ;
ne nombreblis buŝe ; venis ili
al Jormund ; vidis kie li kuŝis.
.....

'76 Kiam en li vivforton sentis
; malpezis kormalĝojo ; sub
lin sternis larĝan silkon ; kaj
portis en burgon voje.

'77 Portis hejmen kaj metis lin
; en liton sub domtrabo ; "Nun
transprenu, bona fratino ;
flegu malsanan knabon."

'78 Ŝi dum tagoj flegis lin ; kaj
flegis lin dum du ; sesan tagon
de sepa semajn' ; li iris kirason
bluan.

'79 Sesan tagon de sepa
semajn' ; li iris kirason bluan ;
ŝi kondukis lin en la halon ;
knabon vidi 'stis ĝuo.

'80 Sesan tagon de sepa
semajn' ; lin vestis kiraso nova
; ŝi kondukis lin en la halon ;
knabon vidi povan.)

<& Klarigoj al Vilmunda balado:

Feroa dancobalado.

Toreshavenan version notis
Marius Jóanesarson. Duoble
tradukiĝis strofo '45.

(*):

'2 Gardaregno: Aro da kortoj
aŭ fortikaĵoj (alivorte burgoj)
de svedaj vikingoj laŭ riveroj
en hodiaŭaj Ukraino kaj
nordokcidenta Rusujo. Origina
ĉefurbo estis Holmgård (=
Novgorodo), poste Kievo kaj
nuntempe Moskvo.

'3 Frato: Metafore pri ĉevalista
kunlaboranto.

'10 Maro: Gardaregno ne
situis ĉe maro sed laŭ riveroj.
Sed Ferooj, kie travivis ĉi
balado, estas maraj insuloj sen
veleblaj riveroj.

'11 Korako estas tute nigra
birdo kaj do metaforas pri
nigreco.

'13 Kruelaj: timigaspektaj.
Nigruloj: Temas pri malhela
haŭtkoloro, kvankam ne
certas, ke tio estas historie
korekta.

'34 Noktvualo: nokta malhelo.

'36 Rompis: ŝire kaj subite
malfermis. ; Berserko:
amokulo, heroo freneze
luktema, maltimanta morton
kaj eĉ mordanta sian ŝildon
manie.

'40 Strato: Senbara trairejo.

'41 Truptrofeo: La feroa
originalo diras na
"merkismann", tio estas
markulo, do tiu kiu portas la
signon de la trupo. >

& Sigmunda balado malnova:

< Rekante 18 el 31, 26 el 34 kaj 25 el 33 batoj por strofo, entute 2829 paŝoj dum 32 minutoj. Tri partoj kun ĉiu siaj melodio kaj rekantaĵo. Norda Kantaro #4409. Klarigojn vidu post la strofoj.>

(#Melodio:

<1,5:>

,# Unua parto: <:31> (/mi mi dolre mi mi mido re lfa; mimimi mimimi mido re lfa; mire do do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do)×25

,# Dua parto: <:34> (mi /mimido dododo rere re3;re so sofa mi; mimi mimimi mimimi re;mi fa3mi re do o; mi mi3do dodo re re;re so sofa mi3;mi mimi mimimi mimimi rere;mi fami re do)×21

<[mi:La]>

,# Tria parto: <:33> (/La Ti do TiTi LaSo Mi; LaTi dodoTii LaLaSo Mi; Mi DoRe Mi LaTi doTi La; La La SoLa Ti TiTi LaSo Mi; LaaTiTi doTi LaSo Mi; Mi DoRe Mi LaTi doTi La)×41)+

(&Strofoj:

,& Unua parto:

'1 /Norvege2 loĝas brava ho2m' ; Olavo Trigvafil' lia no2m'.

(×:; Norvegoj, dancu nun trankvile* ; ĉiuj ni trankvilas ; rajdistoj, norvegoj ; dancu nun trankvile.)

'2 Olavo2 reĝo ĥriston donacas ; dion kaj novan mildan gracon*

'3 Olavo2 vokas al fraŭloj du2 ; "Venigu Sigmundon en jarfru2'."

'4 Antaŭ o2l ili duondiri kapablis ; Sigmund jam estis endome ĉetable.

- '5 Sigmund fa²ligas sur
genuojn si²ⁿ* ; "Ĥristbenon,
kion vi volas mi²ⁿ?"
- '6 La reĝo² prenas Sigmundan
manon ; "Mi vin donas
duonon de Feroa lando.
- '7 Vi vo³jaĝu al Ferooj vaste ;
kaj vin sekvos Tangbrand
pastro.
- '8 En Ferooj loĝas finna homo
; Trondo en Geŭto* lia nomo.
.....
- '9 Trondo e²ⁿ Geŭto lia nomo
; kara Sigmund, igu al mi l'
homon."
- '10 Sigmundo² tiel ekparolas ;
"Li ne facile al vi volas."
- '11 "Ĉu esta^{2s} li fortika
luktulo ; aŭ li estas
sorĉmanipula?"
- '12 "Ne esta^{2s} li fortika
luktulo ; pli li estas
vergmanipula*."
- '13 Iris i²li laŭ sabla strando ;
kie ŝipoj naĝas marorande.
- '14 El golfo² lanĉis ili tu^{2j} ;
plej bonan ŝipon en
Norvegu^{2j}'.
- '15 Sigmund pe^{2r} sia ŝipo
vojaĝis ; plej bona ŝipo ki
norvege naĝis.
- '16 Rompas si²ⁿ maro kiel
grundoagre^{2s}* ; "Tenu rekte
al Lujandisne^{2s}*.
- '17 Tiel Si²gmund larĝan
fjordon velas ; al Geŭto ili
hejmen celas.
- '18 Li vela^{2s} dum tagoj, li
velas dum du² ; la trian
ekvidis Feroojn de pru²'.
- '19 Maro o²ndrompas en fluo
defia ; zorgas neniel Sigmund
tian.
- '20 Rompas si²ⁿ maro kiel
grundoagre^{2s}' ; "Tenu rekte al
Mjoŭane^{2s}*.
- '21 Maro nu²ⁿ estas flava kaj
blua : sablo ferdeke
surtabulas.
- '22 Tiam te²mpestras maro kaj
tero ; "Nun fariĝis Trond
kolera."
- '23 Dum unu² nokto kaj tagoj
du² ; Geŭton eksteris
Sigmunda pru²'.
- '24 "Kvankam ni²ⁿ kostu
vivoforton ; ni ne atingas
Geŭtan bordon.
- '25 Ni ne a²tingas Geŭtan
bordon ; Trond skuas kontraŭ
ni vergon."

,& Dua parto:

'26 /Duan mi parton ekprenos
nun

(×:; **forgesu ne min** ;)

velos urĝe al Svujnojo* tuj

(×:; **Mi paŝas gaje. ;**

Danciĝas jen al kredo ;

**forgesu ne min ; jen dancas
kaj junulinoj, fraŭlinoj ; mi
paŝas gaje.)***

'27 En Svujnoj loĝas brava
hom' Bjarn kampulo lia
nom'.

'28 Sigmund en maro turnis
ŝipon preskaŭ sinkis tuta
 ekip'.

'29 Sigmund velas en Svujnoja
fjord' ŝipo kurbis kiel
selkord'*.

'30 Sur blankan sablon li
ankron ĵetas Sigmund
unua sur teron tretas.

'31 Harald faligas genuen sin
..... "Ligfrato, lasu min sekvi
vin."

'32 "Vi ne iros teron skipe
ĉar vi kaŝos mian ŝipon."

'33 Kiam li venis al
kampuldom'. kuŝis dorme
ĉiu hom'.

'34 "Ne venis mi jam al
Svujnoja bord' Nun
kampulan mi rompos pordon."
.....

'35 Ne sciis Bjarno ĝis tiu
moment' Sigmund havis
lin je atent'.

'36 Mastrino paŝis en robo
fronten "Ne faru vi tiom
grandan honton.

'37 Ne tiom fariĝu vi granda
hont' de maljunulo
mortigont'."

'38 "Se li Bjarno ĥristaniĝos
..... mi neniom lin damaĝos.
.....

'39 Bjarno, iru verdan valon
..... diru min kie patro falis!"
.....

'40 "Mi donis vin vivon, jen
bona sort' Trond vian
patron batigis al mort'."

'41 Jen kampula unua vort'
lasas nun tablen manĝon porti.
.....

'42 Enportis ili sur pladoj sep
..... bovan flankon kun pana
cep'.

'43 Jen kampula dua vort'
lasas trinkaĵojn al tablo porti.
.....

'44 Enportis sur la blanka lin'
..... bieron kruĉe, da medo kaj
vin'.

'45 Ili festis tiam en ĝu'
dancis kaj trinkis dum tagoj
du.

'46 Tion faris Sigmund dum
tie restis li baptis Bjarnon
kaj tutan la neston.

,& Tria parto:

'47 Trian parton mi ekos nun ;
velos urĝe al sudo kaj Dujm'*

(×: **Dum bone staras tilio
jen, ; tilio min staras en
patra bien', ; tute ĝi rozojn
estas ben', ; dum bone staras
tilio jen.**)

'48 Sigmund velas en
Hovdasund'* ; renkontas lin
Trond kaj Toro Hund'*.

'49 "Aŭskultu reĝo feroan': ;
Ĉu volas plu resti vi pagan'?"
.....

'50 "Ne cedas mi de mia
malnova kred'* ; ĉar mi estas
tiom aĝa bred'."

'51 Sigmund ĵetas lancon
respond' ; Renversigas boaton
Trond

'52 Tiu aŭguro nova malbonis
; ke al Trond li vivon donis.
.....

'53a "Nun vi venkon el manoj
perdis ; venĝon atendu kaj
finon merdan.

'53b Nun venkon perdis vi el
via mano ; urĝas nun venĝo
kaj fino vana."

'54 Sigmund velas en
Skuvoja* fjord ; ŝipo kurbis
kiel selkord'

- '55 Ferdeke staras fidindulo ;
"Tenu nun orientinsule."
- '56 Sigmund iras al ambaŭ
lokoj ; "Tenu nun rekte al
Verdaroko."
- '57 Harald faligas genuen sin ;
"Ligfrato, lasu min sekvi vin."
.....
- '58 "Vi la teron ne surpaŝu ; vi
la ŝipon mian kaŝu."
- '59 Sigmund en manon prenas
ŝnuron ; kaj kun lanco li teron
kuras.
- '60 Ĵetis li supren al verda
grund' ; pinto resonis en
rokprofund'?'ŝtonprofund'.
- '61 Tridek klaftojn* altis
montmur' ; Sigmund levis sin
per ŝnur'.
- '62 Survoje du mastranoj kuŝis
; urĝa morto ilin tuŝis. ?
- '63 Sigmund tute ne hezitas ;
Rokmonteten sin invitas ?
hejmvizitas
- '64 Sojle mastrino Gudrun
envenis ; "Vidis mi viron alte
preni."
- '65 Belis li en kresko blanka ;
brilas oro ŝultroflanke."
- '66 "Vidis vi viron alte preni. ;
Li ne ĉiestis julmatene.
- '67 Li ne ĉiestis julmatene ;
urĝas nun ne dormi jen."
- '68 Eŭso kuris malfikson
novan ; kvar maldikaj eniri
povis.
- '69 Ĵetas armilojn ĉiujn tuj ;
kuras kun viroj naŭ en burg'.
.....
- '70 Viroj naŭ kaj maruloj dek
du ; ĉiuj ek burgon defendas
nun.
- '71 Eŭso staras ĉe burga
dekliv' ; sin apogas per larĝa
hakil'
- '72 Sigmund sin levas tien kaj
re ; burgoriente li luktis tre
- '73 Burgoriente li luktis plu ;
virojn li venkis de Eŭso du.
.....
- '74 Eŭso staris rigardis al ĝi ;
"Ne tiel iru homoj pli."
- '75a Ambaŭ frape kunseveris ;
ĉiu povus alian konkeri
- '75b Ambaŭ kunfrapiĝis gajne
; venki povus iu ajn.
- '76 "Nun mi prenos apartan
ruzon ; min Olav reĝo instruis
uzi."
- '77 Li malfermŝilde luktis ek ;
piedon for kaj mano sekvis.
.....
- '78 Eŭso parolas el granda
neceso ; "Vi min al pintoroko
adresu."

'79 "Tion vi petu de mi per
buŝo ; vi okcidente en tero
kuŝos."

'80 Ĝi estis Eŭsa lasta vok' ;
"Kapo turniĝu al Verdarak'.
.....

'81 Piedojn ale, kaj kapon
male ; ke rokon rigardu mi
postfale."

'82 Sigmund en Skuvo sekure
sidas ; Trond lian vivon gvate
vidas.

'83 Sigmund milda, en virtoj
ranga ; malbonfarulo lin
gvatas sangon.

'84 Sigmund por dio kaj
bonfara akord' ; devis naĝi en
Sudinsulfjord.

'85 Sude en Sudinsul'
Sigmund mortiĝis ; norde en
Skuv li enteriĝis.)

<& Klarigoj al Sigmunda balado malnova:

Feroa balado malnova,
rakonta daŭrigo post Bresta
balado. Tradukis Martin Strid
(2014). Duoble tradukiĝis
strofoj '53 kaj '75.

(*):

'1 Trankvilo: ankaŭ senvento.

'2 Trajto de ĥristanismo estas
pardonigo.

'5 Oni surgenuas por montri
sian humilon.

'8 Gøtu: vilaĝo en Eysturoy
(Feroa Orientinsulo).

'12 Vergo: magia.

'16 Grundoagreso: Kie ondoj
rompiĝas pro plata roko
malprofunde en la maro. ;
Líðandisnes: malgolfo en
orienta parto de Ferooj.

'20 Mjóvanes: suda kaj plej
orienta malgolfo de Eysturoy.

'26 Svìnoy (Porkinsulo):
nordorienta insulo en Ferooj. ;
La rekantaĵo de dua parto
estas lingve miksaĵo de dana
kaj feroa.

'29 Selkordo: Selrimeno.

'47 Dímun: du malgrandaj
krutaj insulaj en sudo de
Ferooj.

'48 Hovdasund': markolo ĉe
norda pinto de Sandoy (Feroa
Sablinsulo). ; Hundo: fiulo,
malhonora.

'50 Malnova kredo:
paganismo asa, inter kies
ĉefdioj estas Votano (Oðin)
kaj Toro (Þórr).

'54 Skúvoy (Insulo de Granda
Rabmevo): suda insulo en
Ferooj, sude de Sandoy.

'61 Alto 30 klaftoj estas
proksimume 54 metroj. >

& Havamal:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 2871 paŝoj dum 32 minutoj. El praislanda tradukis Baldur Ragnarsson (Norda Prismo 3, 1956) strofojn numeritajn kun r kaj ceterajn Erling A. Haugen (Islanda antologio, rete kompilis Eysteinn Sigurðsson, novembro 2000). Baladigis Martin Strid per melodio de & Drako Longa kaj rekantaĵo de & Davida balado. Klarigojn (*) vidu post la strofoj.>

(#Melodio:

<1,5:29> (

/mimi mire; reedododo dodo; dodo dore miimi;mi miimimi mimi;
miimimi mimi; soso fami mimi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire; do rere re; rere mire doTi LaSo So
LaTi do o)

)×99)+

(&Strofoj:

'1r Enrigardu ; antaŭ ol eniri, ;
zorge kaj atente. ; ĉar oni ne
scias ; ĉu malamikoj ; sidas
sur la benkoj. (×: **Bruas
danco en halo, ; Dancu en
ĉen! ; Ĝojaj paŝas ni en
esperanto-kunven'**.)

'1 Antaŭ ol pordon ; pasi en
domon, ; taksu, atentu la
kaŝojn* ; ne multe vi scias, ; ĉu
malamiko ; sidas sur benko
embuske.

'2 Sanon, gemastroj! ; Serĉis
vin gasto! ; Kie li sidu kaj
kiel? ; Li sentos inciton, ; se
sur staplo da ligno ; li devos
eldiri mesaĝon.

'3r Varmon bezonas ; enirinto
; kun genuo frosta. ; Manĝon
kaj veston ; bezonas viro ;
transirinta monton.

'3 Li varmon bezonas, ; se li
venis en domon ; kun kruroj
fridaj de frosto. ; Veston kaj
manĝon ; la viro bezonas, ; se
li vagis sur monto kaj marĉo.
.....

'4r Akvon bezonas ; veninto al manĝo, ; viŝtukon kaj bonvenon, ; amikan konduton, ; parolon kaj aŭskulton, ; se haveblas tio.

'4 Akvon kaj tukon ; li trovi bezonas, ; se plaĉe vi petis al tablo, ; decan afablon ; vi devas montri ; kun parolo kaj lerta silento.

'5r Saĝon bezonas ; multvojaĝanto. ; Facilas hejme ĉio. ; Ridindiĝas ; nesciulo ; sidanta kun saĝulo.

'5 Vartu la scion, ; se vaste vi vojas, ; vi hejme vin helpas facile; flankrigardojn vi spertas, ; se vi scias nenion ; dum kune kun saĝaj vi sidas.

'6 Pri propra scio ; pavu neniu, ; prefere montru sin meza; se vi dece senfrazo ; domon alvenas, ; vi ne mankon de scio sentas.

'7 Viro singarda, ; gaste veninta, ; sidas kaj takse observas, ; uzas l'okulojn, ; ankaŭ l'orelojn, ; tiel sin tenas la saĝa.

'7r La atenta gasto, ; veninta al manĝo, ; atentas kaj silentas, ; auŝkultas orele, ; rigardas okule, ; jen konduto saĝula.

'8 Feliĉa li, ; kiu laŭdajn vortojn ; aŭdas inter la homoj; vi tamen ne konas, ; ja kio sin kaŝas ; ene de ies brusto.

'9 Feliĉa li ; kiu lernis mem ; juston kaj virtojn de l'vivo; ĉar misan konsilon ; multaj prenis ; laŭ urĝo de iu alia.

'10 Pli bonan pezon ; ne portas viro ; ol multe da sana saĝo; ĝi en fremda loko ; pli karas ol oro, ; konsolo de senhavulo.

'11 Pli bonan pezon ; ne portas viro ; ol multe da sana saĝo; pli aĉan voj-nutron ; vi ne kunprenas ; ol tro da trinko biera.

'12 Ne bonas, kiel ; ja kredas multaj, ; biero por viro, vere; ju pli li trinkas ; des pli li trenas ; de l'kapo la simplan saĝon.

'12r Ne tiel bonas ; kiel dirate ; vino al viroj. ; De menso perdas ; kun plia drinkado ; viro kontrolon.

'13 Ardeo de forgeso ; gvatas drinkrondon, ; ĝi ŝtelas de l' viroj la saĝon; en ĝiaj plumoj ; mi perdis la sensojn ; gaste en domo de Gunnlöð*.

'14 Ebria mi iĝis, ; eĉ ege ebria, ; foje ĉe saĝa Fjalar* ; plej bona festo, ; se vi fine ĝin lasas ; sobra kun sanaj sensoj.

'15r Silenta kaj atenta ; estu viro ; kaj brava en batalo. ; Ĝoja kaj gaja ; li ankaŭ estu ; ĝis la fina morto.

'15 Saĝa kaj inda ; estu reĝido, ; sen timo li tiru la glavon ; ĝoja, bonvola ; la viro sin tenu ; tute ĝis tago morta.

'16 La povra ulo ; penas por vivi, ; evitas vokojn al lukto ; sed aĝo ne donas ; al iu pacon, ; eĉ se ne gajnis lin glavo.

'16r Viro malsaĝa ; kredas sin vivi ; batalon evitante. ; Sed ne indulgas ; lin maljuneco, ; kvankam lancoj indulgas.

'17 Gapas stultulo ; gaste veninta, ; jen mutas kaj jen murmuras ; se gluto da trinko ; glitis tra-gorĝe, ; senhalte li brue babilas.

'18 Scias nur viro ; kiu vaste vagis ; kaj multe en landoj migris, ; kial li bone ; bridu la langon ; kaj sciu kion li scias.

'19 Medon ne ŝparu, ; sed multon ne trinku, ; diru la decan aŭ mutu ; neniuj povas ; riproĉi vin, ke vi ; frue finas por dormi.

'20 La vora viro ; sen volo moderi ; manĝas al si amarojn ; ofte al viro ; la ventro kaŭzis ; ridon en gajaj rondoj.

'20r Manĝegulo ; ne tenante prudenton ; manĝas sin al morto. ; Ridigas saĝulojn ; manĝegemo ; de viro malsaĝa.

'21 Grego ĝust-hore ; hejmen ekiras ; kaj lasas la grasan greson* ; viro malsaĝa ; scias neniam ; mezuron de sia stomako.

'21r Scias brutaro ; kiam hejmeniri, ; kaj el paŝtejo iras. ; Sed malsaĝulo ; scias neniam ; finon de manĝado.

'22 Povrulo, mem ; mise kreita ; ĉiam je ĉiu ridas ; li konas ne, kion ; li koni devus, ; proprajn misojn kaj mankojn

'23 Viro malsaĝa ; sin vekas dumnokte ; kaj pensas pri propraj zorgoj ; li lace sin levas ; de l'lito matene, ; kaj zorgoj lin pezas plu.

'23r Viro malsaĝa ; maldormas
dum nokto ; kaj ĉion
cerbumas. ; Tial lacas ; li en
mateno. ; Samas kiel antaŭe.
.....

'24r Viro malsaĝa ; kredas
ĉiujn ; ridantojn amikoj. ; Li
ne komprenas ; mokajn
parolojn, ; sidanta kun saĝuloj.
.....

'24 Viro malsaĝa ; vante
kredas ; je ĉiuj afablaj flatoj ; li
tute ne vidas, ; ke teksas retojn
; al li liaj lertaj kunuloj

'25 Viro malsaĝa ; vante
kredas ; je ĉiuj afablaj flatoj ;
tamen li trovas ; en tingo*
starante, ; ke mankas apogaj
pledoj

'26 Viro malsaĝa ; sentas sin
saĝa ; sola en sia angulo ; li
tute ne trovas ; taŭgan
respondon, ; se fremdaj faras
demandon

'27 Viro malsaĝa, ; se li sidas
kun homoj, ; prefere fermu la
buŝon ; ĉar lian nescion ;
sentas neniu, ; se li sian buŝon
bridas

'28 Saĝa li, ; kiu scias
demandi ; kaj peri informon
plu ; ne eblas kaŝi ; jam kio
disiĝis ; kaj estas inter la
homoj

'29r Multajn vortojn ;
sensencajn diras ; neniam-
silentanto. ; Lango rapida ; sen
haltigo deca ; oftigas
malbonon.

'29 Vortoj diritaj ; de viro
klaĉema ; ne faras al iu fidon ;
lango rapida ; pene bridebla ;
ofte alvokas veojn.

'30 Ne metu al iu ; moka
rigardon, ; se ofte li iras gasti ;
sentas sin saĝa, ; kiu sidas sen
taŭzoj, ; ĉar neniu metis
dandojn.

'31 Sentas sin saĝa, ; kiu savis
sin for ; gasto mokinta gaston ;
liute ne konas, ; kiun li
mokis ; kaj ĝenis malĝustan
viron.

'32 Multaj amikoj ; senmanke
fidelaj ; ĝis ili ĉe-estas
festenon ; eterna malpaco ;
povas ekesti, ; se gasto
kverelas gaston.

'33 Taŭge manĝu ; matenan
manĝon ; antaŭ ol iri gaste ; vi
tiam ne sidas, ; malsate enuos
; kaj povas apenaŭ paroli.

'34r Malrekta vojo ; al
malamik' ; kondukas*,
kvankam ĉefvojo. ; Sed al
amiko, ; kvankam ekstervoja, ;
rektvojo kondukas.

'34 Kurbas la vojo ; al vantaj amikoj ; eĉ se laŭ strata strio ; sed rekta, senbara ; al bonaj amikoj, ; eĉ se en vasto sovaĝa.

'35r Indas foriri, ; gasto ne restu, ; samloke ĉiam. ; Plaĉulo tedas ; sidanta tro longe ; sur alies benkoj.

'35 Jam decas adiaŭi, ; vi devas ne resti ; tro longe en unu loko ; kara sin turnas ; en teda, se iu ; ne lernis forlasi benkon.

'36 Loĝo pli bonas, ; eĉ budo eta, ; en hejmo vi mastras mem ; kun paro da kaproj ; kaj kovro ŝnurtraba ; vi ne devas migre almozi

'37 Loĝo pli bonas, ; eĉ budo eta, ; en hejmo vi mastras mem ; sangas la koro, ; se kline vi devas ; almozi por ĉiu manĝo.

'36r Havi farmejon, ; kvankam malgrandan, ; viron mastrigas. ; Kaprino kaj ĉambro ; malriĉe tegita ; superas almozpeton.

'37r Havi farmejon, ; kvankam malgrandan, ; viron mastrigas. ; Sangas ties koro ; kiu devas peti ; manĝon por ĉiu fojo.

'38 De viaj armiloj, ; viro, sur kampo ; ne iru eĉ unu paŝon ; vi tute ne scias, ; ĉu sur via vojo ; vi devos vin glave gardi.

'39 Ne tiel bonvolan ; viron mi vidis, ; ke ne li akceptis donacon, ; nek tiel malzorgan, ; pri sia havaĵo, ; ke ne danke li prenis pagon.

'40 Sian havaĵon ; zorge ŝparitan ; la viro ne kovu en kesto ; vi planas ĝojigon, ; sed prenas ne indaj, ; ofte ne iras laŭ plano.

'41 Per armiloj kaj vestoj ; amikon ĝojigu, ; ĉar tiujn li povas porti ; per donoj egalaj – ; daŭraj amikoj, ; se akordas aliaj rilatoj.

'42r Al amiko ; oni estu amiko, ; donaco pro donaco. ; Ridon je rido ; viroj transdonu, ; sed falson je mensogo.

'42 Al via amiko ; vin montru amike, ; decas dono por dono ; ridon por rido ; reen prezentu, ; falson faru por falso.

'43 Al via amiko ; vin montru amike, ; kaj tiel al ties amiko ; tamen amiki ; al ties malamiko ; ne konvenas al vera amiko.

'44 Se vi konas amikon, ; al kiu vi fidas ; kaj volas de li favoron, ; vi devas komuni ; kaj doni donacojn ; kaj ofte iri lin gastu.

'45 Se vi konas alian, ; sed kiun vi dubas, ; kaj volas de li favoron, ; plaĉe parolu ; kaj pensu false ; kaj falson frapu per falso.

'46 Kaj plue pri kazo, ; en kiu vi dubas, ; kaj kaŭzon donis por dubo, ; ŝercu kun li ; kaj ŝajne amiku, ; donu egalajn donojn.

'47 En mia juneco ; mi migris sola, ; vage mi perdis la vojon ; riĉo min trafis, ; mi trovis kunulon, ; homo ĝojigas homon.

'48 La mildaj kaj fortaj ; fartas plej bone, ; ne ofte malbonon bredas ; viro ne taŭga ; timas ĉion, ; avaras, se devas doni.

'49 Vestojn miajn ; mi metis jen sur ; du lignajn virojn* ĉe vojo ; indaj uloj ; ili fariĝis, ; hontas homo nuda.

'50 Velkas pino ; en vasto sola, ; ŝirmas nek ŝelo nek pingloj ; same la viro ; sola sen amo, ; kial vi vane vivu?

'51 Fajro brulas ; ĉe falsaj amikoj ; kvin tagojn da tempo ĝoja, ; la ardo velkas ; ĉe veno de l'sesa, ; kaj mortas amikaj sentoj.

'52r Doni multon ; ne ĉiam nepras ; por rikolti laŭdon. ; Per pano duona ; kaj kruĉo neplena ; akiris mi amikon.

'52 Multon doni ; ne devas la viro, ; ofte la eta efikas ; per tranĉo da pano ; kaj trinka restaĵo ; mi havis homan kuniĝon.

'53 Etaj flusoj, ; etaj faloj, ; etaj eĉ multaj mensoj ; ne ĉiuj laŭ sorto ; en saĝo egalas, ; estas ja ambaŭ specoj.

'54r Saĝon serĉu ; ĉiuj viroj, ; ĝi neniam troas. ; Pleje ĝuas ; vivon viroj ; sciantaj multon.

'56r Saĝon serĉu ; ĉiuj viroj, ; ĝi neniam troas. ; Sorton sian ; neniu pripensu, ; senzorgas do al menso.

'54 Meze saĝa ; sin montru la viro, ; neniam li super-saĝu ; plej belan vivon ; vivas la viro, ; se iom pri ajn li scias.

'55 Meze saĝa ; sin montru la viro, ; neniam li super-saĝu; malofte li ĝuas ; la ĝojojn de l' vivo, ; se li sorbis tro multe da scio.

'56 Meze saĝa ; sin montru la viro, ; neniam li super-saĝu; kiu ne scias ; pri sia sorto, ; pace kaj plene vivas.

'57 Brulo sen baro ; brulas ĝis cindro, ; fajro plu faras fajron; de viro al viro ; venas la scio, ; ĝi haltas ĉe homevitulo.

'58 Frue vin levu, ; se alian vi volas ; je vivo kaj riĉoj rabi; ne lupo kuŝanta ; lumbon akiras ; nek viro dormanta venkon.

'59 Frue vin levu ; se farmojn vi gardu ; kaj ordon en kampo kaj korto; multon fuŝas ; malfrua leviĝo, ; urĝa, – duone riĉa.

'60 Ŝarĝon da ligno ; kaj ŝelon tegmentan ; viro taŭgu por taksi; kaj kvanton da ligno, ; kiom por hejti ; dum daŭro de duon-jaro.

'61 Lavita kaj sata ; venu al tingo ; eĉ se en aĉaj vestoj; pantalon' kaj ŝuo ; ne lasu vin honti, ankaŭ ne ĉevalo,*

'62 Kun klino malgaja ; gvatas sur-borde ; aglo al olda maro; jen tiel matene ; en tingo la viro, ; se mankas pleda apogo.

'63 Demandi kaj diri ; devas la viro, ; se strebas nomiĝi saĝa; unu scias, ; ne aŭdu dua, ; se tria, jam tuta mondo.

'64 La saĝa viro ; sian potencon ; uzas kun deco kaj digno; ofte li trovas ; ke inter bravuloj ; neniu sin sentu plej supra.

'65 (Ofte vortojn ; vante diritajn ; viro pente pagis.)×
.....

'66 Longe tro frue ; multloke mi venis, ; tro tarde en lokoj aliaj; jen medo finiĝis, ; jen, male, ne pretis, ; la teda malofte trafas.

'67 Kelkfoje al tablo ; trudis min oni, ; eĉ se mi sentis min sata; aŭ pendis du klaboroj ; ĉe kara amiko, ; kaj mangiŝ mi unu el ili.

'68 Fajro bonfaras ; al filo homa, ; kaj vido de varma suno; kaj sian sanon ; li savas bona ; kaj vivas sen korpa kriplo.

'69 Sed ne tute mizera ; sin
sentu la kripla; iuj pri filoj
fieras, ; iuj pri parencoj, ; iuj
pri riĉo, ; iuj pri fama faro.

'70 Prefere vivi ; ol velki sen
vivo, ; se viva, vi bredas
brutojn; mi vidis bruli ; bieno
riĉula, ; karba korpo ĉe porde.
.....

'71 Lamulo bridas, ; sen brako
vi paŝtas, ; se surda, vi taŭgas
batali; blindo pli bonas ; ol
bruli sur fajro; morta ne multe
taŭgas.

'72 Bonvenas filo ; malfrue
naskita, ; eĉ post la forpaso de
patro; staras neofte ; ŝtono* ĉe
vojo, ; sen ke ĝin faris filo.

'73 Du en ;* komuna armeo, ;
la lango kostis la kapon, ; post
kovro ;* mantela ; sin kaŝas
mano.

'74 Nokto 'stas ĝojo, ; se la
nutron vi fidas ; (kaj velas kun
etaj jardoj;)*(sin turnas aŭtuna
nokto;)* dum kvin tagoj ;
vetero ŝanĝiĝas, ; eĉ pli en
plena monato.

'75 Ne povas kredi, ; kiu ne
vidis ; la frenezan emon al
oro; unu estas riĉa, ; unu
malriĉa, ; vi tiun ne tial
riproĉu.

'76r Brutaro mortas, ; mortas
parencoj, ; ankaŭ vi mortas. ;
Sed bona fam' ; al akirinto ;
mortas neniam.

'76 Mortas brutoj, ; mortas
fratoj, ; mortos vi mem same;
sed via nomo ; neniam mortos,
; se bonan famon vi flegis.

'77 Mortas brutoj, ; mortas
fratoj, ; mortos vi mem same;
sed io nepre ; neniam mortos:
; la monda juĝo pri morta.)

<Notoj al Havamal:

Hávamál (akcentu la unuan silabon), "Parolo de l'Altulo", t.e. la ĉefdio Oðinn (Vuotano), estas entute 164-strofa poemo, notita en islanda fonto Codex Regius ĉirkaŭ jaro 1270 kaj eble verkita en Norvegujo en la deka jarcento laŭ okcidenta tempokalkulo. Klarigoj (*):

'1 La fonto havas troan verson: "; taksu la kaŝojn, atentu la kaŝojn;"

'13 Gunnlöð: mita sorĉistino-aŭguristino.

'14 Fjalar: mita giganto.

'21 Gres (skandinave): herbo.

'25 Tingo: decida kunveno; parlamento aŭ juĝejo.

'34b En la fonto ĉi vorto apartenas al la dua verso.

'49 Lignaj viroj: idoloj.

'61 La fonto havas troan lastan verson: "; eĉ se kripla."

'72 Memorŝtono pri mortinto.

'73 Kvarversan strofon sesversigis la baladiginto per du kromaj versodividoj.

'74 La fonto havas troan verson. >

& Popo kaj lia dungito Balda:

< Per melodioj #Harpa rekante 22 el 31 batoj por strofo, entute 2914 paŝoj dum 29 minutoj, #Olav rekante 21 el 29 batoj por strofo, entute 2726 paŝoj dum 27 minutoj, aŭ #Maĵora rekante 9 el 17 batoj por strofo, entute 1598 paŝoj dum 16 minutoj.

Rimfabelon verkis Aleksandro Puŝkin (1830). El rusa tradukis Ivan Lubjanovskij. Baladigis, maĵore komponis kaj rekantaĵon aldonis Martin Strid (2015). Alternativaj melodio minora kaj rekantaĵo estas tiuj de Harpa rimaĵo (Hørpu ríma), kiun li tradukis de feroa, kaj trie (maĵoraj) tiuj de Olav rajdistlaŭdo, Norda kantaro #4417, kun teksta modifo.>

(#Melodioj:

((#Harpa: <1,7:31> /La La lSilLa Ti lTi; TiLa SoFa MiMi; La LalTi doTi LalTi; do Ti La a; La SiLa TiTi TiTi; TiLa SoFa MiMi; Mi LaLa LaLa LaTi; do Ti La a) ?

(#Olav: <1,7:29> /so dolso solla lso; mifa so mire do3; so relmi fami doo; milfa soso soofa milso; soso lalalaa sofa mire do dore; mire mimifaa soso lafa mi re do) ?

(#Maĵora: <1,7:17> /mi re mi ldo ; mi re mire do;

(#Rekantaĵo: mimi rere mido dodo; mimi rere doTi La La))

)×94)+

(&Strofoj:

'1 (&Harpa: /Vivi3s po2p'*,
(×: - **vin invitas kuri** -.)
Frunto2 – ŝtipa glo2b'- (×:
Sorĉistoj ; **Estu ĉe l'**
junulino ; **vin invitas kuri** ;
ilin akceptu zorge ;
sorĉistoj!))

?

(&Olav: /Vivi2s po3p'*, (×:;
Se erar' , **li en star'** ;)
Frunto2 – ŝtipa glob'- (×:;
Ka2j ruĝa brulis fla2m' . ;
Milde ŝarĝon li metos en la
propra poŝ' ; **milde ŝarĝon li**
metos en la propra poŝ' .))

?

(&Maĵora: /Vivis po2p'*, ;
Frunto – ŝtipa glob'- (×: **Popo,
estu ne avida ; Balda venkos
vin insida.**))

'2 Iras la pop' tra bazaro ; Kaj
scivolas pri specoj de varoj.

.....

'3 Kaj jen Balda marŝas, ;
Rekte al pop' paŝas.

'4 "Kial, pop' vi frue vin levis?
; Kion trovi vi revis?"

'5 Respondas la pop': "Mi
serĉas serviston: ; Kuiriston,
hakiston, plugiston.

'6 Sed kie trovi la similan ;
Dungiton malkaran,
humilan?"

'7 Diras Balda: "Mi servos al
vi modele, ; Fervore kaj tute
fidele.

'8 Ne estu tre alta salajro – ;
Tri fingrofrapojn surfrunten al
vi dum jaro".

'9 Enpensiĝis la pop'. ; Jam
antaŭe jukas la frunto-glob':

.....

'10 Ja ies tri frapoj –
bombardo, ; Sed li konfidis al
la rusa hazardo.

'11 Diras la pop': "Konsentite,
; Por ni ambaŭ estos profite.

.....

'12 Do vivu en mia korto, ;
Laboru kun fervoro kaj forto".

.....

'13 Loĝas Balda ĉe l' popo en
stalo, ; Dormas sur pajlo.

'14 Manĝas kiel kvaropo, ;
Laboras kiel sesopo;

'15 Jam frumatene li mil
farojn faras, ; Plugas, sterkas,
haklas, riparas,

'16 Hejtas fornon, ĉion
pretigas, ; Kuiras ovon kaj
mem senŝeligas.

'17 La popedzino pri Balda
kontentas, ; La popfilino pri
Balda sentimentas,

'18 La popido lin "onklo"
titolas, ; Balda post laboro kun
li petolas.

'19 Nur la popo Balda'n
malŝatas, ; Malafable al li
rilatas.

'20 Pri la pago li pensas kun
timo, ; Pasas la jar' – de l'
kontrakt' venos limo.

'21 Li nek manĝas, nek
trinkas, nokte angoras, ; Jam
antaŭe la frunto doloras.

'22 Al la edzino li ĉion
konfesas: ; "Tiel kaj tiel – kion
fari necesas?"

'23 La virina cerbo ja estas
lerta, ; Por ĉiuj artifikoĵ sperta.

.....

- '24 "Mi vin povas – ŝi diras – instrui, ; Kiel la kontrakton detruu:
- '25 Donu al Balda iun taskon nur skize, ; Tamen la plenumon postulu precize.
- '26 Tiel la frunton vi savos de l' klako ; Kaj Balda'n lasos sen pago".
- '27 Sin eksentis la pop' pli facile ; Kaj rigardas Balda'n pli trankvile.
- '28 Jen li vokas lin per tono sinjora: ; "He, Balda, mia dungito fervora,
- '29 Devas diabloj ĉiumonate ; Pagi tributon al mi akurate.
- '30 Do miaj aferoj estus agrablaj ; Sed jam tri jarojn ne pagas diabloj.
- '31 Post manĝo vi vin al ili direktu ; Kaj la tributon kolektu".
- '32 Balda al popo nenion rediris ; Kaj tuj al marbordo foriris.
- '33 Tiel la kablono komencis tordi ; Kaj ĝian randon en maron debordi.
- '34 Jen aperas el mar' ĉefdiablo: ; "Diru, Balda, por kio la kablo?"
- '35 La maljunan diablon kaptis angoro: ; "Diru, pro kio la malfavoro?"
- '36 "Pro kio? Vi ja tributon pagi ĉesis, ; Vi pagotempon tute forgesis.
- '37 Tuj mi faros por mi amuzon ; Kaj por vi, hunda gento, konfuzon".
- '38 "Balda, kara, atendu minuton, ; Ni pagos plene al vi la tributon.
- '39 Atendu, mi la nepon invitos". ; Balda pensas: "Nu, ĉi tion mi superspritos!"
- '40 Jen aperas la diablido, ; Miaŭas, kiel malsata katido:
- '41 "Nu, kampul-Balda, saluton!" ; Kian vi postulas tributon?
- '42 Pri tributo ne aŭdis diabloj. ; De kie do tiuj ĉi malagrabloj?
- '43 Tamen ni pagos post la deca trakto, ; Laŭ reciproka kontrakto, –
- '44 Por ke poste ne estu eraro, ; Ni vetkuru, Balda, ĉirkaŭ la maro.
- '45 Kiu ĉi tien la unua revenos, ; Tiu la tributon prenos".

- '46 Balda ekridis: "Diablo amuza!" ; Kion vi elpensis, ruza!
- '47 Ĉu vi intencas kun mi vetkuri, ; kun mi, kun Balda mem konkuri?
- '48 Konkuranto vi estas kuraĝa, ; Sed vi vetu kun mia frat' malpliaga".
- '49 Iras Balda en apudan arbaron, ; Kaptas tie de leporoj paron,
- '50 Unu ŝovas en sakon kaj returne rapidas, ; La diablido sur la bordo sidas.
- '51 Je oreloj Balda la leporon balancas: ; "Jen vi sub mia fajfilo dancos;
- '52 Por vetkuri kun mi, diablo, ; Al vi mankas ankoraŭ kapablo –
- '53 Tio estus nur perdo tempon sence, ; Prefere vetkuru kun mia frato komence.
- '54 Foj'-du-tri! Galopu for!" ; Ekkuris la diablido kaj la lepor' –
- '55 La unua ĉirkaŭ la maro, ; La dua al la hejma arbaro.
- '56 Fine kun elŝovita lango, ; Ĉirkaŭinte la maron, kun enfalintaj vangoj
- '57 La diablido sufoke finiŝas, ; Sur la frunto ŝviton per la mano viŝas,
- '58 Kredante, ke li venki sukcesis, ; Sed Balda jam la fraton karesas
- '59 Kaj tiel diras: "Ho mia frato, ; Vi laciĝis, ripozu, amato".
- '60 La diablido ekstremis, ; Perdis kuraĝon, la voston subpremis,
- '61 Strabe gapas al la leporo. ; "Atendu mi baldaŭ revenos kun oro".
- '62 Al la avo li venis, raportas: "Afero domaĝa! ; Min superkuris Balda malpliaga!"
- '63 Streĉe la maljuna diablo pensis, ; Sed Balda tiel brui komencis,
- '64 Ke la tutan maron agitis ; Kaj sur ĝi ondadon ekscitis.
- '65 La diablido revenis: "Kial vi koleras? ; Ni plene la tributon al vi liveros.
- '66 Tamen... ni ankoraŭ unufoje vetos: ; Kiu bastonon pli foren ĵetos,
- '67 Tiu portu hejmen la tributon. ; Ĉu vi timas elartikigi la kubuton?

'68 Kion vi atendas? Ĉu vi havas dubon?" ; "Ne, mi atendas jen tiun nubon –

'69 Mi tien ĵetos vian bastonon ; Kaj poste ankaŭ vin, friponon".

'70 La diablidon timigis ĉi tiu sorto, ; Li kuris al la av' kun raporto.

'71 Kaj Balda krias terure al la diabloj, ; Kaj ree minacas per kablo.

'72 La diablido eksaltis: "Kial vi briuas? Sufiĉe! ; La tributon ni pagos, tamen kondiĉe..."

'73 "Ne, – diras Balda kun malico, – ; Nun estas mia vico,

'74 Nun la taskon mi donu, ; Kaj la kondiĉon mi proponu;

'75 Ni vidu, kiel statas via spino: ; Jen tie paŝtas sin ĉevalino,

'76 Se vi ŝin levi fortos, ; Kaj ŝin duonverston portos,

'77 Estu la tributo via, ; Se – ne, ĝi estu mia".

'78 La diablido ŝovis sin ; Sub la ventron de l' ĉevalin',

'79 Sin streĉis risorte, ; Penis tutforte,

'80 Ŝin iom levis, du paŝojn iris, ; Je la tria falis, apenaŭ spiris.

'81 Balda al li: "Stulta satano, ; La veto kun mi estas vano.

'82 Vi ne povis ŝin porti per manoj eĉ, ; Kaj mi per piedoj portos sen streĉ'"

'83 Sur la ĉevalinon Balda saltis, ; Rajdis verston, nur tiam haltis.

'84 La diablido kuris en tim' kaj teruro ; Al la av' kun raport' pri fiask' je konkuro.

'85 La diabloj diskuton aranĝis: ; "Kion fari?"

'86 Obstini ili ne plu kuraĝis, ; Sakon kun oro sur Balda'n ŝarĝis. **

'87 Balda hejmen peze paŝas. ; Lin ekvidinte, la popo sin kaŝas

'88 Post la dorson de la edzino, ; Detenas spiradon en la sino.

'89 Balda trovis la malfeliĉan ; Kaj postulas la pagon laŭkondiĉan.

'90 Kun dentoskrapo ; Metas la pop' la frunton al frapo;

'91 De l' unua frap' ; Saltis la popo super la kap';

'92 De la dua, akuta, ; Fariĝis
la popo muta;

'93 Kaj de l' frapo tria ; Fariĝis
stulta popo nia.

'94 Kaj diras Balda insida: ;
"Ke ne estus vi, popo, avida".
.....)

& Davida balado:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 2958 paŝoj dum 32 minutoj. Verkis Martin Strid (2015, 2016) laŭ melodio kaj rekantaĵo de #"Drako Longa", Norda Kantaro #4414. Klarigojn (*) vidu post la strofoj.>

(#Melodio:

<1,6:29> (

/mi mire redo dodo; dodo dore mi; mimi mire mire mimi; soso fami mi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So LaTi do o)

)×102)+

(Strofoj:

,& Unua parto:

'1 /David* raportis iras ; kaj fieras li. ; En sekretarejo diras: ; "Estimata Ci,

(×: **Bruas danco en halo, danco en ĉen'!** ; **Ĝojaj paŝas ni en esperanto-kunven'.**)

'2 Universala Esperanto- ; Asocio kongresos. ; Edinburge en Skotlando* ; helpon mi promesos.

'3 Tiel ili min akceptos ; kiel kamaradon ; kaj al postenoj min elektos ; en sia movado."

'4 "Lingvo Esperanto minacas ; anglan avantaĝon. ; Tial nepre ni senlacaj ; kaŭzu al ĝi damaĝon.

'5 Ĝian movadon ni penetros ; – jes, vi ricevos pagon – ; kaj ni havas buntan paletron ; da detruaj agoj."

'6 Kongresan komitaton gvidis ; lokan Ĝon Ŭelso* ; kaj la junularan prezidis ; David Kelso.

'7 Ŭelso postulis debaton kun ; Brita Konsilio* ; pri meritoj de la angla ; kaj esperanto-defio.

'8 Brito kaj franco tie portretis
; po lingvon kaj germano* . ;
En esperanton interpretis ; la
grafo* UNO-ano.

'9 Brita debatisto* parolis ; pli
kaj pli komplike ; kvazaŭ li
per tio volis ; fiaskon
komunike.

'10 Fine Ŭelso mem
transprenis ; alesperantan
tradukon. ; Al li la vortoj
rapide venis, ; brilis jena
truko.

'11 Pruvi per sia truko li
provis ; anglan eleganton, ;
sed kongresanoj male trovis ;
ke fuŝigas ĝi parolanton.

'12 Li la homojn konvinki
klopodis ; pri anglalingva
valoro, ; sed ilian fidon erodis
; ĝia vortrigoro.

,& Dua parto:

'13 En brita espa oficejo ;
Herbert* laboras ; sed
respondi al leteroj ; neniam al
li valoras.

'14 Ron* diris: "Kia ideo, ;
Esperanto frenezas." ; Tamen
male al Kabeo* ; li landan
estraron pezas.

'15 Esperanton Haroldoj
subtenas ; ĉefministro* kaj
lordo* , ; ambaŭ en espan
lobion* venas, ; tra malferma
pordo.

'16 "Esperanton parlamentanoj
; apogas jam plej multe" ; Ian*
mesaĝis* iom rikana ; sed tio
estis stulte.

'17 Parlamente membre ŝvelas
; Esperanto-Lobby. ; Nomon
ĝian Ron forŝtelas, ; tion
Herbert aprobis.

'18 La nomon li por si registris
; per asocia mono. ; Tion
Herbert administris ; sen
bezona ordono.

'19 Ron en sekretarejo salutas
; "Kion de Ci mi aŭdas? ; Cia
ĉefo pri risko ne mutas: ; Oni
esperanton laŭdas."

'20 "Esperanto jam tro kreskas
; diras ĉefo mia, ; kaj ni havas
taskon groteskan, ; Harold
estas fia.

'21 Trafos la imperion tristo ;
pro lia rego, ni certas." ; "Ĉu
ke li estas komunisto ; ĉefo
Cia* avertas?"

'22 "Diras ĉefo Cia tion ; ke
ĉefministro Haroldo ; sekvi
rifuzas la linion ; de usona
soldo.

'23 Malobean regon haroldan ;
gazetaro buĉos ; per
propaganda kampanjo skolda ;
alie fariĝos puĉo."

'24 Cia kredigis al Petro
Ĝusta* ; ke devos li komploti.
; Lia lojalo, iom rusta ; ne plu
patriotis.

'25 Leteron de Harold lorda ;
publikigas gazeto* ; kiom da
parlamentanoj akordas ; en
esperanto-reto.

'26 Ron kunvokis la espan
skipon ; kaj ŝaltis
magnetofonon:* ; "Harold,
gratulon!" diras tipo, ; "Via
letero bonas!"

'27 Sed neniam Harold skribis
; tiun leteron publikan. ; Iu do
kontraŭ li intrigis ; nombron
komunika.....

'28 Ĉar tute novis tiu nombro ;
ili eĉ ne sciis mem. ; Kaj
kaŝite restas en ombro ; kiu
verkis teme.

'29 Ambaŭ Haroldoj demisiis ;
por eviti tumulton. ; Tio
tragike travestiis ;
demokratian rezulton.

,& Tria parto:

'30 Braŭnli* testamenton faris:
; "Mian domon duonan ; al
brita esperantistaro ; heredaĵe
mi donas."

'31 Sekretario Vilĉjo* legi ; la
testamenton petas ; sed kasisto
Nora* neis ; dirante "Ĝi
sekretas."

'32 Sekretario Vilĉjo akuzas ;
"Vi trompas pri testamento!" ;
Nora respondis: "Ni rifuzas ;
montri la dokumenton!"

'33 Sekretario Vilĉjo verda ;
diris en aĝo maljuna ; "Mi
konstatis ke monon perdas ; ni
pro Nora bruna.

'34 Tiu heredaĵo neniam ; la
asocion venas ; kaj sekreta
agenteo jam ; la monon de ni
forprenas."

'35 Anglaj sekretaj agenteoj
ŝtelas ; posedaĵojn de l' movado
; kaj iliajn trukojn rivelas ; tiu
ĉi balado.

,& Kvara parto:

'36 Asocion prezidas
Edmundo* . ; Mi ses* lin bone
konas. ; Venos tempo por
malabundon ; kredigi en
Londono.

'37 David* sekretarejon venas,
; kaj ordonojn ricevas. ;
"Bone, Mi ses, mi komprenas
; kion fari ni devas."

'38 "Esperanton vi subfosu ;
en granda kaŝo. ; Komencu
per estigi ĥaoson ; en organiza
maŝo.

'39 Ho, miseto, nun aŭskultu: ;
Vi kaj la prezidanto ; nian
revizoron konsultu ; pri l'
domo de Esperanto.

'40 Vi kaj prezidanto
Edmundo ; kun intenco nuba: ;
seniĝu je la domo kaj grundo ;
ke manku hejmo kluba.

'41 Domon vendi li proponu, ;
kvazaŭ tro ĝi kostas, ; kaj la
vendenspezon donu ; por
senutilo poste.

'42 Esperantasocion supoze ;
devus vi malfondi ; kaj
akuzojn serioze ; neniam
respondi."

'43 Ĝojs*, la kasistino nova, ;
kontojn refaris. ; Ekde tiam
neniu trovas ; kiom ni jam
ŝparis.

'44 "La kasistajn jarraportojn ;
ni ne plu povas legi ; ĉar
plenas je sensencaj vortoj* ;
anstataŭ klaron regi.

'45 Sumon de nia kapitalo ; ĝi
nenie informas ; kaj tabeloj
paĝojn vualas, ; papera stako
enormas.

'46 Ĉu malaperis kapitalo? ;
Kion pri nia domo? Kiel eblas
valorfalo? ; Kredas neniu
homo!

'47 Ĉu ĉi tiu revizoro* ; diras
al ni honeste? ; Ĉu li pravas
pri valoro ; aŭ trompas nin
investe?

'48 "Domon vendu!" diras
estraro, ; "ĉar tro multe kostos,
; kaj post tiu saĝa faro ; ni
malpli impostos."

'49 Oni la domon tuj forvendis
; post la seniĝa decido* ;
kvankam anstataŭan endis ;
havi jam en vido.

'50 Dungos direktoron
estraro* ; por organiza
disvolvo ; kiu la perdon dum
lastaj jaroj ; per esploro
solvos.

'51 Tamen ili ne pretis varbi ;
kiam iu demandis* ; kaj
motivo nigre karbis ; dum ili
plu marĉandis.

'52 "Translokiĝu," Derek*
proponas, ; "mian kolecion ;
Ŭeĝŭudon en Barlastono. ; Por
ni bonos tio."

'53 "Derek sidas ĉe ambaŭ
flankoj ; de la negocata tablo," ;
diris juĝisto, " – lojalo-mankoj
; kaŭzos malagrablajn."

'54 Ili subite postulis:
"Najbaru ; al Barlastono l'
dungoto."* ; Tamen poste
postenon preparis ; al fore
loĝanta skoto.

'55 Ili Davidon Kelson dungis
; per la doma enspezo. ; Li la
novan kontrakton jungis ; per
troaj jura pezo:

'56 David ne laboris pri faktoj
; nek pri disvolvaj ŝtupoj. ; Pri
Ŭeĝŭuda domkontrakto ; li sin
okupis.

'57 Fine la domkontrakto estis
; preskaŭ naŭdekpaĝa ;
kvankam la juristo protestis ;
"Tiom ne estas saĝa!"

,& Kvina parto:

'58 Por anglespoj Viljam*
olda ; redaktas informilon. ;
Ambaŭlingve skribas heroldo ;
ankaŭ por krokodiloj.

'59 Ek de kiam Paŭlo*
transprenis ; ĝin, ĝi ne plu
informas ; pri esperanto nek
angle venis ; – propagando
dormas.

'60 Por edukado lingva faris ;
bonan laboron ulo* ; sed
daŭrigon David baris. ; El ĉio
fariĝis nulo.

'61 Kelkaj esperanton anas ;
eĉ en la estraroj, ; bele babile
ĉarlatanas ; sed fakte nenion
faras,

'62 krom se iu vere volas ; por
Esperanto agi. ; Ili kontraŭ tiu
parolas ; kaj povas minace
sagi.

'63 "Monon uzu por kurso!"
proponas ; Husajn'* al
jarkunsido ; de l' esperanto-
klubo londona ; kiun David*
prezidas.

'64 Proponon trakti ne volis
dornulo ; kaj pri bagateloj ;
okupis tempon manipule ; je
malŝpara celo.

,& Sesa parto:

'65 Esploris Iano
senmembriĝon ; malkaŝo jam
survojas. ; Ŭelso defende sian
prestiĝon ; diris: "Vi
paranojas!"

'66 Tutan tempon dum ses
monatoj ; Ian esploris ; pri la
kontoj kaj monrilatoj, ; por
vereco fervoris.

'67 Dum la lastaj ses jaroj ; de
la jarmilo dua ; la kasistaj
financdeklaroj ; estis
malkongruaj.

'68 Laŭ la nova kontosistemo ;
donacoj estas perdo ; kaj la
kasisto kun trompa emo ;
raportis financa merdon.

'69 Dum la estraro plendis ; ke
mone minuso regas, ; el la
kontoj evidentis ; La kapitalo
kreskegas!

'70 Kion Ian eksuspektis ;
precize diagramis ; kion ni eĉ
ne konjektis ; Nin perfido
jamis!

'71 Dek du esplorraportojn ;
Ian konsciencis ; al Ĝon kun
klarigaj vortoj ; liveris
konfidence.

'72 Ĉar Ĝon prezidanto estis ;
de la asocio ; kaj por li la
tasko restis ; gvidi ĝin tra tio.
.....

'73 Ian realon pruvis grafike ;
Falsas deficito. ; Sed kripligis
nin jena piko ; Domo jam
vendita.

'74 Tuj al Ian minacoj venis ;
de estraranoj. ; Ili lin en
kunsido ĝenis ; per moko kaj
rikanoj.

'75 Plendis kasisto pri la
konduco ; de Ian post raportoj,
; David* bojis kiel bruto ; per
maldecaj vortoj.

'76 Trans la tablo David
blekis ; "Ian, vi fekulo!" ; sed
ke ili mensoge pekis ; kvazaŭ
fariĝis nulo.

'77 "Ĝon, vi estas perfidanto,"
; Ŭelson Ian akuzas ; "ĉar
malaperis mona kvanto ;
kvankam neniu uzis."

'78 Espoj vendrede
jarkunvenis* ; atakoj al Ian
mavas* ; sed la membroj fine
komprenis ; ke li ja pravus.

'79 Post la kunveno homoj
miris ; "Ĉu nun Ĝon Ŭelso ;
demisios ĉar konspiris ; aŭ ĉu
David Kelso?"

'80 Kelkaj el ili saĝe
konkludas ; "Nun Ĝon
flanken paŝos ; pro falsaro
honte nuda ; aŭ sin Kelso
kaŝos."

'81 David Kelso malaperis ; en
la sekva lundo* . ; Li movade
malsinceris ; mankis honesta
fundo.

,& Sepa parto:

'82 Ĉu vi konas markon sekretan ; de Londona polico? ; Por provoki estas preta ; aktivulan vicon.

'83 Marko en agogrupa loka ; mem la gvidon prenis ; kaj parolis krimprovoka ; ĝis policanoj venis.

'84 Planis verda grupo proteston ; kontraŭ karbenergio. ; En lerneja ĉambro modesta ; diskutis la strategion.

'85 Marko proponis: "Tuj ni rompu ; energiejan barilon!" ; sed ne sukcesis ilin trompi ; per perfida konsilo.

'86 Ili intencis pace protesti ; kontraŭ karbenergio. ; Venis polico por aresti ; antaŭ la demonstracio.

'87 Ĉiujn oni enkarcerigis ; krom la elokventan ; kiu provis al krimo instigi ; ĉar estis li agento.

'88 Ilin en jura proceso akuzis ; oni je saboto ; sed koramikinon konfuzis ; de Marko identa foto.

'89 "Trovis lian mi pasporton ; sub alia nomo. ; Advokato, aŭskultu vorton: ; Esploru tiun homon!"

'90 Skandalon advokato malkaŝis ; kaj en juĝejo diris ; akuzisto retropaŝis ; ĉiuj homoj miris.

'91 La trukon televido rivelis ; kaj publikigis* ; kiel agentoj detruis celis, ; kontraŭ popolo intrigis.

'92 Ankaŭ tiuj estis verduloj ; kvankam ekologiaj ; kiuj civitanajn postulojn ; demonstracias.

'93 Marko kontraŭ kultura junco ; domon detruis* ; sed lin oni neniam punos ; ĉar polico influis.

'94 Krimis li por registaroj ; eĉ en aliaj landoj, ; sed pri incendiaj faroj ; neniam juĝisto demandos.

'95 Same kiel agentoj aliaj ; li eĉ amrilatis ; al viktimoj siaj ; dum li movadon gvatis.

'96 Marko Kennedy pentis vorte ; ke li tro perfidis. ; Davidon Kelson, kvazaŭ mortan, ; plu ni neniam vidis.

'97 En demokratia lando ;
rajtu la popolo ; siajn celojn
propagandi ; malgraŭ rega
volo.

'98 Se sekreta servo ŝtata ;
popolmovadon sabotas ; tiam
tiuj aŭtokratoj ; morale jam
bankrotas.

'99 Perfiduloj sin preparas ;
por detrua tasko ; cele kaj
sisteme faras ; ke esperanto
fiasku.

'100 Ni naivaj esperantistoj ;
eĉ ne povas imagi ; ke konataj
homoj insiste ; trompe
kapablas agi.

'101 Se decido nova efikas ;
kiu ne havas sencon ; jenan
faras anglamerika ; mondon
rega potenco.

'102 Atentu pri sekreta servo ;
en via organizo ; kaj vi havu
fortajn nervojn ; en penetra
krizo.)



<& Klarigoj (*) al Davida balado:

'1 David Kelso, estrarano de Esperanto-Asocio de Britujo (EAB) pri edukado 2002-2010.

'2 En jaro 1971 Universala Kongreso de Esperanto estis en Londono kaj Internacia Junulara Kongreso en Edinburgo.

'6 John Wells, dufoja prezidanto de EAB.

'7 British Council.

'8 Reprezentantoj de British Council, Alliance française kaj Goethe Institut. ; Le Compte de la Gatinari, profesia interpretisto en Unuiĝintaj Nacioj.

'9 McMillan.

'13 Herbert Platt, kompania sekretario de Brita Esperanto-Asocio (BEA, poste EAB) en la 1970-aj jaroj.

'14 Ron Coverson, estrarano de BEA. ; Kazimierz Bein, pionira verkisto en esperanto.

'15 Harold Wilson, ĉefministro de Britujo 1964-1970 kaj 1974-1976 ; Harold Davies, parlamentano en brita Malsupra Ĉambro 1945-1970, ek de tiam en Supra Ĉambro, nobeligita als Lord Davies of Leenk. ; Esperanto Lobby, premgrupo en brita parlamento al kiu post naciaj elektoj anis pli multaj parlamentanoj ol al iu ajn el la partioj.

'16 Ian Fantom, informa oficisto de EAB en 2003 kaj estrarano pri esplorado 2005-2006. ; Gazetara bulteno.

'21 Centra Inteligentuma Agentejo, usona spionorganizo.

'24 Peter Wright, eksa ĉefo de sekreta serva oficejo MI5, rakontis en intervjuo kiel kaj kial li, preparante puĉon, elpostenigis la ĉefministron.

'25 La leteron publikigis la gazeto The Guardian.

'26 En la kunveno partoprenis grupo da anglespoj. La magnetofono aŭdigis surbendigitan parolon telefonan.

'30 John Brownlee, sekretario de EAB.

'31 Will Green, alias Vilĉjo Verda (1912-2003) sekretario de EAB. ; Nora Brown, kasisto de EAB.

'36 Edmund Grimley Evans, prezidanto de EAB. ; MI6, brita Militista Inteligentumo, poste nomata SIS, Sekreta Inteligentuma Servo.

'37 David Bissett, vico-prezidanto de EAB.

'43 Joyce Bunting, kasisto de EAB.

'47 S-ro Brookes.

'50 Dunganonco.

'52 Derek Tatton, estrarano de EAB 1999-2008 ; Wedgwood Memorial College en Barlaston, kies direktoro estis Derek Tatton.

'54 Oni postulis maksimuman distancon de 40 mejloj = 65 km.

'58 William Auld.

'59 Paul Gubbins.

'60 Graham Leon Smith.

'63 Al jarkunveno Hussain Al Amily proponis ke Londona klubo de Esperanto uzu 86 mil pundojn por kurso. ; David Thornell, prezidanto de Londona espa klubo.

'75 Kelso.

'91 La skandalon pri agento Mark Kennedy raportis la 14-an de novembro 2011 brita televida kanalo Channel 4.

'93 Marko Kennedy ebligis polican sturmon de Domo de Junularo en Kopenhago la 1-an de marto 2007. Kelkajn tagojn poste oni malkonstruis tiun pli ol centjaran kulturdomon.

>

& Balado de l' prizono Reading:

< Rekante 26 el 53 batoj por strofo, entute 3339 paŝoj dum 38 minutoj. Verkis Oscar Wilde "In Memoriam C. T. W., kavaleriano en Reĝina kavaleria Gvardio Obiit en Prizono de Ŝia Reĝina Moŝto, Reading, Berkshire, 7. julio 1896". Tradukis L. N. M. Newell (Angla antologio II, Londono 1987). Komponis kaj rekantaĵon verkis Martin Strid (2015). Klarigoj (*): '12 Sada, ĝuanta la doloron de alia, volupte kruela (el la nomo de la markizo de Sade). '15 Kajafaso, ĉefpastro kiu akuzis Jesuon je herezo. '17 Anodino = Ĉio, kio malpliigas doloron, ĉu fizikan ĉu moralan.>

(#Melodio:

<1,5:53> /(La LaTi dore mido LaaLa;La So SolLa Tido La;)× do dore mido reTi LaaLa;La So SolLa Tido La; (#Rekantaĵe: (do dore mifa mire TiTi; do doLa TiSo LaFa MiMi;)× La LaSo LaTi doTi La a)
)×63)+

(&Strofoj:

,& Unua parto:

'1 /Ne portis li skarlatan jakon,
; ĉar ruĝa2s sang' kaj vin', ;
kun sang' kaj vino sur la
manoj ; oni surprizis lin ; ĉe l'
lito de la povrulino: ; murdita2
amatin'.

(×: **Dancu kviete, vivo bonas**
; kaj ĉiu tago lumon donas ;
ĉar naskis niaj nin patrinoj ;
ploris ni en iliaj sinoj. ;
Ĉiujn atingos fine mort'.)

'2 Inter juĝotoj li promenis, ;
vestiĝis li humile; sport-ĉapon
portis li kaj ŝajne, ; li paŝis
kor-trankvile; sed hom'
neniam alrigardis ; la tagon pli
sopire.

'3 Neniam hom' pli triste
gvatis ; el sia kor-malhelo ; la
bluan tendon, kiun nomas ; la
prizonan' ĉielo, ; kaj ĉiun
nubon, kiu drivis ; per bril-
arĝenta velo.

'4 Mi marŝis kun la
turmentatoj ; en rond' de
malespero, ; kaj min
demandis, kia kulpo ; lin tenas
en karceri, ; sed tiam dorse
voĉo flustris, ; "Li dancos sur
aero."

'5 Aĥ, Kristo! tia penso ŝajnis
; ŝanceli prizon-muron, ; kiel
flama kask', ĉielo premis ; al
mia kapo brulon; sed eĉ en
pens-infer', la propran ; ne
sentis mi torturon.

'6 Mi sciis nur, ke hastapaŝe ;
pri hanta pens' li revas, ; kaj
kial li al kruda lumo ; rigardon
tristan levas: ; li murdis la
amatan kozon, ; kaj tial morti
devas.

'7 Sed ĉiu murdas la amatan - ;
ne dubu ties pravon, ; iuj per
ekrigard' amara, ; aliaj falsas
ravon, ; timulo faras ĝin per
kiso, ; bravulo uzas glavon.
.....

'8 En jun' la amatan murdas
iuj, ; aŭ kun senila ploro;
strangolas jen la man' volupta,
; kaj jen la man' de l' oro: ;
ponardon uzas la teneraj, ; ĉar
pasas tuj doloro.

'9 Tro amas iuj, aŭ tro kurte, ;
aĉetas aŭ forvendas; mortigas
iuj kun larmado, ; aliaj ne
lamentas: ; ĉar amon murdas
ĉiu viro - ; sed ĉiu vir' ne
pendas.

'10 Ne trafas lin la malnobla
morto ; en sombra sort-
mateno, ; nek kovras la
vizaĝon tuko, ; ne premas
pend-rimeno, ; nek falas li
pied-antaŭe ; tra planko al
malpleno.

'11 Maten-krepuske lin ne
vekas ; tim-formoj apud lito, ;
ŝerif' minaca, pastr' en stolo, ;
tremanta pro ekscito, ; kaj
Prizonestro palvizaĝa ; pro l'
sorto de Damnito.

'12 Li ne leviĝas haste, nek ;
en honta vest' paradas, ; dum
kuracist' kun sada* buŝo ; ĉiun
nerv-tremon gvatas, ; kun poŝ-
horloĝ' kies tiktako ; sur kor-
amboso batas.

'13 Ne konas li soifon naŭzan,
; kiu la gorgon polvas, ; ĝis
pendigist' kun pezaj gantoj ;
kaŝvenas, kaj lin volvas ; per
tri rimenoj, kaj por ĉiam ; lin
de l' soif' absolvas.

'14 Ne aŭdas li Sepultajn
Preĝojn ; stare kun kap'
klinita, ; kaj dum dolore neas
morton ; lia terur' spirita, ; ne
vidas sian ĉerkon ire ; al la
barako hida.

'15 Ne suprengapas li tra vitro
; al la sunluma paco; nek
preĝas per argilaj lipoj ; por
agoni-forpaso; ne tuŝas la
tremantan vangon ; la kis' de
Kajafaso*.

,& Dua parto:

'16 Promenis li dum ses
semajnoj ; vestiĝis li humile;
sport-ĉapon portis li, kaj ŝajne
; li paŝis kor-trankvile; sed
hom' neniam alrigardis ; la
tagon pli sopire.

'17 Li ne marasme tordis
manojn, ; nek ploris vivo-
finon, ; sed trinkis la aeron
kvazaŭ ; sanigan anodinson*;
tra malfermita buŝ' li trinkis ;
la sunon kvazaŭ vinon!

'18 En rond' alia turmentataj ;
ni marŝis sen espero, ; forgesi
ĉu nin ĉenas granda ; aŭ eta
kulp-afero, ; kun stulta miro
pri la viro ; danconta sur aero.
.....

'19 Kun vid-esploro kaj
angoro ; ni gvatis ĉiutage; ĉu
saman vojon iros ĉiu, ;
demandis ni image: ; Ĉar
blinda, al infer' timinda, ; l'
animo iros vage.

'20 Mi kun juĝotoj ne plu vidis
; lin morte apatian, ; ĉar jam
okupis li juĝate ; la benkon
pilorian; kaj en ĉi dolĉa mond'
mi vidos ; ne plu vizaĝon lian.
.....

'21 Kiel en ŝtorm-pere' du
ŝipoj, ; ni pase nin renkontis, ;
sen vanaj vortoj preterdrivis, ;
nenian signon montris, ; ĉar ne
kuniĝis ni dum nokto, ; sed en
la tago hontis.

'22 Prizonaj muroj nin ĉirkaŭis
; parioj en ekzilo; el sia kor' la
hom' nin pelis, ; kaj Di' el
grac-azilo; pro Pek-plenumo,
fera puno ; nin tenis en
kaptilo.

,& Tria parto:

'23 En la prizona korta ŝtona ;
gutas la alta muro; li tien iris,
aeron spiris ; sub la ĉiel-
obskuro; ĉe flank' gardistoj
marŝis, ke ; ne perdu lin la
ŝnuro.

'24 Aŭ se li sidis, tiuj gvatis ;
lian angor-obsedon; kaj gvatis
se li staris plore, ; aŭ kaŭre
preĝis pledon; gvatante, ke li
mem ne rabu ; al eŝafod' la
predon.

'25 Li fumis, kaj bieron
trinkis, ; ĉiutage laŭ kutimo;
animo lia estis firma, ; en ĝi
ne estis timo; li diris, ke li
ĝojas vidi ; pendingon en
proksimo.

'26 Sed ne kuraĝis la Gardistoj
; komenti tiun haston. ; Ĉar
kiu la gardistan sorton ; ricevis
kiel taskon, ; la buŝon ŝlosas,
kaj li faras ; el la vizaĝo
maskon.

'27 Ni flustre grumblis dum ni
stumblis ; en la Pajac-Parado!
; Al ni egalas: ni lojalis ; al la
Satan-Brigado: ; Piedoj
plumbaj, haroj stumpaj - ; jen
gaja maskerado.

'28 Disŝire gudroŝnuro kaŭzis
; sub ungoj sangoŝvelojn; ni
frotis ŝrankojn, skrapis
stangojn, ; kaj brosis la
kahelojn; ni ŝmiris sapon sur
plank-trabon, ; frapante la
sitelojn.

'29 Ni sakojn stebis, kaj
martele ; la rokojn ni
dissplitis; ni ladon bekis,
himnojn blekis, ; kaj sur paŝ-
rado ŝvitis; sed en la kor' de
ĉiu homo ; silente Tim' insidis.
.....

'30 Silente: ĉiu tag' forrampis ;
kiel algpeza hulo; forgesis
faton senkompatan ; fripon'
kaj malsaĝulo; ĝis foje ni
ekvidis tombon ; gapantan sub
okulo.

'31 Ĉiu animo gvatis Damnon,
; Hororon kaj Mort-Ombron;
kun sak' la pendigist' enpaŝis ;
la nigran katakombon; kaj ĉiu
tremis ŝtelirante ; en
numeritan tombon.

'32 Ĉi-nokte la senhomajn
halojn ; plenigis terurantoj;
kvazaŭ fantom', tra l' fera
dom', ; paŝis silentaj plandoj;
gvatis vizaĝoj al la kaĝoj, ;
apud fenestro-randoj.

'33 Dorm' foras kiam viroj
ploras, ; kiuj neniam ploris;
stultulo kaj fripon', vigladon ;
senfinan ni deĵoris; tra ĉiu
cerb' kaj trema nerv' ; ties
Timego boris.

'34 Aĥ ve! terure estis kiam ;
ni ties kulpon pentis! ; Ni
funde en la koro vunde ; de l'
Pek' la glavon sentis; pro
sango sur alies mano ;
larmbrule ni lamentis.

'35 Al ĉiu pordo la Gardistoj ;
en feltaj ŝuoj iris; kun tim'
mistera pri l' mizera ; figur'
preĝanta miris, ; pri homoj
kiuj en paseo ; neniam preĝon
diris.

'36 Matena vento ve-suspiris, ;
sed daŭris la mallumo; post
lanta ŝpino de l' destino ; sin
teksis sort-plenumo; kun
preĝo-fino venis timo ; pri l'
Juĝo de la Suno.

'37 Mi vidis fine ombrajn
stangojn ; fariĝi krad' vitrala;
ĝi glitis ombre super lito, ;
trans kalka muro pala; kaj ie
en la mond', mi sciis, ; ruĝas l'
aŭror' fatala.

'38 Je l' sesa puris la karceroj,
; je l' sepa fuĝis sono; sed
siblo de flugila vibro ; ŝvebis
tra la prizono; eniris kaj glacie
spiris ; anĝel' kun mort-
ordono.

'39 Ne sur ĉevalo lunoblanka,
nek en purpura robo: ; nur
ŝnuron kaj la fal-tabulon ;
bezonas eŝafodo; sekrete, la
Harold' kviete ; venis kun
honta nodo.

'40 La okan horon ni atendis;
ni sentis tremon ŝvitan; ĉar ok-
sonoro, Fata horo, ; damnas la
malbenitan; por la plej bona
kaj malbona ; Fat' uzas nodon
glitan.

'41 Nenion povis ni krom
streĉe ; atendi por aŭguro; ni
restis side, ŝton-rigide, ;
kvazaŭ sur sol-insulo; sed ĉies
koro batis peze, ; frapante sur
tamburo.

'42 Kor-sprona, la horloĝ'
prizona ; vibrigis la aeron; de
l' Pek-armeo voĉis veo ;
senpovan malesperon, ; kiel
ve-krias en soleco ; leprul' la
kor-mizeron.

'43 Kaj kiel en kristal' de
sonĝo ; aperas hida sceno, ; ni
vidas, ke de l' trabo pendas ;
grasa kanab-rimeno, ; kaj
aŭdas gorĝon kriĉi preĝon ;
sub la strangola premo.

'44 La ve-angoron kaj doloron
; dum li amare krias, ; la tim-
eksciton, sangan ŝviton, ; plej
funde mi konscias, ; ĉar kiu
vivon plure vivas ; plurfoje
agonias.

,& Kvara parto:

'45 Sen la Diservo pasas tago :
en kiu homo mortas; la Pastro
palas, ĉar angoro ; al li la
koron tordas, ; aŭ io honta en
l' okulo ; mesaĝon mornan
portas.

'46 Tagmeze sonorilo sonis ;
por iri al l' ekstero; gardistoj
ŝlosil'tinte lasis ; ĉiun el la
karcero; ni marŝis laŭ ŝtuparo
fera, ; ĉiu el Sol-Infero.

'47 Ni marŝis en la dolĉa vento
; de dio, maltrankvile; pro tim'
vizaĝ' aspektis blanke, ; alia
jen argile; neniam homoj
alrigardis ; la tagon pli sopire.
.....

'48 Neniam hom' pli triste
gvatis ; el sia kor-mizero ; la
bluan tendon - la ĉielon ; de l'
anoj de karcero, ; kaj la
senzorgajn nubojn, kiuj ;
fordrivis en libero.

'49 Sed iuj kun klinita kapo ;
meditis pri l' postulo, ; ke
male devus morti, ili, ; se
justas la kalkulo: ; nur pri
vivul' li murde kulpis, ; sed ili
- pri mortulo.

'50 Repeko al sufero vekas ; la
mort-animon flame, ; Ĝin tiras
el mort-tukoj kaj ; revundas
ĝin profane, ; kaj igas ĝin
torente sangi, ; kaj ĝi resangas
vane.

'51 Fantastaj vestoj honte
signis ; nian pajac-kohorton;
silente, morne, ni rondiris ; la
glit-asfaltan korton; silente,
morne, ni rondiris ; neniu
flustris vorton.

'52 Silente, morne, ni rondiris;
tra ĉiu kavo mensa ; blovis
memor' pri hidaj kozoj ; kiel
tempest' potenca; Horor' nin
frontis, kaj Teruro ;
postrampis, pacienca.

'53 Fiere marŝis la Gardistoj, ;
kaj gardis nin en rotoj, ; tre
elegante, ĉar vestitaj ; en la
dimanĉ-kulotoj; sed la faritan
taskon montris ; brulkalko sur
la botoj.

'54 Kie antaŭe tomb' oscedis, ;
nenia tombo restis; apud la
hida mur' nur koto ; kaj sablo
ĝin atestis, ; kaj amaseto da
brulkalko ; nun la mortinton
vestis.

'55 Ĉar tiu havas veston, kian ;
ne volus la plej vanta; en
tombo sur prizona korto, ;
nuda, do pli malsankta, ; li
kuŝas kun pied-katenoj ; en
mort-kitel' flamanta.

'56 Tri jarojn kreskos nek
radiko ; nek sem' en ter'
apuda; tri jarojn restos ĝi
sterila, ; senbena lok', kaj
nuda; kaj frontos al ĉiel'
miranta ; sen eĉ riproĉo muta.
.....

'57 Kvazaŭ el koro de
murdinto ; kreskus venena
sproso! ; Ne vere! Dia tero
benas ; ekster la hom-supozo;
ruĝe la ruĝa kaj pli blanke ;
florus la blanka rozo.

'58 El lia buŝo rozo ruĝa! ; El
kor', blankroza krono! ;
Malkaŝas Kristo sian volon ;
strange al nia kono, ; kaj antaŭ
granda Pap' burĝonis ; seka
pilgrim-bastono.

'59 Nek ruĝa roz' nek blanka
rajtas ; parfumi la aeron; al ni
silikon oni donas, ; potpecon
kaj ŝtoneron, ; ĉar eble floroj
al simplulo ; venkus eĉ
malesperon.

'60 Neniam blanka roz' aŭ
ruĝa ; kovros tener-petale ; la
sablan teron, kiu nudas ; apud
la mur' novale, ; por signi, ke
la Filo mortis ; por ĉiu hom'
egale.

'61 Li havos pacon, ĉi tristulo,
; aŭ jam en pac' rifuĝas; post
la turment', ne plu Teruron ;
en taga lum' li fuĝas, ; ĉar
mankas Sun' kaj Luno kie ; en
ter-obskur' li kuŝas.

'62 Ĉe l' senhonora tomb' la
Pastro ; por preĝi ne sin ĝenis,
; nek signis per beata Kruco, ;
ke Krist' pekintojn benis;
tamen por savi tiajn homojn ;
Kristo sur teron venis.

'63 En paco: li nur pasis kie ;
la Vivo-lim' tenebras; pro li la
ritojn de kompato ; larm' de
fremdul' celebras, ; lin ploras
la pario, kaj ; ĉiam pari'
funebbras.)

& Balado de Virgar:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 3567 paŝoj dum 40 minutoj. Norda Kantaro #4406. El feroa tradukis Martin Strid (2016). Strofoj '18, '53, '62, '86, '90, '91 kaj '105 duoblas. Klarigoj (*): '56 Alta seĝo = trono. '74 Rompi kunen: kolizii, kunkraŝiĝi.>

(#Melodio:

<1,5:> (

/MiLa LaTi TiTi dore; redo doTi TiMi; LaLa TiiTiTi TiTi
doore;re reedodo doTi LaTi;

(#Rekantaĵe: do TiLa So Ti Mi LaTi do do;Mi So SoFa Mi La;Ti
doTi La a)

)×122)+

(&Strofoj:

'1 Pri luktuloj bonaj multaj ;
prarakontoj temas ; famaj estis
en fruepoko ; pri ili mi
balademas.

(×: **Nun emas mi en danco
jam iri ; dum rozoj, lilioj ;
kreskadas tre.**)

'2 Mi kantas pri glavo
Mimiring' ; kaj forta ĉevalo
Skemingo ; kaj pri Virgar
Volundido ; heroo de famaj
atingoj.

'3 Virgar sidas en sia hal' ;
konsilas ne rikana ; tenas
kruĉon da bruna medo ;
ambaŭ heroaj manoj.

'4 Virgar tiel ekparolas ; post
batala brulo ; "Toleranta min
manajn hakojn ; ĉu monde
troveblas luktulo?

'5 Kiam sidas mi sur Skeming
; kaj Mimiringon komandas, ;
ja neni tiom bravas, ; nek
vivon mi nek pacon
marĉandas."

'6 Respondis unu el liaj
knaboj, ; ruĝo vizaĝon tegas, ;
"Ĉu vi aŭdis ke Tidrik reĝo, ;
li burgon en Berno regas?

'7 Staris li en lukta lud' ; kie
batojn herooj faras, ; se vi
venas sub liajn hakojn, ; vi en
danĝero staras."

'8 Virgar Volundido kolera ;
largan tablon forpuŝis, ; ĉiuj
tiuj karaj drinkaĵoj ; la halan
plankon duŝis.

'9 Virgar saltis el ora seĝo, ;
antaŭen de drinka tablo: ; "Kiu
estis el knaboj tiu ; heroe
paroli kapablas?

'10 Skeming min portos el
halo mia ; por trovi Tidrikan
grundon, ; poste mi per
Mimiringo ; mortigos lin kiel
hundon."

'11 Virgar vestas meme sin, ;
fortika hero-apero, ; kaj li
saltas al Skeming-dorso, ;
piedoj ne tuŝis teron.

'12 Rajdas Virgar Volundido ;
antaŭen rapidspure, ; oraj lude
sonoras ringoj, ; lia bona
iranto* kuris.

'13 Glavojn stumpas, kirasojn
rompas, ; sur tero veneno
fluas, ; irantoj knalas?palas,
herooj falas, ; fajroj en montoj
brulas.

'14 Trarajdis li sovaĝarbaron ;
kie dorme gigantoj kampis, ;
mavaj serpentoj sur tero kuris,
; drakoj montpinte rampis.

'15 Virgar sidas sur Skeming-
dorso, ; en mano Mimiringo. ;
Multajn li vidas heroojn rajdi,
; ardas brile klingoj.

'16 Diris lerta Hildibrando ;
kiam li vidis Virgaron: ; "Mi
tiun etan nanon ; fendos en
pecan paron!"

'17 Kornarko* antaŭ buŝo
diras, ; kaj Rejmar* viro
impona: ; "Li ne nanas pli ol
vi, ; sed estas rajdisto plej
bona."

'18a Rajdas ili kontraŭ Virgar,
; tri luktuloj duraj, ; peze saltis
irantoj grandaj, ; ĝisgenue en
tero kuras.

'18b Rajdas ili kontraŭ Virgar,
; tri luktuloj elitaj, ; peze saltis
irantoj grandaj, ; tero genuen
glitas.

'19 Virgar saltis iranton
bonan, ; bategis hero-koro, ;
rajdis kontraŭ tidrikuloj ;
ŝtalon brilan esploros.

'20 Hildibrand' havis glavon
levitan, ; li vorton diras
kolere: ; "Kial vi estas kirasita
; kurante sovaĝtere?"

'21 "Jen estas Virgar
Volundido ; mi ŝtalon fendi
povos, ; kaj mi rajdas al burgo
de Bern ; fortan Tidrikon
trovos.

'22 Mi konas bone majstron
Hildibrandon, ; el viroj la plej
bravan, ; Rejmaron junan kaj
Kornarkon jarlon, ; tidrikulojn
prave.

'23 Staris mi en luktulbatalo ;
rajdistojn faligis teren, ; ĉu vi
staremas al Virgar-hakoj ;
Mimiringoglavon tolere?

'24 Hildibrand' al forta Virgar
diras: ; "Mi al paco konsilas, ;
rajdos ni al la burgo do, ; kie
luktuloj trankvilas."

'25 Hildibrand' la luktulon
gastigis ; arbare kie li estis. ;
Mi ĵuras je mia kredo, ; laŭdo
Virgaron vestis.

'26 Luktuloj rajdas
sovaĝarbaron, ; malmulte
damaĝis ilin, ; vidis grandan
burgon, ĝi ; purarĝente brilis.
.....

'27 Vidis ili grandan burgon ;
dekstre en pejzaĝo. ; Ĝin regis
heroo Granalejv', ; li povis
luktulojn damaĝi.

'28 Dek du rajdistoj en burgo
estis, ; kiuj povis tranĉi
kirasojn, ; timiĝis altaj
tidrikuloj ; prefere sin hejme
lasus.

'29 Diris Virgar Volundido, ;
li tenas gliman glavon: ; "Mi
kredis ke alta Tidrik reĝo ; pli
bonajn luktulojn havus!

'30 Rajdos mi al burgo luktula
; kolojn por dehaki, ; dume vi
post Virgar forta ; arbare
povas graki."

'31 Virgar de tidrikuloj rajdas,
; la heroo alta, ; Skeming
kuras kiel birdo ĉiela, ; ĝis
ŝultroj tero saltas.

'32 Dek du luktuloj en burgo
restis, ; pri oro zorgis kutime, ;
teruraj estis ili por vidi ; kirase
kaj glavoglime.

'33 Diras rajdisto Granalejv' ;
kiam rajdan Virgaron vidas: ;
"Venas jen luktulo granda, ;
nin al batal' invitas.

'34 Falos li pro miaj manoj, ;
lian mi kapon forĉizos. ;
Glavon lian havos mi ; kaj
larĝan kirasĉemizon.

'35 Virgar saltis de Skeming-
ŝultroj, ; en lando la plej
brava, ; kaj iris li luktulojn
trovi ; kiujn medo lavas.

'36 Virgar iris al larĝa tablo ;
kie luktuloj sidis. ; Lacis li pro
sia veturo, ; drinki li avidis.
.....

'37 Diras la heroo buŝe, ;
plenas lia konvinko: ; "Jen vi
sidas luktuloj dek du, ; donu al
mi medan drinkon!

'38 Se ne ricevos mi laŭ emo ;
por malvarmigi koron, ; mi
dishakos vin en pecojn," ;
Virgar forta retoras.

'39a Eksaltis rajdisto
Granalejv', ; li tenas glavon
frapan: ; "Se vi ne iras for de l'
burgo, ; forhakos mi vian
kapon!"

'39b Eksaltis rajdisto
Granalejv', ; li tenas glavon
malmolan: ; "Se vi ne iras for
de l' burgo, ; dehakos mi vian
kolon!"

'40 Estis Virgar Volundido, ;
sian glavon svingas, ; fendas
rajdiston Granalejvon ; dis en
du pecojn distingajn.

'41 Fendis rajdiston
Granalejvon ; disen en pecojn
du ; kaj de ĉiuj la luktuloj ;
dehakis kapojn plu.

'42 Virgar arĝentan kruĉon
prenis ; de larĝa tablo por
lango, ; trinkis li tiom kiom li
emis, ; porkoj luktulan
sangan.

'43 Virgar de la burgo iris, ;
ĝoja pro drinko festa, ; rajdis
al la tidrikuloj, ; arbare ili
restas.

'44 "Ekstaru altaj tidrikuloj, ;
ne timu sklave-brute, ; rajdos
ni al halo hejmen, ; manĝon
malsupren gluti.

'45 Mi faligis luktulojn kiujn ;
kuraĝis neniu renkonti, ; saltu
en paco sur irantojn, ; grundo
ne sangigontas.

'46 Viroj kvar al halo rajdis, ;
sango luktula varmis, ; iris
poste al alta burgo, ; granda
kuraĝo armis.

'47 Oraj drinkoj luktulaburge ;
baldaŭ estis drinkitaj. ; Jam
vespero estis malfrua, ; viroj
iris en liton.

'48 Hildibrand' noktomeze
vekiĝas, ; ruzon perfidan
konis, ; glavon de Virgar el
ingo ŝtelis, ; sian anstataŭe
donis.

'49 Frue estis en mateno, ; la
suno ruĝon ŝovis, ; prestiĝis
luktuloj en la halo, ; rajdas
Tidrikon trovi.

'50 Diris Virgar Volundido: ;
"Igos mi burgon bruli ; laŭ
konsilo ĝis la fundo ; ene sidas
luktuloj."

'51 Siajn ĉevalojn ili suriras, ;
de l' burgo rajdas ili, ; flamoj
pelas al ĉielo, ; fajro vaste
brilis.

'52 Rajdas tra sovaĝarbar' ;
elitaj luktuloj kvar, ; ne vidiĝis
iam similaj ; sidi selojn karajn.
.....

'53a Grandan vidis ili burgon,
; ĝi brilis kiel arĝento, ; ĝin
posedis Tidrik reĝo, ; la terura
regento.

'53b Grandan vidis ili burgon,
; brili argente blanka, ; ĝin
posedis Tidrik reĝo, ; teruris li
sen manko.

'54 Virgar tiam ekparolas, ;
tranĉi li povis kirasojn, ;
"Rajdu vi al burgo supren, ;
min vi do postlasos.

'55 Portu al Tidrik reĝo
mesaĝon ; plej brava el ĉi
gentanoj, ; Virgar sur verda
kampo rajdas ; kun Mimiring'
en manoj."

'56 Tidrik sidas en alta seĝo, ;
rajdisto plej valida. ; Ne
ekzistis luktulo tiom brava ; ke
ĉevalon li ne desidas.

'57 Unu luktulo venis en
halon, ; ĉiuj mire ĉuas, ; oran
glavon ĉe gambo portis, ;
grandan kirason bluan.

'58 Tidrik sin el seĝo levis, ;
ridetis li bonkore: ;
"Bonvenon majstro
Hildibrando ; poste al via
sinjoro.

'59 Estis vi sovaĝarbare ; porti
sinjoran mesaĝon, ; drinku
nun laŭ tuta vivemo, ; plej
bonan mian omaĝon!"

'60 Diris fama Hildibrand', ;
staris en kiraso certa: ; "Virgar
sur verda kampo estas, ;
batalon li vin ofertas."

'61 Tidrik en kirason kuris, ;
brilis ĝi sune vigla, ; kaj sur
Falkon saltis li, ; li estis nokte
nigra.

'62a Tidrik rajdas kampon
antaŭen, ; ludas per nova
glavo. ; Sekvis lin rajdistoj
kelkaj ; spekti duelon bravan.
.....

'62b Tidrik rajdas kampon
antaŭen, ; per nova glavo
ludas. ; Sekvis lin rajdistoj
kelkaj ; luktuelon studi.

'63 Hildibrand' prenis drinkan
trogon, ; hero'farojn pretis, ;
rajdis poste al tidrikuloj ; por
Virgar forta meti.

'64 Rajdas Virgar sur verda
kampo, ; volis por neniu cedi,
; rajdi vidis luktulojn de
burgo, ; por lian vivon predi.
.....

'65 Virgar sur Skeming-dorso
sidas, ; tempo fariĝos triva, ;
rajdis kontraŭ Tidrik reĝo ;
batali pri glor' kaj vivo.

'66 Diris alta Tidrik reĝo, ; li
palpas akran feron: ; "Kiu
estas ĉi sklavaĉo ; kiu celas
min konkeri?"

'67 "Rajdis mi de mia halo ; ĉi
tien sur Skeming sidas, ; mi ne
havas markon sklavan ; sed
estas mi reĝido!

'68 Staris mi en batala ludo ;
kun luktuloj kortaj (??), ;
montru virecon Tidrik reĝo, ;
ataku Virgaron fortan."

'69 Rejmar prenis arĝentan
kornon, al Tidrik reĝo donis: ;
"Drinku jen mia reĝo, ; povas
humore?(al zorgoj) boni!"

'70 Rejmar diras koleramense,
; multis tia mise: ; "Haku
Virgaron Volundidon ; je la
ŝultroj disen!"

'71 Agis lerta Hildibrand', ;
pro granda kolero: ; batis li
Rejmaron junan, ; kiu falis al
tero.

'72 Hildibrando drinkan
trogon ; en Virgar-manojn
ŝovas: ; "Staru Virgar
Volundido, ; ĉevalon vi turni
povas."

'73 Virgar drinkis la
koston?karan drinkon ; en
luktula pleno: ; "Dankon lerta
Hildibrando, ; mi promesojn
tenos!"

'74 Kunrajdis ili sur verda
kampo, ; ne ludgajo juna, ; ne
ĉeemis jen timuloj, ; luktuloj
kraŝis kunen.

'75 Reĝoj du en batala ludo ;
glavojn turnas aere, ; paŝas
ĉevaloj peze sur grund', ; alian
sendi teren.

'76 Virgar terure hakas, ;
rajdas Skemingon splendan(?).
; Ŝildon li el Tidrik-manoj ; en
du pecojn fendas.

'77 Tidrik tiris aere glavon, ;
reĝa jen maniero, ; pecon li el
Virgar-kasko ; faligis al la
tero.

'78 Virgar svingis glavon
vigle, ; fortoj sufiĉu plue, ;
Tidrik lancon el manoj perdis,
; ne povis gajnon(?) ĝui.

'79 Saltis luktuloj de bonaj
irantoj, ; ne por milde cedi, ;
ili estis timiga vido, ; batali
iris piede.

'80 Tidrik reĝo kaj Virgar
forta ; luktis leone fortaj. ;
Timis altaj tidrikuloj ; sian
sinjoron morta. &

'81 Virgar frapis tutimpete, ;
forto ne volis fiaskon, ; celis
Tidrikan mortigvundon, ; sian
pinton en kaskon.

'82 Glavon svingis kolere
hero', ; la kaskon damaĝi
planis, ; lia bona glav'
rompiĝis ; inter ambaŭ manoj.
.....

'83 Tiam Virgar Volundido ;
en batalo vortis: ; "Damna
estu patro mia ; li glavon el
forĝo portis!

'84 Povus pli bone mia patro ;
por mi fari glavon, ; tiam
Virgar Volundido ; venkon en
lukto havus!

'85 Povus pli bone mia patro ;
glavon por mi forĝi, ; tiam
Virgar Volundido ; venkon en
regno portus!"

'86a Tidrik batalas per ora
glavo, ; luktula reĝo klaka, ;
celis fendi Virgaron fortan ; el
larĝa kirasa jako.

'86b Tidrik batalas per ora
glavo, ; luktula reĝo griza, ;
celis fendi Virgaron fortan ; el
larĝa kirasĉemizo.

'87 Hildibrand' glavon el ingo
tiris, ; luktule grandis li: ;
"Virgar ne la vivon perdu, ; li
bravas pli ol vi!

'88 Virgar faligis luktulojn dek
du ; kiujn vi ne venki povis. ;
Donu vivon, lin ne mortigu, ;
ne eblas pli lertan?viglan
trovi!"

'89 "Aŭdu lerta Hildibrand', ;
ordonas reĝo via, ; aŭ vi foriru
de miaj okuloj ; aŭ mi vin
fendos talie!

'90a Mi Virgaron Volundidon
; ŝultre senkapigos, ; kaj ne pli
da sklavoj Tidrikon ; al koler'
instigu!

'90b Mi Virgaron Volundidon
; de la ŝultroj kvitos, ; kaj ne
pli da sklavoj Tidrikon ; al
koler' incitu!

'91a Hildibrand' Mimiringon
donis al Virgar, ; fariĝas nun
lia ano: ; "Staru Virgar
Volundido, ; ne plu mi vin
ĉikanos!

'91b Hildibrand' Mimiringon
donis al Virgar, ; fariĝas nun
ano lia: ; "Staru Virgar
Volundido, ; mi ne plu kaŝos
glavon vian!

'92 Mimiringon el ora ingo ;
mi ŝtelis en luktulburgo, ; vian
stalfraton mi esti volas, ; en
ĝojo kaj en zorgo."

'93 Virgar brakumas
Mimiringon, ; en sango ruĝa li
brilas. ; Mi ĵuras je mia kredo
ke ; li kisis la glavon gracilan.
.....

'94 "Venu vigla Tidrik reĝo, ;
la glavoj kraŝe paru, ;
malmulte estimas mi vian
reĝnomon ; kaj alta
trupanaro!"

'95 Estis batal' sur verda
kampo, ; glavoj kirasojn
knalis. ; Ĉiu hero' ricevis
vundon ; kaj ĉiu povus fali.
.....

'96 Kunen iras reĝoj du, ;
armilojn uzi spertaj ; Virgar
hakis Mimiringe, ; per glavo
super verto.

'97 Virgar svingis per ĉiuj
fortoj, ; tian prauloj laŭdus. ;
Tidrik sub la hakojn venis, ;
ŝiron kirasan aŭdis.

'98 Estas Tidrik reĝo laca ; pro
batalo peza, ; ŝtalo forta ĉe
brusto rompiĝis ; kvin vundoj
flanke lezas.

'99 Ditmar forta el Berna
burgo, ; el ĉiuj reĝoj plej alta, ;
inter la du batalantojn ; sur la
kampo saltas.

'100 "Aŭdu Virgar Volundido,
; ne forte haki vi devas. ;
Tidrik en danĝero statas, ;
largâ kiraso krevis.

'101 Donos al vi mi riĉojn,
bienojn ; kaj bonan virinon
favore, ; vivon kaj pacon donu
al Tidrik, ; ne pinton fiksu
kore."

'102 Diris Virgar Volundido ;
dum kaskon fiksas
drape?klape: ; rajdos mi al mia
patro ; kun mane Tidrika
kapo.

'103 Tidrik sian vivon perdos,
; agnoske al mi pravon," ;
Virgar forta diras plue: ; "Mi
ne estas sklavo.

'104 Vi forrajdu Ditmar reĝo, ;
ludon ne deprecu, ; Se ne
obeas vi Virgar-vorton, ; li
hakos vin en pecojn!"

'105a Ruĝajn prenis ili
glavojn, ; povas mi riveli. ;
Tidrik reĝo kaj Virgar forta ;
inter si duelis.

'105b Ruĝajn prenis ili
glavojn, ; povis luktuloj
spekti. ; Tidrik reĝo kaj Virgar
forta ; lukte interplektis.

'106 Tidrik ĉirkaŭsvingas
glavon, ; li luktis per forĝa
fero, ; ŝildon li el Virgar-
mano ; fendis en du al tero.
.....

'107 Virgar hakas per
Mimiring', ; li luktas per eĝo
nura, ; skrapas for de Tidrika
kapo ; kaskon el oro pura.

'108 Kaskon li hakis de
Tidrik-kapo, ; haroj kaj haŭto
sekvis. ; Hako simila ne
vidiĝis, ; oston malvarmis eĝo.
.....

'109 Jen paliĝas tidrikuloj, ;
spertaj en lukta varmo. ; Estas
al mi vere dirite, ; ke teren
falas larmoj.

'110 "Aŭdu Virgar
Volundido," ; Hildibrando
diris. ; "Staris vi batale hodiaŭ
; kaj venkon jam akiris.

'111 Ne mortigu Tidrikon
reĝon," ; Hildibrand' postulas.
; "Venĝos lia morton ; ĉiuj
tidrikuloj."

'112 "Mi ne timas tidrikulojn ;
batale kontraŭstari. ; Pro via
vorto li vivon ĝuos ; kaj
multajn luktojn faros!"

'113a Tidrik reĝo kaj Virgar
forta ; luktopace haltas, ;
rajdis do ĉiuj al burgo de
Bern, ; jen la balado saltas.

'113b Tidrik reĝo kaj Virgar
forta ; luktohalte brakumas(?),
; rajdis do ĉiuj al burgo Berna,
; jen mi baladon sumas.

'114 Drinkis ili en Tidrik-halo
; laŭ pratempa moro. ; Virgar
forta laŭdon havis, ; ĉe
luktojoj gloron.

'115 Virgar fariĝis tidrikulo, ;
jen vera diro, ; sekvis fidele
sinjoron sian, ; lia plej bona
viro.)